PACO



OFICIALA ORGANO DE LA MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO (MEM)

XIIa JARO N-RO 187/188 ELDONO DE LA GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO (GDR) JUNIO/JULIO 1969



LA PERGAMON-ALTARO



„Ni trovis tutan art-epokon; la plej eminentan verkon, kiu postrestis el la antikveco, ni vidas inter niaj manoj!" – Tiujn vortojn skribis en la jaro 1880 la germana inĝeniero Carl Humann, la malkovrinto kaj elfosinto de la fama Pergamon-altaro, post kiam li estis videbliginta dum dujara peniga laborado la plej ampleksan parton de la kolosa friso de gigantoj, kiu iam ĉirkaŭis la eksterajn flankojn de la altaro de Pergamon. Depost la 4-a de oktobro 1959 ĝi estas denove rigardebla en la meza salonego de la berlina Pergamon – muzeo.

Ni scieme demandas pri la historio de tiu-ĉi vastampleksa altar-konstruaĵo kaj pri la senco kaj signifo de ĝiaj marmorfrisoj, sur kiuj kontraŭstaras supernature grandaj figuroj de dioj kaj de gigantoj, necedeme luktantaj.
Unue ni rigardu la landkarton dekstre de la altar-aranĝo; tie, je la okcidenta marbordo de Malgrand-Azio, vid-al-vide de la insulo Lesbos, ĉirkaŭ 28 km for de la maro, ni vidas la antikvan Pergamon, kies lokon hodiaŭ okupas la turka urbo Bergama. Pri la frutempo de Pergamon ni nur malmulte scias. Ne pli frue ol je la epoko post la morto de Aleksandro la Granda, Pergamon disvolviĝis al politika kaj kultura potenco. Elkreskis sur ĝia tereno loko de plej intelekta kaj arta verkado, kiu dum unu kaj duona jar-centoj atingis plej altan gloron kiel rezidejo de ampleksa imperio. La dinastio de la atalidoj, kiu estris la pergamonan imperion, estis repuŝinta sub Attalos I. (241 ĝis 107 a.K.) kaj sub ties posteulo Eŭmenes II. (197 ĝis 159 a.K.) dum longdaŭraj, sed fine venkoriĉaj bataloj la malamikajn atakojn de la galatoj (keltoj), seleŭcidoj kaj bitinoj kaj estis farinta la urbon Pergamon urbo de scienco kaj arto. Oni dankis al la dioj por la helpo donita dum la militaj danĝeroj, omaĝe al ili starigante benitajn donacojn. La plej granda kaj plej grava verko inter la benitaj donacoj estis la altaro, dediĉita de Eŭmenes II. Ĝi estis farita el marmoro, havis altecon de 40 futoj, de preskaŭ de 12 metroj, kaj ĝi portis kiel frisornamaĵojn kolosajn skulpturaĵojn, montrantajn la lukton de la dioj kontraŭ la gigantoj. Motivo en ma friso estas antikva greka mito: La gigantoj, filoj de la ter-diino Ge, kulpe estis ribelintaj kontraŭ la estreco de la olimpaj dioj; sed, laŭ la orakolo, ili de tiuj povas esti venkitaj nur, kiam morteculo luktadas helpe al la dioj. Tial, oni alvokas Heraklon por partopreni la luktadon, kaj per lia helpo scipovas triumfe venki la dioj, al kiuj sin asocias ankaŭ la personiĝoj de la nokto kaj mallumo (norda friso) kaj la potencoj de la lumo (suda friso). Per la figurado en la friso oni 1959 oni realigis en la granda meza sapergamonoj kontraŭ la malamikaj gallaj gentoj, kiuj minacis la landon.
Kolosa luktado, plenumita de pasia emocio kiel en dramo prezentiĝis antaŭ la okuloj de la ofer-sekvantaro, kiu ĉirkaŭpaŝadis la altaron en solena procesio. Kvankam la leĝo de klasikeco postulis sintenadon trankvilan kaj moderecon por esprimi la arton, ĉi-tie en la lukto de la gigantoj je la Pergamonaltaro, korpa kaj anima doloroj elrompiĝas en sovaĝa sentado, puŝita de helenisma energio.
Ni ne konas la nomon de la artisto. Por tiu eminenta skulpturista laboro, kia estas la friso de gigantoj, Eŭmenes verŝajne kunvokis la artistojn el plej diversaj regionoj. Ili cizis siajn nomojn en la marmoron, sed nur jenaj nomoj restis konservitaj: Menekrates, Dionysiades, Orestes kaj Theorretos.
Pri la pli posta sorto de la altaro kaj de ĝiaj frisoj ni scias, ke la konstruaĵo suferis difektojn dum la roma epoko imperiestra, kaj ke ĝi estis riparita fine de la 2-a jarcento. Poste, je la fino de la 1-a jarmilo de nia erao, la altaro estis malkonstruita kaj reutiligita je remparoj fare de la bizancanoj, loĝantaj sur la kastel-monto, kiuj devis sin ŝirmi kontraŭ la atakantaj mohamedanoj. Post trovo kaj malkovro de la altaro kaj de ĝiaj frisoj en la antaŭa jarcento, la frisplatoj kaj certa nombro da konstruaĵpartoj de la altaro laŭ konsento de la turka registaro estis translokitaj en la muzeojn de Berlino. Okazis unuafoja ekspozado de kelkaj pergamonaj frisplatoj en la malnova muzeo („Altes Museum"), konstruita de Schinkel; de 1902 ĝis 1908 la frisoj estis rigardeblaj en la malnova Pergamon-muzeo, konstruita de F. Wolff. Nur 1930, je la centjar solenaĵo de la berlinaj muzeoj, la Pergamon-muzeo laŭ sia hodiaŭa formo estis finkonstruita kaj malfermita. Tamen, jam 9 jarojn pli poste, post eksplodo de la dua mondmilito, ĝi ree devis fermi siajn pordojn. La Pergamonfrisoj estis demuntitaj en la jaro 1941 kaj ŝirmitaj kontraŭ bombardo en lokoj ekstere de la muzea insulo. Post fino de la milito, la muzeaj konstruaĵoj de Berlino troviĝis tiom detruitaj, ke oni ĝis plua decido tute ne povis pripensi realigon de la multekostaj frisoj. Pro tio la pergamonaj frisplatoj estis transportitaj al Leningrado sub kontrolo de ekspertaj sovjetaj oficiroj en la „ermitejon" (Ermitage), kie ili en dankinda maniero estis prizorgataj de la tieaj kolegoj tiom longe kaj plej akurate, ĝis kiam la konstruaĵoj de la berlina muzea insulo denove estis preparitaj por akcepti la art – verkaĵojn. Post la grandanima transdono de la berlina muzea

BERLIN - URBO DE LA TEATROJ

Ne lastvice pro siaj teatroj Berlino, la ĉefurbo de Germana Demokratia Respubliko, estas alloga punkto por en- kaj eksterlandaj turistoj. Konataj tra la mondo estas la dramaj kaj muzikdramaj teatroj, kie prezentas sian arton internacie famaj artistoj. Karakterizas la socialisman kulturpolitikon de nia respubliko la fakto, ke detruitaj aŭ difektitaj dum la dua mondmilito teatroj estas rekonstruitaj kaj establiĝis en iama beleco.

Jen la domoj, kiuj prezentas Berlinon kiel urbo de la teatroj:

DEUTSCHE STAATSOPER
(Germana Stata Operejo) – sur la strato Unter den Linden (sub la tilioj)

La domo, 1741–1743 konstruita de arkitekto von Knobelsdorf, dum du jarcentoj de sia historio dufoje ege estis detruita: 1843 ĝi forbrulis, 1941 respektive 1945 militaj operacioj postlasis gravajn difektojn. 1955 la Germana Ŝtata operejo estis denove malfermata per la opero „Majstroj-kantantoj" de komponisto Wagner. (Tiama intendanto estis profesoro Maks BURGHARDT*.) Hodiaŭ ĉi tiun, ekster la limoj de GDR famekonatan, operejon direktas profesoro Hans PISCHNER (Piŝner). La repertuaroj de la Germana Ŝtata operejo, el kiuj kelkaj estis prezentataj ankaŭ en eksterlando, distingiĝas per elstara kanta prezentado. En la repertuaro ni trovas operojn kiel „Toska", „La sorĉa fluto", „Tannhojser", „Rigoletto", „Rusalka", „La fluganta holandano" kaj „Puntila". Ankaŭ la internacia horeografio ĉi loke artisme kaj modele estas kulturata.

* Prof. D-ro Maks Burghardt estas la prezidanto de la Germana Kulturligo de GDR.

KOMISCHE OPER
(Muzik-drama teatro) – Behrenstraße

En la rekonstruita domo de la iama „Metropol-teatro" la 23-an de decembro 1947 la muzik-drama teatro „Komiŝe Oper" estis malfermata per la prezentado de la opereto „La vesperto". Reĝisoro estis prof-o Walter FELSENSTEIN, la intendanto de tiu teatro. Sub lia artisma gvidado „Komiŝe Oper" en la pasintaj dudek jaroj evoluis al muzikdrama teatro kun internacia famo. La grandioza rekonstruo de ĉi tiu domo en la jaroj 1966/67 egalas al novkonstruo. Sur la repertuaro ni trovas verkojn: „La barbiro de Sevilla", „Salome", „La rakontoj de Hoffmann", „La Traviata", „Kavaliro Blubarbo", „Don Ĝovanni", „La juna lordo" kaj „La lasta pafo". La modela artista laboro de la ensemblo de ĉi tiu domo montriĝas ankaŭ en la baletprezentoj „Cindrulino".

METROPOL-TEATRO –
Friedrichstraße (Fridriĥ-strato)

Tuj post 1945 ĉi tiu reprezenta opereta teatro unue loksidiĝis en la filmoteatro „Kolosseum". Post kiam la ensemblo de la Germana Ŝtata operejo 1955 translokiĝis en la rekonstruitan domon sur la strato „Unter den Linden" (Sub la tilioj), la ensemblo de la opereta teatro denove reprezentiĝas en la domo sur Fridriĥstrato, en kiu jam pli frue, kiam ĝi nomiĝis „Admiralspalast", estis flegata tia arto. Sur la repertuaro de la Metropol-teatro, kiun gvidas la intendanto Hans PITRA, staras verkoj de klasikaj kaj nuntempaj operetoj: „My Fair Lady", „Can Can", „Kiss me, Kate", „Orfeo en la infero", „En la hotelo 'Blanka ĉevalo", „La Studento-almozulo", „Artfajrajo", „La ĉasta Susanne".

DEUTSCHES THEATER
(Germana Teatro) –
Schumannstraße (Ŝuman-strato)

La historio de ĉi tiu teatro komenciĝis 29-an de septembro 1883, kiam ĝi sub gvidado de L'Arronge, estis malfermata per prezento de la teatraĵo de SCHILLER (Ŝiller) „Kabalo kaj amo". En la sekvintaj jaroj, fare de artisma kunlaborado de Otto BRAHMS kaj precipe Maks REINHARDT, la teatro atingis mondfamon. La Germana Teatro en septembro 1945 estis denove malfermata per prezento de „Nathan la saĝulo". La unuaj intendantoj estis Gustav von WANGENHEIM kaj prof-o Wolfgang LANGHOFF, kies klasikaj scenaranĝoj estis konsiderataj modelaj. Nuntempe prof-o Wolfgang HEINZ gvidas la teatron. Ĝi disponas pri varia repertuaro, kiu entenas ankŭ teatraĵojn, ekzemple „La Drako", kiuj estis prezentataj en multaj urboj de Eŭropo. Plue la repertuaro entenas la teatraĵojn: „Malamikoj", „Nathan la saĝulo", „Faŭsto I", „La anstataŭanto", „Don Juan", „Ödipus tirano", „La paco", „Lorbaso", „Proceso de Nurenbergo".

KAMMERSPIELE (Ĉambra Teatro) –
(Ŝumann-strato)

Konstruita 1906 kaj planita de Maks REINHARDT kiel intima teatro kun nur kvarcent lokoj, „Kammerŝpile" estis malfermata per prezento de teatraĵo de IBSEN „Fantomoj". Ankaŭ ĉi tiu domo fariĝis agadloko de la eminenta reĝisoro. Kvankam ĝi estis detruita dum la milito, tamen en oktobro 1946 reokazis unua prezento kun la aktorino Käthe DORSCH (Kete DORŜ) en teatraĵo „Konvertiĝo de kapitano Brassbound".

„Kammerŝpile" kaj Germana Teatro, ĉi ambaŭ teatrojn direktadas prof-o Wolfgang HEINZ kaj en ili ankaŭ ludas la sama ensemblo. Prezentataj ĉi tie teatraĵoj kompletigas la vastecon de la repertuaro de ambaŭ domoj: „La snobo", „La hipokritulo", „La geedziĝo", „La monkesteto", „Mezuro por mezuro", „Amata mensogulo", „Landshutaj rakontoj", „Baran kaj la homoj en la vilaĝo".

BERLINA ENSEMBLO –
Bertolt-Brecht-Platz

La Berlinan Ensemblon fondis 1949 Bertolt BRECHT kaj Helene WEIGEL. Ĝis februaro 1954 Wolfgang LANGHOFF en la domo de Germana Teatro donis gastrajton al la Berlina Ensemblo. Depost marto 1954 ĝi ludas en la propra domo ĉe strato Schiffbauerdamm (Ŝifbaŭerdam) kaj Bertolt-Breĥt-placo.


La Berlina Ensemblo, kiun estras prof-o Helene WEIGEL, per sia laboro ĉefe flegas la verkojn de Bertolt Breĥt, kiuj prezentiĝas en modelaj, internacie apro-

---

posedaĵo flanke de la registaro de USSR en aŭtuno 1958 oni montris en kadro de speciala ekspozicio plurajn el la plej gravaj platoj de la pergamona friso de la gigantoj kaj de la Telephosfriso. Dum la monatoj januaro ĝis septembro volis simbole prezenti la batalojn de la lonego de la Pergamon-muzeo la riparlaborojn je la altar-fundamento kaj reallokigis ĉiujn frisplatojn, iom korektante, rilate al la aranĝo de 1930 kaj kaŭze de la sciencaj rezultoj el la esplorado dum la lastaj dudek jaroj.

Miloj da vizitintoj el oriento kaj okcidento, el ili multe da eksterlandaj gastoj, jam estis en la ŝtataj muzeoj de Berlino. Pri la profunda impreso, kiun ili ricevis rigardante la grandan altaron, iliaj eldiroj, ĉiam denove skribe kaj buŝe transigitaj al ni, donas feliĉigan ateston.

Dr. Elisabeth Rohde
Trad: E. Muthschall, Halle/S.



PUPPENTHEATER (Pupteatro) BERLIN
Kaj en urbdistrikto Pankow (Berlina strato) kaj en la „Domo de la infano" (Strausberga placo) la Pupteatro aranĝas prezentadojn. La teatraĵoj estas elektitaj por infanoj aĝajn 4–6 jarojn kaj por lernejanoj de la 1-a ĝis 4-a klasoj. Ankaŭ plenkreskuloj rajtas rigardi. La programo entenas i. a. „Aventuro de Pinocchios", „La malgranda Muk", „La diablo kun la tri ora haroj", „La anaseto" kaj „La erinaco, kiu volus esti leporeto".

(El „Berlina Gazeto")
Trad.: W. Zimmermann

„Viro estas viro" de B. Brecht. Sceno en la Berlina Ensemblo. Galy Gay, la simpla civitano, kiu nur volis aĉeti fiŝon, estas transmuntita al soldato ordonobea.

Foto: Zentralbild

bataj prezentadoj: „Koriolan", „La sankta Johanna de la buĉejoj", „Ŝvejk en la dua mondmilito", „Viro estas viro", „La latunaĉeto", „La panovendejo", „La stopita kariero de Arturo Ui", „La patrino", „La tagoj de la komuno". Krom tio „Viet Nam diskuto" kaj „Purpurpolvo".

MAKSIM GORKI TEATRO – Am Festungsgraben (apud strato Unter den Linden)
Ĉi tiu domo, 1823–1827 konstruita por la Berlina kantakademio, en postsekvintaj jaroj estis utiligita ankaŭ por aliaj celoj; ekzemple koncerta, prelega, kunsida salono. Kiel teatro ĝi estas instalita post la milito. Depost 1952 ĝi nomiĝas Maksim Gorki Teatro.
Sub direktado de prof-o Maksim VALLENTIN ĝi akiris grandajn meritojn fare de la scenaranĝoj de verkoj de la soveta dramatiko, same kiel per prezentadoj de nuntempaj teatroĵoj: „La stelo ruĝiĝas", „La stranga vojaĝo de Alois Fingerlein", „Nora", „La sovaĝa kapitano", „Marista amo", „Liola", „Don Juan aŭ La amo al geometrio".

VOLKSBÜHNE (Popolteatro) – Luksemburg-Platz
Ĉi tiu teatro havas grandan tradicion kiel Berlina Popolteatro. Politike famekonataj teatraĵoj ĉi tie estis prezentataj sub direktado de PISKATOR kaj aliaj. Detruita dum la milito la teatro 1954 estis rekonstruita. Unua intendanto estis Fritz WISTEN. Hodiaŭ Karl HOLAN direktadas la Popolteatron, al kiu apartenas ankaŭ la troviĝanta en la sama domo „Teatro en la 3-a etaĝo", en kiu aranĝiĝas matenaj prezentadoj kaj teatraĵoj kun malgranda konsisto da aktoroj.
La repertuaro entenas teatraĵojn de la klasika germana dramo: „Don Karlos", „Maria Stuart", „Kabalo kaj amo", sed ankaŭ tiaj verkoj kiel „Cezaro kaj Kleopatra", „La persekuto kaj mortigo de Jean Paŭl Marats", kiel ankaŭ la same sukcesa prezento de „Sepe: Ŝtelu iomete malpli". Aŭtoroj de GDR reprezentiĝas ekzemple per „Pri gigantoj kaj homoj" kaj „Tamen sub la jupo la diablo".

THEATER DER FREUNDSCHAFT (Teatro de la amikeco) – Berlin-Lichtenberg
Ĝi 1950 estis fondita kiel Centra Infana kaj Junulara teatro de GDR (intendanto estis Hans RODENBERG). Nun direktadas la teatron Ilse RODENBERG. La teatro konsideras sian taskon, pliriĉigi la sentojn, emociojn kaj idearon de la junaj homoj.
Per la repertuaro, kiu dividiĝas laŭ aĝogrupoj, oni intencas konatigi al la publiko ĉiujn specojn da koncernaj teatraĵoj: „La bestodometo" (muzika fabelludo), „La ensorĉitaj fratoj" (fabelo), „La rabistoj de Kardemomme", „Kion vi volas" (muzikaj komedioj), „Konduto nelaŭdinda", „Prafaŭsto", „La ĉaskuro post la boto", „Kruĉo kun olivoj", „Morgaŭ venos la kamentubisto" (dramoj), „Rejneke vulpo" (opero por infanoj).

FRIEDRICHSTADT-PALAST (Fridriĥŝtadt-palaco) – Am Zirkus
La domo kun 3000 lokoj estas Revu- kaj Varite-teatro kun konstante varianta programo. En ĉi domo estas flegataj muziko, komiko kaj artistiko, prezentadoj kiuj ĉiam denove aprobiĝas kaj aplaŭdiĝas fare de la publiko.

DIE DISTEL (La kardo) – Friedrichstraße (Fridriĥ-strato)
La kabaredo en la Fridriĥ-strato ekzistas depost pli ol 15 jaroj. Ŝerco, satiro, ironio de pli profunda signifo ĉi tie prezentiĝas.

Bert Brecht:

SE LA ŜARKOJ ESTUS HOMOJ

– Se la ŝarkoj estus homoj, al S-o K. demandis la filineto de la dommastrino, ĉu ili tiam estus pli afablaj al la malgrandaj fiŝoj?
– Certe, li respondis. Se la ŝarkoj estus homoj, ili konstruus en la maro kestegojn por la malgrandaj fiŝoj, kun ĉiaspeca nutraĵo, plantoj kaj bestetoj.
„Ili zorgus, ke en la kestegoj ĉiam estu freŝa akvo; cetere ili farus ĉion por la saneco kaj por agrabligi la vivon. Ekzemple, se fiŝeto vundiĝus je la naĝilo, oni tuj bandaĝus ĝin, por ke la fiŝeto ne formortu antaŭ la konvena tempo. Por malhelpi ke la fiŝetoj estiĝu malgajaj, oni aranĝus de tempo al tempo akvofestojn, ĉar gajaj fiŝetoj gustas pli bone ol malgajaj. Kompreneble oni instalus lernejojn en la grandaj kestoj. En tiuj lernejoj la fiŝetoj lernus kiamaniere oni „enneĝas" en la faŭkon de la ŝarkoj.

„Unu el la grandaj prozistoj de la germanoj" Lion Feuchtwanger titolis Arnold Zweig, la plej eminentan romanverkiston de la socialista germana nacia kulturo, kies romanoj apartenas al la mondliteraturo. Zweig montras en siaj verkoj la ruiniĝon de anakronisma klaso kun ĝiaj regadformoj. Li, kiel neniu antaŭe, kapablis senmaskigi en siaj verkoj la funkcisistemon de imperialismaj militoj.


Lia romanciklo pri la unua mondmilito „La milito de la blankaj viroj" kun entute 7 grandaj romanoj restis ĝis hodiaŭ senkompara en la germana literaturo.

Ni nur menciu *„La kverelo pri la serĝanto Grischa;* (1928), *„Juna virino de 1914"* (1931) aŭ *„La edukiĝo antaŭ Verdun"* (1935), kiuj estas tradukitaj en multajn lingvojn.

Liaj verkoj spegulas la transiron de kritika al socialisma realismo. Arnold Zweig, klasika nacia aŭtoro de nia epoko, estas verkisto de Germana Demokratia Respubliko. Li iam diris: „Se ne estus kreita post la fondiĝo de SUG (Socialista Unuiĝinta Partio de Germanio – la trad.) tiu ŝtato, la GDR, – tiele, ke estis venkita la skismo de la laborista klaso, por kies forigo mi jam batalis 1920 – mi ne estus sciinta, kie trovi mian domicilon".

Arnold Zweig ne plu vivas. Sed lia nomo kaj verko certigis al li en la literaturo de nia jarcento daŭran lokon. En liaj verkoj la grandaj humanismaj tradicioj trovas dignan daŭriĝon.

D. B.



ARNOLD ZWEIG. La 1887 naskita mondfama romanverkisto batalis por demokratio progreso kaj paco, li vivis de 1933–1948 en ekzilo. De 1948 ĝis sia morto (26. 11. 1968) li estis civitano de la Germana Demokratia Respubliko. Jam 1950 liricevis la Nacian Premion kaj 1958 li estis distingita per la Internacia Leninpremio.

Foto: Zentralbild

Johannes R. Becher

ARNOLD ZWEIG

La ĝoja kaj malĝoja vivosperto,
donita vin konservi ĝin fidele,
per granda verko via pli modele
kaj pli profunde ĉiam kaj per lerto.

formita estis en figuroj homaj:
Jen la poet' fariĝis konstruanto
de nova mond', en tempoj pasiĝemaj
per senc' kaj daŭro verkon pleniganto.

De viaj frazoj bela severeco,
de la figuroj pleno nin atestas:
Pruviĝis do de la roman' taŭgeco.
Jen monumento en romanoj estas!

La tagon, kiu vian nomon portas,
ni tago de germana proz' deklaru,
al vi, al Germani' honoron faru. (1952)

Trad.:
Dr. Karl Schulze

„Ili kompreneble bezonus geografiajn sciojn, por trovi la grandajn ŝarkojn, kuŝantajn maldiligente ie. Ĉefaĵo estus kompreneble la morala klereco. Oni instruus al ili, ke estas la plej bela kaj impona ago, se fiŝeto ĝojplene oferas la vivon por la ŝarkoj. Ĉiuj devus kredi al la ŝarkoj, se tiuj dirus: ni zorgas por belega estonteco. Oni instruus al la fiŝetoj, ke tia bela estonteco estos certa nur se ili estas obeemaj. Kompreneble, la fiŝetoj ne rajtus havi materialistajn, marksistajn aŭ egoistajn pensojn. De ĉiuj malaltnivelaj pensoj la fiŝetoj devus sin deteni; cetere tuj anonci al la ŝarkoj, se iu montrus iun ajn ne konvenan emon tiurilatan.

Se la ŝarkoj estus homoj, ili kompreneble ankaŭ intermilitus, por konkeri fremdajn kestegojn kaj fremdajn fiŝetojn. Militi devus kompreneble la fiŝetoj. Oni instruus al la fiŝetoj, ke inter ili kaj la fiŝetoj de la aliaj ŝarkoj, ekzistas grandega diferenco. La fiŝetoj estas ja mutaj, sed ili silentas en tute malsamaj lingvoj kaj tute ne povas kompreni unuj la aliajn. Ĉiu fiŝeto, kiu mortigus dum la milito aliajn, malamikajn, en alia lingvo silentantajn fiŝetojn, ricevus ordenon el fuko, kaj la titolon heroo.

Se le ŝarkoj estus homoj, kompreneble ankaŭ ekzistus arto. Oni kreus belajn bildojn, sur kiu la dentoj de la ŝarkoj brilus en la plej belaj koloroj. La faŭkoj de la ŝarkoj aspektus kvazaŭ amuzĝardenoj, en kiuj oni povas ĝojplene promeni. La teatroj sur la marfundo montrus, kiel heroaj fiŝetoj entuziasme ennaĝas la faŭkon de la ŝarko. La muziko estus tiel belega, ke la fiŝetoj postsekvus la muzikistaron, enlulitaj en la plej belajn pensojn kaj are eniĝus en la ŝarkajn faukojn. Tute klare ankaŭ ekzistus religio, se la ŝarkoj estus homoj. Ĝi instruus, ke la fiŝetoj nur en la ventroj de la ŝarkoj ekkomencas ĝuste vivi. Cetere ankaŭ ĉesus tio, se la ŝarkoj estus homoj, ke la fiŝetoj estas samrajtaj. Kelkaj el ili ricevus oficojn kaj havus pli da rajtoj (la iom pli grandaj eĉ rajtus formanĝi la pli malgrandajn. Tio por la ŝarkoj nur estus pli konvena, ĉar tiam ili pli ofte trovus pli grandajn pecojn por manĝi). La pli grandajn oficojn havantaj fiŝetoj zorgus por la ordo inter la fiŝetaro, ekzemple kiel instruistoj, oficiroj, inĝenieroj por kestkonstruado, ktp, ktp. Tutsimple, nur se la ŝarkoj estus homoj, ekzistus kulturo en la maro."

Trad.: H. Schmid (el „La Praktiko")

GDR DOMICILO DE LA HOMAJ RAJTOJ

Prof. Dr. jur. Hermann Hentschel

Kiam antaŭ 20 jaroj la plenkunsido de la Unuiĝintaj Nacioj decidis la *„Ĝeneralan Deklaron de la Homaj Rajtoj"*, ne ekzistis jam la Germana Demokratia Respubliko, ne iu aparta politika administra unuo de Okcidenta Berlino. En ĉiuj partoj de nia lando la projekto de konstitucio por antifaŝista demokrata Tutgermanio estis konceptata kaj vigle diskutata. Kiel delegito al la tiama „Germana Popolkongreso" mi bone memoras la multajn proponojn kaj rezoluciojn, kiuj ĉiuj naskiĝis el la konscio pri la responso, ke neniam plu ekestu milito de sur germana teritorio. Ni ĉiuj, kiuj travivis kaj transvivis la nokton de la faŝista subpremado, la milionoblajn krimojn kontraŭ la humaneco, estis unuanimaj pri la devo krei la certan laŭ konstitucia rajto fundamenton de longdaŭra paco kaj de vera demokratio. Nia konstitucia projekto de 1947/48 konformis laŭvorte kaj laŭcele la UN-Deklaracion pri bonaj rajtoj. Ne povis esti aliel, ĉar ambaŭ dokumentoj tiris la ĝustajn instruojn el la plej juna historio de la homara evluo.

Tamen ambaŭ diferenciĝis laŭ baza problemo, je kin lastlaste devas atentigi juristo.

Kion utilas la plej noblaj postuloj, kion utilas tuta katalogo de plej celindaj homrajtoj, kion utilas ĝeneralaj apelacioj al ĉiuj ŝtatoj, certigi la liberan evoluon kaj dignon de la homo? Ili multon utilas en la batalo pro la homa progreso, tamen ne sufiĉe, se la ŝtatoj ne estas devigataj samtempe, konforme al siaj evolustatoj suriri vojojn konkretajn kaj apliki rimedojn, kiuj ebligas kaj garantias la realan uzon de la fundamentaj rajtoj flanke de ĉiuj civitanoj. Kiel juristo mi opinias, ke tiu ĉi malperfektaĵo de la UN-deklaracio pri la homrajtoj troviĝas en la manko de la postulo laŭ tiaj konkretaj materiaj kaj publikjuraj garantioj. Ni nur komparu la deklaracion kun la fia realeco de la usona murdado kontraŭ la memdecido, kontraŭ la libereco kaj la vivo de la vjetnama popolo aŭ al la realeco de antaŭurboj kaj mizerkvartaloj en Sudameriko, en kiuj niaj fratoj de malhela haŭto estas devigataj vegeti.

Ni lernis, ke la homrajtoj estas garantiataj nur tiam, kiam estas starigata homdigna soci-, ŝtat- kaj rajtordo kaj la demokratio ĉiam pliperfektiĝadas. Laŭ konsekvenca realigado de la Potsdama Kontrakto de la Antihitlerkoalicio ni forigis potencon kaj proprieton de la monopoloj kune kun ĝia tuta militista kaj naziista koto. Nun ni realigas la plenevoluintan sistemon de la socialismo kaj la socialisman demokration.

La konstitucia projekto el 1947/48 nur povis realiĝi al fundamenta leĝo kaj konstitucia realeco en la 1949 fondita GDR, ĉar antaŭe la okcidentaj imperialistoj, ĉekape USONO estis establintaj la ekcidentgermanan respublikon kaj efektivigintaj la skismon de Germanio.

Ni serĉu en la konstitucio de la okcidentgermana respubliko certigitan rajton je laboro. Tia serĉado, samkiel al la rajto je klerigo estas sensukcesa. Krom neligaj formuladoj, akzemple pri la observo de la ŝtato pri la lernejoaferoj, ni nenion trovas, kio povus garantii tiajn kaj aliajn fundamentajn homrajtojn por ĉiuj.

Kun 672 000 da senlaboruloj la okcidentgermana respubliko paŝis en la jaron 1968, la datrevena jaro de la homrajtoj, kun miloj da unu – kaj duklasaj etlernejoj, kun polic- kaj justicteroro maldekstren, kun furiozaj protestoj kontraŭ la atomarmila malpermeskontrakto. Sed plie en la jaro de la homrajtoj, la leĝaro por kriza stato, ĝi, nuliganta la bazajn rajtojn, iĝanta escepta rajto, estis dekretata jam dum pacotempo. Sed la paco en Eŭropo estas minacata de neniu ol de la agresivaj okcidentgermanaj monopoloj kaj militistoj mem. Ili ne agnoskas la suverenan GDR, ili ne agnoskas la limojn en Eŭropo, sed ili agnoskas la legalecon de la neonazia partio, kiu ĝis nun atingis 15 milionojn da voĉoj dum balotoj. La rezolucio de la UN-komisiono por homrajtoj, akceptita la 8-an marton 1968, kiu kondamnis la naziismon kaj la rasan apartigon (Apartheid), kiel gravan ignoron de la homrajtoj kaj kiel gravan minacon de la mondpaco, trafas kormeze la okcidentgermanan registaron, sed tio tute ne maltrankviligas ĝin. Do ne dependas de tio, ĉu oni sin deklaras demokrata jurŝtato, sed de tio ĉu oni estas tia. La Germana Demokratia Respubliko estas tia ŝtato!

1968, en la jaro de datreveno de la homrajtoj la ŝtatpopolo de GDR donis al si novan, socialisman konstitucion. Estas ĝenerale konate kaj nekontestate, ke – samkiel niaj sanecaj socialaj aferoj – nia instrusistemo apartenas al la supero en la mondo, dum la instruaj aferoj de Okcidentgermanio nur pozicias je 28.-a loko laŭ internacia statistiko. Post kiam senlaboreco, reduktita labortempo kaj sociala redukto jam de post 20 jaroj por nia loĝantaro estas fremdvortoj la kreanta homo kaj la nemalhelpata evoluo de ĉiuj siaj kapabloj kaj demokratiaj rajtoj staras en la fokuso de la konstitucio. La ŝtatano de GDR konfrontas al ĉiuj fenomenoj kaj tendencoj de la ŝtata evoluo kaj al la sciencteknika revolucio kiel pensanta homo kaj kreanta kunhelpanto. „Ĉiu homo havas devojn por la socio, en kiu la libera kaj plena evoluo de ĝia persono estas ebla", estas skribite en la artikolo 29 de la UN-deklaracio pri la homrajtoj. En nia konstitucio ni trovas ĉi tiun principon, kaj krome ĝian multoblan garantion en 21 artikoloj pri la fundamentaj rajtoj kaj devoj de la civitanoj. Valoras la gvidmotivo, ke tiu plej bone plenumas siajn devojn, kiu plene uzas kaj efektivigas siajn demokratiajn rajtojn. Estimo kaj protekto de la digno libereco de la personeco estas celo kaj ordono por ĉiuj ŝtataj organoj, por ĉiuj sociaj agantoj kaj por ĉiu individua civitano". Ĉar ege gravas por ni ĉiuj la unuopulo, lia instruiteco lia sano, lia kreskanta bonstato per la laboro por si kaj por la tuta socialista homkomuno, ĉar liaj proponoj, kritikoj, ideoj, lia batalo kontraŭ ĉiu malŝato pri rajtoj kaj burokrata senkoremo, tiuj ĉi kapabloj kaj rajtoj fariĝas afero de la tuta socio.

La demokrata kundecido, la kapablo, sub la kondiĉoj de la scienc-teknika progreso esti forĝanto de sia feliĉo, postulas tre altan instruitecon. Mi citas el du artikoloj, kiu estis diskutita en sennombraj kunsidoj kaj debatoj kaj trans-

La nova televida turo de Berlin iĝis la plej karakteriza distingilo en la silueto de la ĉefurbo. „Teleasparago" ĝin baptis la berlinanoj. Kun anteno ĝi atingas la altecon de 361,5 metroj kaj apartenas al la plej altaj konstruaĵoj de la mondo. La diametro de la trunko estas 9 metroj. Speciala atrakcio senbude estos la tura restoracio, unika en sia speco, el alumeno, kun sep etaĝoj. Ĝi povas rondturniĝi je la propra akso.

Foto: Zentralbild



donita al ĉiu familio: „Ĉiu civitano de la Germana Demokratia Respubliko havas la egalan rajton je instruiteco. La instruejoj al ĉiu estas malfermaj . . .
La Germana Demokratia Respubliko certigas la evoluon de la popolo al socialista komuno de ĉiuflanke instruitaj kaj harmonie evoluintaj homoj, kiuj estas perceptintaj la spiriton de la socialista patriotismo kaj internaciismo kaj kiuj disponas pri alta ĝenerala kaj speciala instruo . . .
Ekzistas ĝenerala devo de vizito de supera lernejo. La dekjara ĝeneralinstrua politeknika altlernejo estas por ĉiuj infanoj la deviga lernejo. Ĉiuj gejunuloj estas devigataj lerni profesion."

„La ŝtato certigas la eblon de transiro al neksta pli alta instrugrado ĝis la plej altaj instruejoj, la universitatoj kaj altlernejoj, adekvate al principo de povo, al la sociaj necesoj kaj konsidere al la sociala strukturo de la loĝantaro.
Lernado estas senpaga. Stipendiajn subtenojn kaj senpagajn studnecesaĵojn oni donas laŭ sociaj vidpunktoj kaj laŭ ŝtataj kapabloj.
Por infanoj kaj plenkreskuloj havantoj psikajn kaj fizikajn difektojn ekzistas specialaj lernejoj kaj specialaj perfektiginstitucioj."

Konsiderante ĉi tiun staton de la realigo de la homrajtoj en mia ŝtato mi, kiel juristo, finfine starigas la demandon: „Kun kia rajto certaj homoj malhelpadas la membriĝon de GDR al UN?"

(El „DDR-Revue" 8/68 Trad.: Herbert Rothe

Survoje al la 20a naskiĝtago de GDR

Projektoj, planoj, perspektivoj


Ni en GDR konas la planojn pri la aliformigo de niaj grandurbaj centroj, ni vidas, kiel ilia aspekto ĉiutage ŝanĝiĝas. Urboplanistoj, konstrukciistoj kaj arkitektoj komune kun granda entuziasmo kreas la konstruaĵojn de la estonto. Ĉiu scias, kiom gravaj estas magazenoj kaj aĉetcentroj. Ŝporthaloj, klubdomoj kaj naĝejoj al ni agrabligas nian libertempon. Kaj niaj infanoj – bone ili sentas sin en la belaj infanĝardenoj kaj lernejoj. Jam en multaj lokoj de nia respubliko estas kreitaj varieblaj modeloj por infanĝardenoj kaj lernejoj. Dekmilojn da novaj lokoj oni konstruas ĝis al la jaro 1970 en infanĝardenoj. Tiam pli ol 60 % de ĉiuj infanoj tie trovos lokon. Interesa arkitektura solvo estas la testkonstruaĵo de la rond-infanĝardeno en Halle kun 144 lokoj, kiu jam montras siajn konturojn.

Modernaj aĉeteblecoj ankoraŭ ne ĉie sufiĉas. Ĉis al la 20a naskiĝtago de GDR oni en Suhl finkonstruos kvinetaĝan aĉetcentron „Centrum", kiu posedas 4700 m² da vendoareo.

Same necesaj estas eblecoj por kulturo, klerigo, ŝporto kaj ripozo. Ĉiuloke estiĝas centroj por urboproksimaj ripozeblecoj, klubdomoj kaj ŝportareoj. Projektista grupo de la Germana Poŝto fariĝis venkanto en konkuro de ideoj por konstruo de ŝportcentro en Dresden. Sub kuraĝe formitaj tegmentoj sin kaŝas 3000 m² granda halo, kiun oni povas utiligi ankaŭ por aliaj grandaj aranĝoj. Ĝi estas peco de proksima estonto.


Tri projektojn ni montras sur tiu ĉi paĝo. Ili servu kiel ekzemploj por multaj projektoj, kiuj beligos ne nur grandurbojn, sed ankaŭ pli malgrandajn urbojn kaj komunumojn.

(El „DDR-Revue" 11/68) Trad.: Burmeister



Suhl: La nova urbocentro, konstruota ĝis 1973

Foto: Zentralbild



Leipzig:
Parto de la konstruota nova urbocentro

Foto: Zentralbild

GASTOJ PRI GDR

Giganta projekto

Reveturinte de prezidantarkunsido de la Monda Packonsilantaro en la finna urbo Lahti, multaj membroj de la Monda Packonsilantaro restadis en GDR.
Sinjoro Chitta Biswas, ĝenerala sekretario de la Tuthindia Packonsilantaro, resumas siajn impresojn pri GDR jene:
„Okaze de ĉiu vizito en GDR mi vidis ion novan, ĉiun fojon mi konstatis plialtiĝon de la vivnivelo. En mia restado mi havis la eblon rigardi Halle-novurbon. Tiu ĉi giganta projekto kun ĉiuj modernaj instalaĵoj supermezure impresis min. Ĉie oni sentas la veran strebon de la homoj en GDR pri mondpaco. Tio speciale evidentiĝas en la Festivalo por Dokumentaj kaj Kurtdaŭraj Filmoj en Leipzig. Jam multajn jarojn nin ligas intima amikeco al la Packonsilantaro de GDR, kiu per multnombraj vizitoj konstante profundiĝas kaj vastiĝas. Plej intense ni nun orientiĝas al la preparoj de la kongreso kiu estos okaze de la 20-jara jubileo de la mondpaca movado en GDR. Tiu ĉi renkontiĝo, kiun partoprenos porpacaj fortoj el la tuta mondo, estos granda kontribuo por la sekurigo de la paco. Krom tio la kongreso havos specialan signifon, ĉar ĉiuj pacamaj homoj povos konvinkiĝi pri la rapidaj rekonstruo kaj progreso kaj pri la vera pacvolo en GDR."
Sinjoro Carlos Maura Renchetti, sekretario de la brazila pacmovado, diras pri sia vizito en GDR:

„Jam kelkfoje mi estis en GDR – la unuan fojon kiel turisto, ĉar mi deziris konvinkiĝi per propaj okuloj pri la socialismo en GDR. Mi estas entuziasmigita pri la rapidega konstruo de la urba centro de Berlin. Antaŭ du jaroj mi vizitis Eisenhüttenstadt kaj min forte impresis, ke oni dum malmultaj jaroj tie starigis modernan socialisman urbon. La akirajoj de GDR plifortigas la batalon de ĉiuj pacamaj fortoj tra la mondo por socialisma progreso. Modele por aliaj landoj estas la sociala prizorgo, kiun ĝuas la infanoj en GDR. Ĉi tie ili havas la eblon libere disvolviĝi kaj evoluigi ĉiujn siajn talentojn. En mia restado mi havis okazon interparoli kun la Packonsilantaro de GDR. La batalo pri paco kaj sekureco okupas grandan lokon en niaj komunaj strebadoj. Se en Eŭropo ne regas paco kaj sekureco, tiam ankaŭ en Latina Ameriko ne estas sekureco.
Antaŭ multaj monatoj ni jam komencis la preparojn por la solenaĵoj okaze de la 20jara jubileo de la mondpaca movado en 1969. Ĉiokaze ni partoprenos en GDR kun ampleksa delegacio, kiu konsistas el artistoj, verkistoj kaj politikistoj. Krom tio ni kontribuos por la Vjetnamio-ekspozicio, kiu okaze de la Mondpacorenkontiĝo 1969 en GDR estas malfermata per libroj, dokumentoj, broŝuroj, afiŝoj, insignoj ktp."

(El „Berliner Brief" Trad.: H. Eichhorn



Berlin travivas metamorfozon

La membro de la Ŝtata Konsilantaro de la Socialisma Respubliko Rumanio, prof. Constantin Daicoviciu, kiu ankaŭ membras en la Akademio de SSR, diris pri siaj impresoj en Berlin:
„Antaŭ 12 jaroj mi laste estis en Berlin. Intertempe Berlin travivis metamorfozon, ĉar hodiaŭ mi renkontis tute novan Berlin-on. Ruinoj malaperis kaj ĉie mi spektis novajn, agrablajn domojn kaj purajn stratojn. Pri tio mi tre ĝojis, ĉar per tio estas pruvita, ke la socialismaj landoj kapablas atingi grandecon.
Mi renkontis optimismajn, gajajn kaj helpemajn homojn. Mi kredas, ke tiu optimismo rezultiĝas el la konscio, ke ili laboras por sia socialisma patrio".

(El „Berliner Brief") Trad.: H. Eichhorn

Simbolo de stabileco

„La nova konstitucio de la Germana Demokratia Respubliko estas gravega dokumento. Ĝi estas simbolo de stabileco kaj rapida progreso de GDR.
Por demokrato la plej impresa artikolo estas tiu, en kiu difiniĝas, ke ĉiu civitano de GDR, sendepende de siaj nacieco, raso, mondkoncepto, sociaj deveno kaj pozicio, estas egalrajta, kaj ke ĉiuj civitanoj estas egalaj antaŭ la leĝo.
La nova konstitucio estas elstara, ĉar ĝi faras la civitanon „libera de ĉiu ekspluatado" kaj donas al ĉiu civitano „la rajton pri laboro, pri laborejo laŭ sia libera elekto". Tio estas vera libereco kaj kreas la premisojn por la sekurigo de lia digno. La plej multe admirata principo de la egaleco en ĉiuj eblecoj estas konkretigita en la konstitucio, kiu difinas, ke ĉiu civitano de GDR havas egalan rajton pri klereco (artikolo 25), kaj ke ne ekzistas kotizoj pagendaj por instruado (artikolo 26). La fakto, ke ĉiuj studentoj ricevas permeson pri kleriĝo kaj studmaterialoj, ebligas al ĉiuj lernantoj praktiki tiun rajton pri klereco.
Alia tre eminenta vidpunkto de la konstitucio estas la fakto, ke ankaŭ la fundamentaj devoj de la civitanoj estas difinitaj. Rajtoj sen devoj estas anakronismo kaj faras la praktikadon de rajto privilegio, kiun nur malmultaj povas ĝui. La plenumo de la bazaj devoj flanke de la civitano estas fakte necesa. La sintezo de fundamentaj devoj kaj rajtoj prezentas la plej realisman parton de la konstitucio de GDR, kiun ni en Hindio povas profitige diskuti."

Jaya Pathirana L. L. B. (Lond.)
Juristo de la
Plej Supera Tribunalo de Cejlono

(El „DDR-Revue" 5/68) Trad.: H. Dost

Loĝdomo en Halle-Novurbo, ĉe kies konstruo estis uzitaj novaj plastoj
Foto: Zentralbild

PILOTOJ EN PIĴAMO

Ili preskaŭ ĉiuj havas infanojn ... Tiel militema mi ne estas ..."

Kiel unuaj ĵurnalistoj de la mondo la kunlaborantoj de la DEFA-grupo Heynowski & Scheumann havis la eblecon, intervjui USA-pilotojn, paffaligitajn super la Demokratia Respubliko Vjetnamio.

„Pilotoj en piĵamo"

ili titolis sian filmciklon.
Ili nur malvolonte prenis la pistolon en la manon. Ili agis, kvazaŭ estus fremda, nekonata, abomena objekto, kiu estis donata al ili. Malgraŭ tio ĝi estis aparteninta al ilia ekipaĵo, la 9 mm – bareletrevolvero. Ili alvenis per siaj F-105-ajut-aeroplanoj, kiujn ili nomis „Thunderchief" (tondrodio). Nun ili sidas ĉi tie: En „piĵamo", kiel la kaptitaj usonaj oficiroj nomas siajn arestitveston. Ili deklaris sin pretaj paroli antaŭ la kameroj de la DEFA-grupo Heynowski & Scheumann. Nun ili konfrontiĝas kun iliaj individuaj agoj, estas demanditaj, kiajn bombojn ili ĵetis. Sur kiun? Kaj: Kial?
Ili informis. Hezitante aŭ volonte, trafresponde aŭ mediteme. Ili preskaŭ ĉiuj estas edziĝataj. Ili preskaŭ ĉiuj havas infanojn. Sed ili ĵetis la bombojn ankaŭ sur virinojn kaj infanojn. Ili scias tion. Kaj ili provas ĉesigi ĉi tiun problemon. Ili diras, ke ili nur obeis ordonojn. Ĉu tio liberigas de ilia kulpo? Ĉu ili sentas sin kulpaj? Jes kaj ne. Kulpaj, ĉar ili mortigis. Ne kulpaj, ĉar ili, kiel ili opinias, „ne estas Killer". Ili ne sentas sin kiel „Killer". Kvankam ili dum unu bombflugo murdas pli da homoj, ol povus fari la plej sangavida Killer de la US-terentaĉmentoj dum unu monato, ja dum unu jaro. Kiel devas aspekti en la kapoj de la bombpilotoj?
Walter Heynowski kaj Gerhard Scheumann rakontas en la sekvonta artikolo pri la komenciĝo de ilia filmo, pri iiia renkontiĝo kun la pilotoj en piĵamo.

Dum la pluajn horojn daŭrantaj interparoloj, kiujn ni havis kun 10 super la Demokrata Vjetnama Respubliko flugfaligitaj usonaj aerpiratoj, ni organizis ion similan kiel surprizmomenton: ni enmanigis al la kaptitoj ilian personan armilon (tio estis 9- revolvero Smith & Wesson).
Tion neniu arestito atendis. Ni do havis motivitan ŝancon, sperti momenton de ekscito, de ekboloj de l'sentoj. Verdire ni uzis ĉi tiun militistan rekviziton nur, por ekscii de niaj kunparolantoj, kial ili dum ilia surpaŝo sur vjetnaman terenon ne pretigis sin, rezisti kontraŭ ilia aresto, kvankam speciala ordono de la ĉefkomandanto encerbigis al ĉiu piloto: „Mi neniam libervole kapitulacios". Envere la plejmultaj paffaligitaj pilotoj jam levas la manojn supren en la momento, en kiu iliaj piedoj tuŝas unue la terenon de la DRV. Tio similas preskaŭ al kondiĉa reflekso: piedojn malsupren – manojn supren!
Nun ili ĉi tie sidis en siaj piĵamoj, la imponan pafarmilon en la mano. Unu, ĉefleŭtenanto Ringsdorf, demetis la Smith & Wesson sur sia femuro kiel tute fremdan objekton, kun kiu estus pli bone eviti kontakton. Kiam ni alparolis lin pro tio, li respondis: „Ne, mi ne havas deziron, ekkapti revolveron . . . Tiel militema mi ne estas."
Ni opiniis, ne provi fidi al niaj oreloj. Sed iomete pli poste ni aŭdis ankaŭ el la buŝo de subkolonelo Hughes: „Mi esence ne estas „Killer" laŭ karaktero kaj mi neniam provis, por tiel diri, finpafi".
Subkolonelo Hughes aviadis la F 105, nomata „Thunderchief". Ĉi tiu maŝino kunhavas timigan arsenalon kun bataliloj en sia trunko kaj kiel ekstera ŝarĝo kaj havas krome la timigan kontinue pafantan Vulkan-kanonon, per kiu oni povas konsumi dum 10 sekundoj pli ol 1000 grenadojn de 22 mm kalibro, ĉefleŭtenanto Ringsdorf aviadis la F – 4, nomata „Phantom". Tio aviadilo estas rigardenda kiel eksterordinare fortika, ĉar ĝi povas kunhavi bombŝarĝon de proksimume 8 tunoj (pli granda ol tiu de la Lancaster B 29 dum la dua mondmilito.)
Hughes kaj Ringsdorf kune enflugis 54-foje en la teritorion sub vjetnama suvereneco, por tie malŝarĝi la „timigan arsenalon". Kaj tamen diris al ni Hughes kaj Ringsdorf, ili ne estus „militeme" inklinataj.
Kiel oni komprenu tion? Kiel povas homo tiel agi kaj aliel paroli? Komence ni supozis, ke la kaptitaj aerpiratoj vo-



lis trompi nin. Tio estus certe la plej simpla interpreto. Sed la realeco evidentiĝis pli komplika. Indikon por ilia koncepto ni ricevis de ĉefleŭtenanto Shively: „Se oni, kiel mi, aviadilas maŝinon, kun eksterordinaraj rapidecoj, kaj estas ligata en la tureto, kun la motorista kasko sur la kapo kaj kun ĉio, tiam oni estas kvazaŭ, por tiel diri, fore de la aspekto kaj sentimento de la mortigado. Tio ne estas kiel en la armeo, kie oni vidas la virojn batalfali aŭ simile, sed ni estas sufiĉe malproksime de la tuta situacio, kaj pro tio ne ĉiam pripensas la ruinigon, kiun ni kaŭzas sur la tero".

Do, tiel ĝi estas: La aera alteco garantias anonimecon, la viktimoj sur la tero estas fremdigitaj al nuraj koordinataj punktoj. En la maldensan sferon de la zenita alteco de „Thunderchief" aŭ „Phantom" ne penetras la odoro de fumego kaj sango. Detruado kaj murdo ne estas sentperceptebla realeco. Por la aerpirato elĉerpiĝas la milito en ripetiĝanta teknika procedo, kiu rutine estas plenumata.

Ĉi tio povas klarigi spiritan tendencon, sed ne senkulpigi. Certe – ekzistas io simila kiel „labordivido" inter la sin intermiksanto sur la tero kaj la pirato sur la ĉielo de Vjetnamio. Sed la esenco de ambaŭ profitodonaj okupoj estas la sama. Ankaŭ la Vjetnamio-milito estas, kion militoj ĉiam estis: la daŭrigo de la politiko per perfortaj rimedoj. La ano de militfortoj estas – tion sciante aŭ ne sciante – plenumanto de politika intenco.

Do, ni intervjuis niajn usonajn kunparolantojn laŭ ilia rilato al la politiko. La respondoj estis denove tragikaj. La tro granda plimulto eldiris, neniel esti interesiĝinta por politikaj aferoj. Ili rifuzis nian demandon en maniero, kvazaŭ ni volus kulpigi ilin pro malkonvenaj emoj.

Por civitano de GDR, kiu ĵus kunformis sian novan societan staton, estas tio kiel karikaturo je la nocio de la demokratio. Kaj tamen ĝi revelacias frapante, kion ni komprenas sub la kompleta karaktero de societa sistemo. Sistemo nome, kiu praktikas universale la imperialisman politikon kaj senpasie enkalkulas en ĉi tiun politikon la intermiksadon kaj genocidon. Tiu sistemo celas, disigi la individuon de ĉia politiko, ĝin naski en mistikan misteron.

Tiel ili sidis antaŭ ni: simplanimaj vizaĝoj, kiuj kun naiva ĝojo parolis pri „la senmakula plezuro de la flugado", kiuj signifas sian bombjetadon kiel sian profitodonan okupon, bonaj specialistoj kaj multspertaj teknikistoj – kripliĝintaj fakidiotoj kaj tiel objektive iĝintaj murduloj.

La usonaj koncernoj de la aervetura industrio ege profitas per la Vjetnamioagreso. Sed jam neniam reprezentanto de monopoloj aŭ ilia politika komisiito montriĝis sur batalkampo, ili ne malpurigas la fingrojn. Ili sendas siajn kunulojn, al kiuj ili foredukis per la kompleta sistemo de la amasmanipulado ĉiun moralpolitikan respondeckonscion jam antaŭ ilia enbataligo. Ĉi tiuj manipulas poste siajn levilojn, mem iĝas parto de la meĥanismo, kiu ebligas la plej abomenindan militon.

Ke la usonaj pilotoj en ilia kapteco estis pretaj, respondeci iliajn agojn, povas esti taksata kiel unua atesto de ili mem – kaj novkonscio. Kolonelo Robinson Risner, kiu devis konfesi, ĝis nun neniam esti interesiĝita pri politiko, diris: „Nature, ni tion faros pli multe en la estonta tempo, mi certigas vin."

Ne diru iu, Risner estus nur unu sola. Kaj dek pilotoj estus eĉ ankoraŭ ne dekduo. Kaj kelkaj cent en kaptiteco de la DRV estus ankoraŭ ne multaj, mezurata kun la loĝantaro de la USA. Mem unu sola homo en sia sanĝiĝo al pli bono, estus sufiĉe kaŭzo, enmeti la medion de la filmo, ĝian multobligan forton. La mondo sciu, kiel aspektas en la kapoj de la homoj, kiuj nuntempe spertas ilian Stalingradon.

(El „DDR-Revue" 8/68) Trad.: Leichert

40 000 amputitoj sole en Sudvjetnamio . . .

La printempa eldono de „Otam-Canada News" raportas, ke sole en Sudvjetnamio estas 40 000 homoj, amputitaj je membro kaj kiuj ne ricevas artefaritan membron.

La bildo de tiu ĉi eta infano estis publicita en la okcidentgermana ĵurnalo „Konkret" tekstante:

„Tial ili forfuĝas: Ĉar ili estas kontraŭ tiu ĉi fia milito kaj tiu ĉi armeo, kiuj bruligas infanojn per napalmo."

Foto: Zentralbild





Jen iliaj viktimoj!
(Bildo maldekstra flanko)
Foto: Zentralbild

La 41 jara subkolonelo J. L. Hughes aviadis 44 bombatakojn. Soldato de la vjetnama popolarmeo lin kondukas al la studio de la GDR-dokumentaristoj Heynowski kaj Scheumann.
Foto: Zentralbild



La lernantino Hong Loan, 11-jara, el Huong von Thu laŭtlegas leteron de sia amikino el GDR

Foto: Zentralbild

Ueyama Masao:

Kantas la vjetnama patrino

Kiam venos ree nin kolomb'
forfluginta el la fum' de bomb'?
Ĉu ĝi vivas ie sen danĝer'?
Ni atendu, kara, kun esper'.

Kiam floros rozo sur la kot'
eltretita de l'usona rot'?
Ĉu ĝi ĝermos iam por refoj'?
Ni atendu, kara, sen malĝoj'.

Kiam Paĉjo hejmen venos kaj
en la brakoj tenos vin kun gaj'?
Ĉar batalas li por la liber',
ni atendu, kara, kun esper'.

Sukceso por la infanoj de Vjetnamio: 26000 markoj

Tio estas la fino de nia granda internacia kampanjo por la infanoj de Vjetnamio: en koncerta domo de la urbo Staßfurt okazis granda festo de la solidareco. 500 knaboj kaj knabinoj, membroj de la pionira organizaĵo de GDR, kunvenis kun multnombraj honoraj gastoj, inter ili 30 junaj vjetnamoj, nuntempe kvalifikataj en GDR.

Kampanjo, realigita de infanoj el pli ol 20 landoj, nune estis finiĝantaj per duhora aranĝaĵo. La edukistoj kaj membroj de la Pionira Blovinstrumenta Orkestro iniciatis ĝin, kiam ili antaŭ kelke da tempo transĝiris 1000 markojn al la solidareca konto. Kaj nun, kiam estis alproksimiĝanta la fino, ankaŭ infanoj estas la ĉefaj aktoroj. Serenajn kaj seriozajn prezentaĵojn oni ludis kaj parolis dum tiuj du horoj, sed ĉio estis ligita de unu ideo: solidareco.

200 tagojn la kampanjo daŭris en GDR, post kiam la infanoj jam estis pretigintaj kaj alsendintaj siajn rememoraĵojn. En tiu ĉi tempo ĉiutage mondonacoj estis transĝirataj al speciala konto, instalita de la ilustrita revuo „Zeit im Bild" kaj regule oni sendis al la donacintoj danke kaj rekompence amatore metiitajn donacaĵojn. Al proksimume 10 000 partoprenintoj de tiu kampanjo en GDR estis senditaj pli ol 2000 tiuj pruvobjektoj de solidareco. Ĉefe temas pri lernejaj klasoj, pioniraj grupoj, infanaj ĝardenoj kaj brigadoj de profesiaj lernantoj, kiuj por la infanoj en Vjetnamio kolektis markon post marko. Sed ankaŭ plenkreskuloj donace kontribuis.

Nature nia kampanjo nur estis unu el multaj. La ideo de la solidareco – kaj precipe de la solidareco kun Vjetnamio – ĉiutage estas praktikata en lernejoj kaj entreprenejoj, en urboj kaj vilaĝoj. Pli ol 100 milionoj da markoj, donitaj de la loĝantaro, ĝis nun estas ricevitaj de la Vjetnamia Komisio por la kuraĝe batalanta popolo de Vjetnamio. Nun al tio akumuliĝas proksimume 26 000 markoj el nia internacia infana kampanjo; 26 000 markoj, rezultintaj el pli ol 10 000 donacoj, minimumaj kaj plej minimumaj sumetoj.

Okaze de la aranĝaĵo en Staßfurt la komisiito de la ambasado de la Demokratia Respubliko Vjetnamio en GDR dankis per emociaj paroloj pro tia kunsento kun lia popolo, kaj la 500 pioniroj en la salonego certigis, ke ili ĉiam per ĉiuj fortoj subtenos la internacian solidarecon kiun ili taksas, sia propra afero.

(El „DDR-Revue" 12/68) Trad.: H. Dost



„Kiam venos ree nin kolomb' . . ."
Foto: Zentralbild



Leŭtenanto Susan Schnall estis Kondamnita de usono milita tribunalo en San Franzisco al ses monatoj de punlaboro.
Foto: Zentralbild

La kuraĝa ago de leŭtenanto Susan Schnall

Susan Schnall, leŭtenanto de la Medicina Servo de la Usona Mararmeo, marŝis en la unua vico de nekutima paradformacio, kiu moviĝis tra la stratoj de San Franzisco. Rekte apud ŝi paŝis la maljuna emerita brigadgeneralo D. Hugh Hester, altdekoraciita partopreninto de du mondmilitoj.
La alloga juna virino estis forlasinta sian postenon kiel flegistino en la mararmea hospitalo de Oakland (Kalifornio) dum nur malmultaj horoj por aliĝi al kontraŭmilita manifestacio de anoj de ĉiuj armilspecoj de la amerika armeo, al la tutunua simila agado en la ĝisnuna historio de la lando. Preskaŭ 200 viroj kaj virinoj de la aktiva servo – ne malmultaj en uniformoj – kaj krome proksimume 600 rezervistoj kaj veteranoj marŝis kape de senfinaj kolonoj de amerikaj kontraŭmilitanoj sub antimilitaj sloganoj tra la laŭ grandeco dua urbo de Kalifornio, por potence protesti kontraŭ la Vjetnamagresio de Washington.
Ankaŭ leŭtenanto Susan Schnall parolis al la kunvenintoj. „Ni virinoj en la uniformo de la amerika armeo ne plu volas silenti konsidere al la sangoverŝado kiun kulpas la Johnsona registaro sur vjetnama tero" ŝi deklaris.
Emocio iris tra la vicoj de la aŭskultantoj kiam la vervoplena mulatino en la bonkonvena marista uniformo klarigis al la aro, ke ŝi ne malatentas la danĝeron minacante al ŝi persone. „Mi scias, ke oni povas treni min antaŭ la milita tribunalo. Sed mi ne timas la sekvojn de libervola decido, kiun je neniaj kondiĉoj mi bedaŭros" finis Susan Schnall.
Ankoraŭ samvespere oni ekpreparis kontraŭ ŝi proceson pri dismoraligo de la armeo. La amerika militarista aĉularo eĉ momenton ne hezitis akuzi tiun kuraĝan virinon.
Leŭtenanto Susan Schnall, kiu agis en la senco de la plej bonaj demokrataj tradicioj de la nacio de Jefferson kaj Lincoln malgraŭ tio ne lasos sian jam akiritan konvinkon, des malpli, ĉar ŝi jam havas grandan modelon: korporalon Elizabeth Burns, la blondbukla sekretariino de komandestro de la fifamaj „ledo-nukuloj" de la Usona Mararmeo, stacionigitaj en Da Nang. Ŝi estis la unua amerikanino en uniformo, kiu pri sia decido, fini pluan servon sur vjetnama tero pro politikaj kaŭzoj, jam en la pasintjara somero estis vokita antaŭ usonmilitan tribunalon.
Certe Susan Schnall estos ne malpli rezista ol la kuraĝa Elizabeth Burns aŭ la nun jam legendaj „Tri soldatoj de Fort Hood", kiuj la 1-an de julio de 1966 per ilia tiam ankoraŭ sola decido, ne albordigi truptransportan ŝipon destinitan al sudorienta Azio, donis al la tuta lando ne ignoreblan signalon.
Signalo, al kiu intertempe kuraĝe sekvis miloj da militdevigendaj junaj usonanoj, inter ili ankaŭ tiuj pli ol 1250 amerikaj soldatoj kaj oficiroj, kiuj pasigis kristnaskon malantaŭ karceraj muroj pro rifuzo de militservo por la imperialistaj murd-strategistoj de sia lando.

(El „Für Dich" 51/68) Trad.: Linde Heinze

Nobla Usono

„Ni publike bruligos hundon per napalmo", avertis la studentoj de la liceo de Gossmont en Kalifornio.
„Tio estas monstre malhumana", protestis la bravaj homoj.
„Devas la instancoj interveni por ke tiu barbaraĵo ne okazu".
– Se bruligi hundon estas malhumane, ĉu estas humane bruligi infanojn? Kion vi faras, bravuloj, por ke la instancoj de la nobla Usono malpermesu tiun barbaran agon?
– Sed la hundo ne estas kulpa!
– Ĉu la infanoj? . . .
– Tiel statas la afero en Grossmont. Oni atendas por scii ĉu la instancoj decidos, ke la vivo de hundo pli valoras ol tiu de l'vjetnamaj infanoj.

„El la vie ouvriere" (Francio) -CR-

Raporto de svisa grupo da kuracistoj

La milita tekniko celas produkti armilojn kun ĉiam kaj ĉiam pli granda detruforto. Ekzistas certaj ekstermiloj, kies aplikado precipe ŝokas nian kuracistan konsciencon: estas la „blindaj armiloj", kiuj sen diferenco trafas civilan popolon same kiel la batalantan armeon. Inter ili troviĝas, krom atombombaj, kemiaj kaj bakteriologaj armiloj, sub kiuj suferas ĉefe la civila popolo, unuavice personoj, maljunuloj . . . Informoj venintaj al ni el Vjetnamio, nin treege maltrankviligas. La kemia milito komencis perfide antaŭ kvin jaroj per apliko de senfoliigvenenoj, celante ekstermi la rikoltojn kaj senfoliigi la vegetaĵaron de l'praarbaro, por trovi la partizanojn kaj venki ilin per malsato. Laŭ deklaroj de l'Pentagon mem („Science", 20. 1. 67), la agado etendiĝis super pli ol 200 000 ha da praarbaro kaj pli ol 60 000 ha da kultivita tereno.
Ĉiam pli ofte estas aplikataj batalgasoj. Ordinaran larmgason, oni diris komence. Sed evidentiĝis ke kelkaj el ili povis kaŭzi larmigojn, blindigojn, sangvenigojn kaj eĉ morton.
Kaj nun alia minaco kreskas: la bakteriologa milito. Por ĝiaj preparoj, kiuj jam forte prosperis, oni faris gravajn esplorojn, kelkloke en USONO.
La usona registaro elspezas ĉiujare pli ol 150 milionojn da dolaroj por esplorado al preparo de l'kemia kaj bakteriologa milito. Konsiderinda nombro da kuracistoj, kemiistoj, bakteriologoj kaj teknikistoj okupiĝas per tiu ĉi laboro. Sed nur 15 % de iliaj studaĵoj estas publicitaj en sciencaj ĵurnaloj, sed la plej granda parto da iliaj laboroj estas sekretaj aktoj, en sola posedo de la departamento de defendo („Science", 13. 1. 67). Plej granda silento ĉirkaŭas tiujn esplorojn. Tamen, pro diversaj deklaroj kaj kontroloj ni nun posedas sufiĉe klarajn opiniojn pri la okazo en tiuj ĉi laboratorioj . . .
Ĉu ni povas resti indiferentaj se granda potenco ekprenas tiajn rimedojn por ekstermi malgrandan popolon?

(El „Perspektiven" Nr. 9/68)
Trad.: Rudolf Hahlbohm

PETER WEISS

ATESTANTO EN LA LOKO DE L'KRIMO: VJETNAMIO

La konata okcidentgermana verkisto Peter Weiss entreprenis studvojaĝon tra Nordvjetnamio laŭ invito de la registaro de Demokratia Respubliko Vjetnamio.
Ĉi-sube ni publicas artikolon de Peter Weiss aperintan la 22-an de aŭgusto 1968 en la svisa semajna ĵurnalo „Vorwärts (Antaŭen)".

Ni vizitis Demokratian Respublikon Vjetnamio dum la tempo de la 14-a de majo ĝis la 21-a de junio 1968. Dum nia vizito tie ni havis la eblecon funde rigardi la landon. Flanke de la lokaj komitatoj en la bombarditaj regionoj ni ricevis raportojn kaj povis enrigardi dokumentojn koncernantajn la intensecon de la usonaj bombatakoj post la tiel nomata de-eskalado je la 31-a de marto 1968.

Kion ni vidis, perfekte konfirmas, ke la ciferoj, transdonitaj al ni de la provincaj komitatoj kaj de la centra komisiono de Nordvjetnamio por la esploro de la usonaj militkrimoj, estas tute korektaj.

Tamen tiuj ĉi ciferoj, jam transdonitaj al la tutmonda gazetaro, ne povas doni bildon pri la vera karaktero de la nuna strategio usona kontraŭ Nordvjetnamio.

Dum la registaro de Usono parolas pri agresaj agoj de Nordvjetnamio kaj de la „Vjetkong"-oj, ĝi penas per ĉiuj rimedoj de soldata potenco totale detrui la nordvjetnamajn provincojn sude de la 19-a paralelo. Tiuj ĉi atakoj estas direktitaj kontraŭ la civila loĝantaro, ties centroj kulturaj, socialaj kaj ekonomiaj, kontraŭ loĝejoj, proprajo, hejmoj, kampoj, rikoltoj, fruktplantoj kaj dombestoj. Ili estas direktitaj kontraŭ ĉiu civila vivo kaj kontraŭ la fundamentoj de la vivo mem. La atakoj servas la ekstermon, ili devas esti rigardataj kiel genocido.

En la eksteraj kvartaloj de la urboj kaj en la kamparo ĉiuj ŝtonkonstruaĵoj estas detruitaj, ĉu ili estas industriaj aŭ administraj domoj, loĝejblokoj por laborestoj, ripozejoj, lernejoj, preĝejoj aŭ malsanulejoj. Vidante tiujn ĉi postrestojn de la granda konstruperiodo en la Demokratia Respubliko Vjetnamio, oni klare ekkonas, kontraŭ kiu la usonaj aviadilatakoj estis direktataj: kontraŭ lando, kiu liberigis sin de la koloniismo kaj estis konstruanta socialisman socion.

Malgraŭ la detruo la vivo kaj la laboro daŭras en tiuj ĉi nordaj provincoj laŭ preskaŭ normala maniero; se oni nomas tion normala en lando, kiu depost pli ol 20 jaroj konas nenion alian ol milito. Malcentrigitaj fabrikoj kaj metiejoj produktadas tage kaj nokte, kaŝitaj en arbaroj, grotoj kaj sub la tersurfaco. En la dense loĝataj regionoj ĉiuj ŝoseoj, vojoj kaj kampoj estas plenaj de laborantaj homoj, veturiloj ŝarĝitaj per rikoltita rizo. Oni ekhavas la impreson de enorma aktiveco.

Ni vidis neniun spuron de primilita laceco, neniun signon de malkuraĝiĝo antaŭ ĉiu tiu detruo. Se magranda parto de industria entrepreno estas ankoraŭ uzebla, ĝi estas uzata . . .

Je la vesperoj laboristoj ofte kunvenas en la lernejoj por daŭrigi sian instruadon. En foraj lokoj ni renkontis laboristojn, kiuj faris prezentadojn per propraj teatrogrupoj, legis proprajn poemojn kaj kantis proprajn kantojn. Ke en tiom grave difektita lando la kultura vivo daŭras, ke la organizado de la instruado, de la sanitara servo, de la scienco kaj de la literaturo okazas samtempe kun la armita batalo, apartenas al la plej fortaj impresoj dum nia vizito en Nordvjetnamio. Tio montras, ke la socia strukturo kaj la vivomodelo estas nedifektitaj en Demokratia Respubliko Vjetnamio. Neniu bombatako, kiom ajn ampleksa ĝi estos, povas disbati ilin.

Vink Linh estas la plej malgranda regiono en la bombardita parto de Nordvjetnamio. Ĝia areo estas nur 800 kvadratajn kilometrojn granda. Sed tie loĝas 70 000 homoj. Partoj de Vinh Linh apartenas al la plej dense loĝataj teritorioj en la respubliko. Tie ĉi ekzistas nek kampo, nek akvobaraĵo, riverdigo, surveturebla vojo, kiuj ne estis sursemitaj per bomboj.

Kvin kilometrojn norde de la rivero Ben Hai ne plu ekzistas vegetaĵaro. Daŭros multe da jaroj, ĝis kiam oni ree povos kulturi ĉi tiun regionon iam tiom fruktdonan, ĉar la tero estas tute plenigita per bombsplitoj. De Vinh Linh ĝis Nghe An ĉiuj urboj estas tiom ofte bombarditaj, ke postrestis nur polvo kaj cindro. Super la ruinoj de la urbo Vinh en Nghe An nur en aprilo 1968 falis 40 000 bomboj. Ĝis mezo de junio 1968 tiu ĉi dismuelita urbo, kiel multaj aliaj, estis ree kaj ree bombardita.

La atakoj estas ĉiufoje koncentritaj al unu celo. Kiam tiu estas detruita, sekvas atakoj kontraŭ la teritorioj situantaj plej proksime. Dum tiuj ĉi koncentritaj atakoj okazas samtempe longe etendita bombardado sur la tutan provincon el la aero, de sur la maro kaj per malproksimen pafanta artilerio sude de la 17-a paralelo. La celoj estas antaŭe elektitaj per rekognoskaj aviadiloj.

En kunordigitaj ondoj aviadiloj subite flugas super vilaĝon ĵetante eksplodajn bombojn, napalmon kaj fosforon; poste ili ĵetas CBU-splitbombojn por trafi la homojn, kiuj estas serĉantaj ŝirmon; tiam denove pezajn bombojn, eksplodajn bombojn kun prokrastaj fuzeoj, raketojn. Ni jam konas la aplikadon de bomboj, kiuj ne efikas kontraŭ militistaraj fortikaĵoj aŭ kirasoj, sed nur kontraŭ homaj korpoj kaj la maldikaj argilmuroj kaj la pajlotegmentoj sur la kabanoj de la kamparanoj. La plej grandaj perdoj estas kaŭzataj de la malgrandaj kugloj de tiuj ĉi bomboj –

300 estas eljetegitaj el ĉiuj de la 600 malgrandaj bomboj liberigitaj de el unu „patrina" bombo.

La metodo bati rekte kontraŭ la civila loĝantaro kaj kontraŭ la agrikulturo estis pluevoluigata laŭ drasta maniero dum la lastaj tri monatoj de tiu ĉi „deeskalada" periodo. Bomboj kun prokrastaj fuzeoj estas terenĵetataj por malfruigi aŭ malebligi la rikoltlaborojn.

La rizo estas rikoltata fine de majo aŭ komence de junio. Gravaj atakoj estis direktitaj kontraŭ la tuta irigacia sistemo, kontraŭ la pumpstacioj, kluzoj kaj digoj en la provincoj sude de la 19-a paralelo. Neniu el tiuj ĉi instalaĵoj en tre komplika reto de irigacilinioj restis sendifekta.

La celo estas inundi la kampojn per la riveroj kun iliaj fortaj fluoj, dronigi la semaĵon kaj la brutaron, neniigi la lastajn kaŝejojn de la homoj.

Tiu ĉi milito en la kamparo faris ĉiun kamparanon soldato. Virinoj kaj junaj knabinoj laborantaj sur la kampoj portas armilojn. Ankaŭ kiam la bombatakoj venas seninterrompe, la laboro pri plantoj kaj rikoltoj daŭras. Estas parto de la militista tasko plenumi la produktadplanon. Brigado de knabinoj en Quang Binh enmetas rizplantoin kaj aplikas ŝnuretojn por sukcese fari la vicojn rektaj. Unu el ili diras: „Se la usonanoj vidas kurbajn rizvicojn, ili pensas, ke ni timtremas."

En la celo rebombardi tiujn ĉi homojn en la ŝtonepokon oni nur tiom sukcesis, ke la kamparanoj kaj laboristoj en la bombarditaj regionoj nun kaŝas sin en grotoj kaj terkavaĵoj. Sed en tiu ĉi subtera sistemo la kultura vivo, la profesia kaj politika instruado daŭras. Ankaŭ ĉi tie oni ludas teatron, kantas kaj legas poemojn.

Ĉirkaŭ la grandaj bombkrateroj oni plantas spinacon kaj melonojn. En la akvopleniĝintajn kraterojn oni elmetas fiŝojn. Kiam surveturebla vojo aŭ digo estas detruata, jam estas konstruita nova por ĝin anstataŭi. Kiam ponto estas trafata, oni transiras la riveron je alia loko. La malamiko ne povas bombardi ĉion samtempe.

Eble la kamparanoj en Vjetnamio estas eĉ ne heroaj, eble ili nur defendas sian teron. Ili scias, ke ne ekzistas alia vojo, ili devas persisti, ili neniam rezignos, ĉar ili scias, kiel estis antaŭe. Ili defendas, kio post la revolucio en aŭgusto 1945 estis konstruata.

Iun tagon estos prezentata la demando: Ĉu Usono povas efektivigi tiun ĉi masakron en Vjetnamio sen postkalkuloj? Ni jam nun devas krei mondampleksan opinion, kiu konfrontas Usonon al la postulo, minimume pagi la kostojn por la rekonstruo de Vjetnamio.

(El „Perspektiven" 10/68) Tradukis: D-ro Karl Schulze, Berlin

Hiroŝima memoras, Hiroŝima rememorigas

Hiroŝima! Ĉu sur la tuta terglobo ekzistas homo, kiu nenion aŭdis pri tiu japana urbo? Antaŭ 23 jaroj tie efektiviĝis la plej terura tragedio de nia epoko. Tio okazis en la jaro 1945, la 6-an de aŭgusto, je la oka horo 15 minutoj. La viktimo estis la urbo, situanta milojn da kilometroj de la batalkampo. Tien la amerika aviadilo ĵetis la unuan atombombon. Post tri tagoj oni ripetis la saman operacion kontraŭ la alia japana urbo – Nagasaki. Pereis pli ol 300 000 lokaj loĝantoj, pli ol 100 000 personoj estis serioze vunditaj. Estis brulvunditaj, estis venenigitaj. Dum sekvintaj jaroj multaj el ili mortis travivante grandajn suferojn. De Hiroŝima postrestis nur ruinamasoj kaj cindro.

La krima atombombatako al japanaj urboj elvokis grandan rezistadondon en la tuta mondo, kaj tuta homaro unuanime kondamnis ĝin. Stokholman alvokon subskribis 500 milionoj da personoj. Ĝi alvokis homaron ne disvolvigi atoman militon. En ĝi oni skribis, ke ĉiu, kiu kuraĝos ekuzi tiun ĉi pereigan armilon, estos nomata milit-krimulo.

La vivo taman montras, ke la agresemaj fortoj de imperiismaj grandŝtatoj dum siaj militaj aventuroj ne hontas uzi iujn ajn rimedojn. Pro tio dum multaj jaroj aŭdiĝis en la mondo la voĉo de la japana popolo, protestanta kontraŭ ordonoj de Pentagono, kiu volas siajn militbazojn aranĝi sur la japanaj insuloj. Ni memoras grandiozajn pac-marŝadojn sur la vojoj de Japanio, kiujn partoprenis dekoj de milionoj da japanoj. Ni rememoru la demonstraciojn kaj sidstrikadojn, per kiu la loĝantaro de Japanio protestis kontraŭ la militbazoj, kiujn oni volis fondi en Japanio, protesti kontraŭ amerikaj subakvaj atomŝipoj en havenoj de Japanio protestis kontraŭ la milito en Vjetnamio. Nun hiroŝimanoj per propraj fortoj komencis kampanjon: ili volas krei kinofilmon „Atestantoj de Hiroŝima" laŭ scenario de Sajto. Tiu filmo estas kontraŭ kruelaj militoj. Oni montras en ĝi hodiaŭen kompatindan vivon de homoj, kiuj ankoraŭ postsekve de la atombombo suferas, kiuj ankoraŭ travivas teruraĵojn de Hiroŝima.

Lukto kontraŭ la minacoj de nukleoarmiloj estas unu el ĉefaj taskoj de la Soveta registaro en eksterlanda politiko. A. Kosigin, la gvidanto de Sovetunio, dum sia vizito al Anglio en 1967, interparolante kun ĵurnalistoj, diris: „Ni opinias, se la homaro volas daŭrigi sian ekzistadon, nukleo-armilaron ĝi ne bezonas."

En la jaro 1968, li 1. VII., oni en Moskvo, Vaŝingtono kaj Londono subskribis li kontraktojn pri nedisvastigo de nukleaj armiloj. Tio estas ankoraŭ unu venko de pacamanta homaro, kie en la frontlinio marŝas Sovetunio. Samtempe proponis Sovetunio plifirmigi la pacon, ĉesigi streĉan preparadon de milito kaj komenci senarmiĝadon.

Hiroŝima, kiu travivis teruraĵojn de la atombomboj, memoras, kiu ĵetis la morton en la urbojn, kiu suferigis dum jaroj la urbanojn. Hiroŝima alvokas al prudento, remorigas, ke homoj en la tuta mondo devas esti atentemaj kaj per tuta sia forto lukti por la paco.

Laŭ la latvalingva ĵurnalo „Rigas Balls" (Voĉo de Riga) n-ro 182 (3332) de 5. VII. 68 tradukis Benita Kärt.

V. Putjatin
Latva maristo-ŝipgvidanto
– CR –

La registaro de GDR deklaras:

Militaj krimoj ne povas esti objektoj de preskripto

En deklaracio, direktita al la XXII-a sesio de la UNO-plenkunsido, la registaro de GDR subtenas la penadon de la socialismaj membroŝtatoj de UNO kaj de aliaj membroj de UNO akceptigi kiel eble plej baldaŭ konvencion pri la nepreskriptiĝo de militaj krimoj kontraŭ la homeco.

En la dokumento estas akcentate, ke la malindulga punado de ĉiuj naziaj kaj militaj krimuloj por la okcidentgermana Federacia Respubliko same kiel por GDR estas kaj estis deviga konsidero, rezultinta el du Mondmilitoj kaj samtempe nepre atentenda internacia jura devo.

Samtempe la registaro de GDR estis devigita al la atentigo, ke la registaro de la okcidentgermana Federacia Respubliko principe rifuzas plenumi siajn internaciajn jurajn devigojn pri la ĉiuflankaj persekutado kaj punado de naziaj kaj militaj krimuloj. Esenca kaŭzo de tia politiko evidente estas tio, ke en Okcidentgermanio tiuj agresemaj fortoj denove posedas la decidan influon, kiuj jam figuris kiel ekonomiaj, politikaj kaj militaj apogantoj de la Hitlera reĝimo por la dua Modmilito.

La kontrakto pri ne-transdono de nukleaj armiloj -grava paŝo

La kontrakto pri ne-transdono de nukleaj armiloj realiĝis post longjaraj klopodoj. UNO konsentis per granda plimulto tiun kontraktproponon, prezentitan de USSR kaj Usono. Multaj ŝtatoj jam subskribis la kontrakton, antaŭ ĉiuj la grandaj potencoj de nukleaj armiloj: Usono, USSR kaj Grand-Britio. Tamen, ni ne prisilentu, ke la ĝojo pri la atingita ne estas senmakula. La Ĉina Popola Respubliko kaj Francio ne subskribis la kontrakton: Ĉinio kontraŭ ĝin polemikis; la franca registaro deklaris, ke ĝi respektos la paragrafojn de la kontrakto. Ke tiuj ambaŭ ŝtatoj estos gajnitaj por partopreni la pluajn penojn por malarmado, ĝuste tio por ĝia daŭrigo estas mondskale grava.
La ,ne' de la hinda registaro al la kontrakto estas sekvo de la ĉina rifuzo, dum la franca deklaro rilate al nesubskribo de la kontrakto pravigis la revojn de Bonn pri eŭropa nuklea potenco per la franca-germana bombo. Kontraŭe, la francaj bomboj en Pacifiko – ĝuste nun – efikas kuraĝige por certaj fortoj en GFR.
MLF (multflanka kernarmila potenco) mortis. Sed la hezitado de la okcidentgermana registaro, subskribi la kontrakton, kaj la plej novaj sonoj el Bonn, la argumento, ke la kontrakto pri netransdono de nukleaj armiloj ne rajtu malebligi eŭropan nuklearmilan potencon, ja montras, ke la klopodoj de la okcidentgermanaj gvidantoj, povi disponi pri nukleaj armiloj, ne ĉesis. Du influhavaj viroj de CDU (reakcia partio de GFR) – SCHRÖDER kaj STRAUSS – sin preparas por tio; ilia ebla konkordiĝo havas malbonan aŭguron por la estonteco.
Ĉu la registaro KIESINGER – STRAUSS povas riski, rifuzi la subskribon, tio estas duba pro eksterpolitikaj kaŭzoj kiel por enpolitikaj, ĉar endanĝeriĝus la koalicio. (La nuna registaro nur povas regi dank' al koalicio kun la socialdemokrata partio.) Estas certe, ke de CDU ekzistas influhavaj personoj en la registaro, kiuj kontraŭas la kontrakton. Sed la oficialaj argumentoj disfalas: Eŭratom rekomendas la subskribon; en la interkonsultado kun la japana registaro la Federacia registaro devis aŭdi de la japana ministro por eksteraj aferoj, ke la kontrakto pri ne-transdono de nukleaj armiloj estas bona por Japanio, ĉar ĝi devigas la atompotencojn al pluaj agoj kaj ke ĝi ne malhelpas la porpacan uzon de la kernenergio de potencoj, kiuj ne posedas nukleajn armilojn.
Plej grava por la plua evoluo estas la fakto, ke la realigo de la kontrakto estis ligita kun la deklaroj de USSR kaj Usono, kiuj montras la pretecon de la mondpotencoj, internacie intertrakti pri interkonsentoj de efektivaj limigoj kaj reduktoj de nukleaj armiloj. Sovetio konatigis precizajn proponojn pri pluaj paŝoj rilate aplikon kaj produktadon de nukleaj armiloj, de ĝiaj transportiloj kaj bazoj. Kiel rezulto el la militsciencaj esploroj same kiel de la milito en Vjetnamio la en fokuson aperintaj demandoj pri malpermeso de kemiaj – biologiaj armiloj nun same staras sur la tagordo. Sed Sovetio ankaŭ rekomendis, kaj tion oni certe atente notas en okcidenta Eŭropo, aranĝojn pri regionaj malarmigoj, kiuj inkluzivas konvenciajn armilojn. En tiu konekso kaj precipe pro la brita diskuto pri la senfrukta stato de la disiĝo de Eŭropo en du sin kontraŭstarantaj militblokoj ricevas aktualan signifon la diversaj polaj proponoj pri milita senstreĉiĝo.
Antaŭ la pacmovadoj staras la tasko, uzi la ŝancon. La venontaj internaciaj intertraktoj – ĉu la renkonto de la potencoj sen nukleaj armiloj, la ĝeneva konferenco de la 18 aŭ la diskutoj pri senarmigo en la kunvenoj de UNO – devas esti plene atentataj. La senarmigo, kiu donas esperon por la estonteco, bezonas la energian kaj komunan agadon de la fortoj por la paco por ke ĝi realiĝu.

Walter DIEHL
sekretario de la
Monda Packonsilantaro

(El „Perspektiven" 9/68) Trad.: L. Schödl

Thälmann-Kolono

Ĉiel' hispana sternas siajn stelojn
super ni starantaj ĉe la front'.
Jam mateno mantras striajn helojn;
por batali pretas ni en rond'.
Refreno:

Kaj ne cedos ni al la faŝistoj,
kuglan pluvon firme spitas ni;
kun ni staras veraj komunistoj,
retiriĝon malestimas ni.
Refreno:

Al batalo la tamburo vokas,
antaŭen, marŝ! – por la glora venk'.
La faŝiston nia flag' sufokas,
Thälmann-anoj sturmas kiel vent'.
Refreno:
For de l'hejmo ni;
ni venkos por vi!
Ni venkos por vi liberec'!
Por – – – Vi!

Trad.: Herbert Rothe

Sanganta vundo de la Esperanto-movado: LA NEŬTRALECO

Tre oportune, kvankam malespere malfrue, alvenis „Paco" nro 169, decembro 1967. Jes, oportune, ĉar sur ties 11-a paĝo la „Letero al samideano" metas la fingron sur tiun delikatan vundon de la Esperanto-movado, la „NEŬTRALECO"...
Sufiĉe ofte en miaj rilatoj kun diversaj estroj de niaj E-organizaĵoj, iujn mi alpikis per mia lanco al la muro, devigante ilin malkovri la fundon de sia koro, rilate pacon kaj militon. Miaopinie, branĉeto el olivarbo tute ne sukcesas kaŝi pafilon. La vorto „neutraleco" estas por ili vitfolio per kiu ili strebas kaŝi sian aĉan nudecon.
„Neŭtraleco"... Jen tre taŭga vorto, kiam temas fari geston kontraŭ reakcia murdisto. „Ke esperantisto estas esence pacama" – ili diras –, „ja estas evidente..."
Sed la ĉiutaga vivo montras al ni, ke esti bonintenca ne sufiĉas, kiam vampiroj ruinigas la vivon de milionoj da homoj, ekzemple en Vjetnamio. Certe, la granda Rabelais pensadis pri ili dum li verkis la XXVII-an ĉapitron de „Gargantua"...
Tiuj responsuloj de niaj E-organizaĵoj travestiĝas tiel mallerte per la vorto „neŭtraleco", ke ĉiufoje ili sukcesas nur senmaskigi sin. Kiu forgesis tiun perfortaĵon en Tokio, la konfiskon de flago kontraŭ la usona agreso en Vjetnamio dum la 50-a Universala Kongreso? Kiu povas serioze kompreni, ke Esperantista Regiona Kongreso ne povas saluti la naskiĝon de Esperanto-Eldonejo en liberigita regiono de Suda Vjetnamio? Kiu povas honeste aprobi, ke ĝeneralo Franko honore prezidis la 52-an Universalan Kongreson de UEA en Madrido, tiu generalo el kies manoj ankoraŭ gutadas sango de pli ol miliono da viktimoj kaj sur kiu pezas veraj oceanoj da sufero, ruinoj kaj larmoj?
Ĉu D-ro Zamenhof kreis Esperanton kiel garantiaĵon por la murdo, la perforto, la ruinigo de homo al homo?
Ĉu tiuj responsuloj ne legis la verkojn de E. Privat „Vivo de Zamenhof" kaj „Historio de Esperanto"?...
Granda filozofo kaj sociologo de la lasta jarcento, Frederiko Engels, parolante pri tiuj sciencistoj, kiuj kredis povi liberigi sin de filozofio, aplikus al tiaj niaj Esperantistaj estruloj, kion li diris al ĵus menciitaj sciencistoj: „Vi kredas resti ekster la politiko, vi tamen estas sub la jugo de la politiko, kaj plej bone dirite, de la plej aĉa politiko".

F. OLIVAN – CR –



Romesh Chandra, ĝenerala sekretario de la Monda Packonsilantaro

Fidinde kaj konsekvence por la paco

Okaze de la ekdejoro de la sekretariaro de l'Mondpackonsilantaro en Helsinki la ĝenerala sekretario de l'Mondpackonsilantaro, Romeŝ CHANDRA, deklaris en gazetara informado la 21-an de septembro 1968:

„La Mondpackonsilantaro en la sekvonta jaro solenos la 20-an jaron de sia fondiĝo. La plej grava evento pro tiu kaŭzo estos granda konferenco por la paco en la mondo, kiu okazos en junio en Berlino, la ĉefurbo de GDR. GDR same festos sian 20-an naskiĝtagon en la sekvonta jaro. En la evoluo de la mondpacmovado la fondo de la unua germana porpaca ŝtato havis eminentan signifon. La Germana Demokratia Respubliko ekde ĝia ekzisto estis unu el la plej fidindaj kaj konsekvencaj batalantoj por la paco en la mondo.

La konferenco en Berlino al ni ebligos, denove manifesti por ĉiuj registaroj la nepran neceson ekrilati per normalaj diplomatiaj servoj kun tiu ŝtato, kiu sekvas politikon, kiu plene konkordas kun la streboj de la popoloj al paco kaj feliĉa estonteco.

Ni preparas tiun konferencon kun grandaj esperoj, ĉar ni deziras, ke ĝi donos fortajn impulsojn por la plua lukto por la paco en la mondo. Konekse kun tiu konferenco ni ĝojas scii, ke la pacmovado estas forta en ambaŭ germanaj ŝtatoj. Sin apogante sur la fortoj de la pacmovado en GDR, niaj amikoj de nia movado en GFR fakte heroe agadas kontraŭ la militistaj, reviziistaj kaj novnaziistaj elementoj. Tio havas grandan signifon por nia afero, kaj tial ili ankaŭ povas esti certaj pri la plena subteno de la mondpacmovado.

En la proksima tempo ni devas solvi kelkajn tre gravajn taskojn. Nun ni koncentrigas niajn fortojn al la solidareco kun la vjetnama popolo. Ni ĉiel klopodos, por ke el ĝi fontu nova ondego de solidareco kun la batalo de niaj vjetnamaj amikoj kontraŭ la usona agreso.

Plua problemo estas la sekureco en Eŭropo. Mi opinias, ke tio nun estas pli grava ol iam antaŭe. Ni tre bone scias, ke en GFR agadas militistaj kaj revenĝistaj fortoj, kiuj provas uzi la nunan situacion por efektivigi siajn ekstreme danĝerajn planojn. Tio tre minacas la sekurecon de Eŭropo. Tial nia plena subteno apartenas al tiuj fortoj de ĉi tiu kontinento, kiuj pledas por konferenco de eŭropa sekureco."

(El „Berliner Brief" 11/68) Trad.: L. Schödl

Deklaro de la Monda Packonsilantaro

Novnaziismo: Danĝero por la paco!

La mondpubliko observas kun kreskanta maltrankvileco la evoluon de l'novnaziismo en la Germana Federacia Respubliko. La rapida prospero de la movado, kiu malkaŝe kaj malhonte prenas kiel modela la Hitler-faŝismon, estas konsekvenca rezulto de dudekjara evoluo. En okcidenta Germanio ne estas realigitaj, la senmilitariismigo, sennaziismigo kaj demokratigo postulataj de l'Potsdama Kontrakto. En decidaj terenoj de la publika vivo persistis kaj trapenetris kontraŭdemokrataj fortoj, kaj lastatempe novnaziistaj rondoj povis pliigi ilian ifluon.

Kelkaj reprezentantoj de la okcidentgermana registaro distancigas sin de la celoj de l'novnaziisma NPG (Nacia Partio Germania), aliaj klopodas bagateligi ilin. Sed la ĉefa aspekto de la interna kaj ekstera politiko de la federacia registaro estas senpera kuraĝigo por tiu ĉi partio. Tio montriĝas en la interna politiko je la klopodoj por krei la „formitan socion", je la persekuto kaj malpermeso de demokrataj organizaĵoj kaj precipe je la provo de la registaro, realigi la fifamajn krizleĝojn. En la ekstera politiko dokumentiĝas tio per oficiala pretendo de la registaro pri ŝanĝigo de la „status quo" en Eŭropo, per neagnosko de la limoj, precipe de la Odra-Neise-limo, per la pretendo reprezenti ĉiujn germanojn per rifuzo agnoski la duan germanan ŝtaton, kaj per pretendo al kernarmiloj.

La kreskado de la novnaziisma movado en okcidenta Germanio, la enpenetro de NPG en federacilandaj parlamentoj, la problableco ke en 1969 reprezentantoj de tiu ĉi partio eniros la federacian parlamenton, kaj precipe la subteno, kiun tiu ĉi movado ricevas de reakciaj fortoj, kiuj inspiras ekonomion kaj politikon de la Federacia Respubliko, reprezentas kreskantan danĝeron por la paco.

Ni alvokas ĉiujn pacamajn homojn, obstini al tiu ĉi evoluo, ĉar ĝi malebligas veran malstreĉiĝon. La demokrataj fortoj kiuj en Okcidentgermanio kontraŭas la novnaziismon, indas nian aktivan subtenon. La evoluo de la okazaĵoj en la Federacia Respubliko necesas akceli ĉiujn proponojn kaj aranĝojn, kiuj servas al la sekureco kaj paco en Eŭropo.

La mondpaca konsilantaro peris ĉisupran deklaron pri la maltrankviliga evoluo de la novnaziismo en la Okcidentgermana Federacia Respubliko, al eminentutoj en multnombraj landoj. Subskribis tiun ĉi deklaron de mondpaca konsilantaro, centoj da personecoj el: Japanio, Danlando, Hungario. Pollando, Ekuadoro, Novzelando, Belgio, Italio, Israelio, Federacia Respubliko Germanio, Britlando, Bulgario, Svedio, Brasilio, Islando, Francio, Meksiko, Germana Demokratia Respubliko, Sovetunio, Guajano, Hispanio, Portugalio, Svisio, Siera Leono, Panamo, Usono, Ciprio, Kanado, Norvegio, Peruo, Irako, Jugoslavio, Finnlando, Angolo, Maŭricio, Unuiĝita Araba Respubliko.

(El „Perspektiven") Trad.: Rudolf Hahlbohm



Orkestrotrupoj junularaj varbas por la okcidentgermana neonazia partio NPD. Ili similas konsternige al la faŝisma Hitler-Junularo.
Foto: Zentralbild

Evoluo kaj ago de socialisma personeco dum la scienc-teknika revolucio

Prof. d-ro Max Steenbeck

„La homo ne estiĝas forta personeco sur bonpavimita senpeniga vivovojo, sed per spertitaj kaj konscience asimilitaj kontraŭdiroj, kun kiuj li devis polemiki. Tio okazas per imanentaj kaj ekvilibrigitaj tensioj, same kiel la rezisteco de ŝtalo baziĝas sur internaj tensioj.

Ĉiam estas simple nur kolekti kontraŭdirojn kaj sublimi absurdajojn al speco de spiritmoka mondkoncepto. Tio estas nura cedado.

Troaĵo je ne asimilitaj kontraŭdiroj, je neekvilibrigitaj internaj tensioj kaŭzas fendon, kaj la personeco – same kiel la ŝtalo – iĝas malutila rubo. Kaj inverse: pasia elviviĝo, kiu celas egaligi ĉiujn ĝermantajn tensiojn, neniam kondukas al ekvilibrigita kaj fortikigita personeco, sed al mola senkaraktereco, kiu estas premebla en ĉiun formon. Homoj nur iĝas personecoj per laboro pri si mem. Nur tiel ili akiras stabilecon ankaŭ dum malfacilaj situacioj kaj kapablas esti ekzemplo kaj modelo por sia ĉirkaŭaĵo. Neniu forprenas de la individuo la finfine necesan kaj decidan laboron pri si mem. Kaj ĝuste tio kaŭzas la valoron de personeco.

Personeco ĉiam estas individueco. Sed neniu homo estiĝas, neniu personeco kreskas kaj elpruviĝas sendepende de la socio, en kiu li vivas; esti personeco estas tute alia afero ol individualismo.

Kio signifas laboro, el kio ĝi konsistas? Kio instigas la homojn ĝin fari?

La poeto diras, ke karaktero formiĝas en la torento de la tempo. Tio signifas, ke personeco kreskas per la sin-prezento, per la ne-cedo al postuloj, kiujn la vivo de nia reala medio – kies ero ni mem estas – proponas al ni,

Tiu ĉi medio ne estas glate polurita kaj sendifekte funkcianta mekanismo, sed plene da eĝoj, hokoj kaj kontraŭdiroj. Ni ĉiuj konas la deziron prefere cedi al neagrablaĵo aŭ fari aŭ permesi ion, de kio ni scias, ke ĝi estas malĝusta. Sed oportunismo estas la rekta kontraŭo de bonkaraktera sinteno; kriterio de personeco ĉiam estas klara konvinko – kaj la ago laŭ tiu konvinko ..."

Kiu deziras eviti malhelpojn, zorgojn kaj devojn de la vivo per revita mondbildo, en kiu estas malpli da kontraŭdiroj, tiu eble estas bona kaj ankaŭ utila fakulo sur sia speciala kampo; sed ĉio, kio karakterizas nian tempon- la transformiĝo de nia tuta socia strukturo kaj ties valoroj – memkompreneble ne tuŝas lin. Li pendas en tiu evoluprocedo kiel nekomprena kaj tial senhelpa objekto. Li ne rajtas miri, ke oni same traktas lin. Ni ne solece vivas en la mondo, kaj ne povas el ĝi elekti, kion ni ŝatas kaj ignori aŭ arogece refuti la alian. Kiu volas retiriĝi en si mem baldaŭ sentos, kiel sterile kaj dezerte restas sia vivo. Kiu akceptas nura kriterio la propran mion, ĉie restas solece; vera egocentrulo ĉiam estas malfeliĉa – eĉ se li al si mem tion ne konfesas. Tio ne estas tipa por nia racia, per scienco kaj tekniko markita socialisma epoko. Eĉ se tiaj personoj volonte ĝin responsigus por sia anima povreco. Neniu homo per nura propra estaĵo estas tiel riĉa, ke li sole nur kun si mem povus ekzisti. Ĉia pli alta vivoformo bezonas – kaj ne nur biologie – la fekundigon deeksteran; personeco nur evoluas per sia ago en la torento de la tempo.

Sed kiu nur flosumante moviĝas en tiu torento de la tempo, sen havi propran celon, kunnaĝas por resti super la akvo, ne taŭgas esti personeco. Kiel li povus stabiliĝi kaj samtempe doni? Torento de la tempo – kio ĝi estas? Kiu ĝin stiras? La vorto sonas poezie, sed aŭdebla estas iu mistono – mistono de sorto al kiu oni devas submetiĝi. Nur tiu, kiu sin prezentas en la areno de sia tempo kaj ĝiaj postuloj – kaj tion nur povas homo kun firma pozicio – helpas stiri tiun torneton kaj kunzorgi ke el ĝi ne iĝos ĉionsufokanta inundo. Havi firmigitan starpunkton kaj el ĝi direktante influi la ĉirkaŭaĵon, jen estas, kio el homo faras personecon ... La ideologie de tiuj potenculoj, kiuj kaŭzis la vjetnaman militon, konsistas el limigo de la homoj al ilia privata sfero. Per tio ili gardas la potencon de sia klaso. Por konservi siajn potencon kaj hegemonion por ekspluati pli multajn kaj pli bonajn fontojn por sia vivo ol eblas por homoj el aliaj klasoj, oni kondukas militon – kiel en Vjetnamio tiel antaŭe en Kongo aŭ en Alĝerio; estonte oni povus ekbruli militojn multloke tra la mondo ne nur en Azio, Afriko, Suda Ameriko – sed ankaŭ en la koro de Eŭropo apud niaj limoj. Kiel do estiĝis la aserto pri proksimiĝo de nia socialisma mondo al la kapitalisma? Kiu provas persvadi nin, kial li tion volas? Ju pli da novaj teknikaj ebloj kreiĝas por abundo unuflanke kaj por popolmurdado aliflanke, des pli la ideologiaj starpunktoj kaj la el ili deduktitaj skaloj divergencas; ĉar des pli allogas la tento, ekspluati tiujn fontejn cele al plialtiĝe de siaj potenco kaj riĉ o. Hodiaŭ ĝi okazas ne plu simple per sukerita pano aŭ vipo aŭ vitraj perloj kaj sklava ĉasado, sed per aŭtomobilo kaj napalmo aŭ ĉekolibro kaj nukleaj armiloj. Depende de la obeo de senpotenca klaso. La Marksismo kadukiĝas? La demando pro la potenco estas hodiaŭ pli grava ol en la epoko de Marks. La klasbatalo kreskis gigantdimensie. Tiel estas.

La skalo de valoroj en la socialisma mondo principe diferencas de tiu en la kapitalisma. Tio estas fakto, kiun neniu povas nei. Agnoski la socialismajn skalojn superaj – kun ĉiuj konsekvencoj penigaj –, nur povas esti rezulto de streĉaj pensado kaj lernado, de serioza laboro pri si mem ...

Havi konvinkon signifas antaŭ ĉio aprobi etikan aksiomon kiel direktilon por la faro.

La baza demando, per kiu elproviĝas la personeco do estas: Al kiu gvidideo vi sentas respondecon, laŭ kio vi orientas viajn konsciencdecidojn kaj sekve la partiprenon? Al bonfarto de la homaro? Nature, sed tamen tiu ĉi ideo en tiu formo estas tro ĝenerala. Cu altruismo, kiel la kristanismo postulas? Post la okazintaĵoj dum preskaŭ 2 000 jara kristana-okcidenta historio mi dubas pri la praktika efiko de tiu ĉi ideo kaj eĉ timas, ke iutage ĝi rezultas: Guste ĉar mi amas kaj devas gardi mian proksimulon mi premas la butonon por la atombombo. Amo pri la patrio? Ho, ni amas nian landon kaj patrion, ni estas ligitaj al ili kun nia tuta profunda animo; sed ni ankaŭ scias, ke en nia hodiaŭ pli kaj pli proksimiĝanta mondo ĝi estas tro malgranda skalo kaj ni konas la mortigan danĝeron de la naciismo.

Mi konas kaj aprobas nur unu gvidoideon kaj ĝi sonas tre modeste: zorgi, por ke la vivo de ĉiuj popoloj ankaŭ estonte eblu. Povas ekzisti personoj, kiuj traktas tiun etikan aksiomon superflua, ĉar aŭtomatike ĝi plenumiĝas. Mi kredas, ke ili fermas la okulojn antaŭ la estonto. Ili fermas ilin ne nur antaŭ eblaj sekvoj de granda nuklea milito, sed ankaŭ antaŭ sekvoj de sociaj tensioj interne de popolo kaj ne malpli antaŭ tensioj, kiuj devenas el senlima potenc- kaj riĉecabismo inter

diversaj popoloj. Necesa sekvo de tiu ĉi aksiomo por tiu, kiu ne fermas siajn okulojn antaŭ la estonto estas la sinkonfeso por la socialismo, neneglektante ĝian ankoraŭ daŭrantan evoluon. Socialismo ne estas simpla memkontentigilo. Ĝi estas, respektante la hodiaŭan evolustadion, la sola eblo garantii la vivon de la homaro. Tial socialismo kaj la decida batalo por ĝia venko estas nepra neceso por nia vivo kaj ankoraŭ pli multe por la vivo de niaj infanoj kaj nepoj.

... Ni devas certigi per novordigo de la socio, ke neniam plu iu ajn individuo aŭ grupo da interesuloj ricevu enmane tiom da poteno, ke politiko kaj milito iĝos instrumento de meminteresoj de tiuj ĉi potenculoj. Estus danĝera simpligo karakterizi la potencajn profitulojn kiel nuraj militinstigantoj, danĝera precipe tial, ĉar tia interpreto ne trafas la pli danĝeran realecon. Eĉ se ekzemple iu ajn de la potenculoj el la hodiaŭa ekonomio (kaj ankaŭ politiko) intencus agi alie sia propra sociordo devigus lin tamen al senindulga uzo de sia potenco – aŭ li mem estus manĝegota per aliaj lupoj. La morala maskigo estas facila: Mi ja nur havigas laboron al miaj laboruloj. La vera danĝero ne estas ĉe individuo, sed an la sociordo, kiu ne limigas efike la egoismon, „ordo" laŭ kies maksimoj la plej sukcesa lupo eĉ estas ovaciata tiel longtempe, kiam individua posedo de ekonomiaj potencorimedoj estas permesata en limigita amplekso, tiel longtempe tia posedo devige devas konduki al misuzo de tiu potenco (jam sole pro la volo al ekzisto). Tiomtempe la idealo de bono kaj malbono sankcias la individuan posedajon en la ĝisnuna formo, ankaŭ la homoj reagos en la ĝisnuna maniero, sen senti sin kulpaj. Pro tiuj ĉi taskoj kaj postuloj al vivanta scio rezultas la bildo de personeco en la socialismo socio. Speciale nia socio postulas la memstare pensantan kaj discipline agantan homon kun interna firmeco, kapabla kaj preta, transpreni kaj toleri ŝarĝojn. Kiu malfortiĝas, se oni volas apogi je li, ne taŭgas. Nia bildo pri personeco certe ne prezentiĝas en tenta brilo alloga de l'okcidenta bildo, kiu admiras riĉecon kaj individuan sukceson kaj krome pretendas liberan eĉ egoisman evolueblecon de la individuo. Ĉe ni oni skribas per grandaj literoj *responson, devon* kaj *disciplinon* al socio.

Ni ne estas naivaj romantikuloj, kiuj nur atendas la tempon, dum kiu ĉiuj homoj agos ĝuste, el nura kompreno kaj libervole; tio estus kontraŭ ĉiuj historiaj kaj psikologiaj spertoj. Sed se kompreno sole ne sufiĉas, la strebado al komprenemo tamen ne estas sensenca aŭ nenecesa. Tio estas unu afero, kion ni povas fari. Kaj aliflanke – ĝuste, ĉar ni scias ke en ĉiu homo povas superi la tento cedi laŭ siaj deziroj sen aŭ eĉ kontraŭ sia ekkono, tutegale pro kiuj motivoj, ĝuste tial ni ne malatentas lin. Ĉiukaze ni tion ne faras ekster lia persona sfero, pri kiu li sole devas resti responsa, ĉar manko de komprenemo nur lin mem koncernas. Sed ĉie, kie la sekvoj de lia agado tuŝas la socion, troviĝas la socialisma homo, ero de kolektivo, en kiu li mem kunlaboras kaj portas kunresponson, sed en kiu ankaŭ la aliaj kunresponsas pri lia agado laŭ ilia kompreno. Solida kolektivo estas pli ol nura laborteamo; ĝi ankaŭ estas bremsilo kontraŭ malkomprenema aŭ kontraŭkomprena sinteno de solulo. Tio certe ne ĉiam estas agrabla por la individuo, sed estas necesa limigo de sia aglibereco. La nekomprenulo povas konsideri la edukadon al tia sinteno kiel kontraŭpersonecan dreson – tiel li nur pruvas la etmensecon kaj egoismon de sia mondkoncepto. La vera efiko de kolektivo al formigo de personeco ne bazas en negativeco, en malebligo de sensenca agado, sed sur komune plenumita laboro utila, kiu instigas la individuon plion vidi ol sian propran manfaron kaj profiton. Validas ĉie la jeno: por vera lernado ne sufiĉas rigardi, sed nur propra kunlaboro. Tiu ĉi alterno de lernado, agado, prenado kaj donado, sciado kaj kapablado estas le decida procedo dum la kreskado de homo al personeco. La scion kaj kapablon ekzameni kaj kompletigi per komuna agado estas la kvintesenco de vera socia vivo. Ankaŭ tiurilate la postuloj de l'socialismo kaj de la teknika evoluo konformas, nur en komuna agado la problemoj estas solveblaj.

Eltirajoj el parolado de prof. d-ro Max Steenbeck dum la VII-a Kongreso de la Germana Kulturligo

1968
Trad.: H. Eichhorn kaj R. Hahlbohm

Marksisma vidpunkto:

Lenin pri preslibereco

El la finparolo de W. Ulbricht en la sesa kunveno de la Centra Komitato de Socialista Unuiĝinta Partio (germ. SED)

W. J. Lenin tre klare kaj precize diris sian opinion pri la problemo de preslibereco kaj „absoluta libereco" en sia letero al Mjasnikov. Tio estas precipe aktuala pro tio, ĉar la registaro en Bonn klopodas kolporti la gazetaron de Springer – la plej reakciaj gazetoj de Okcidenta Germanio – en GDR-n kaj ankaŭ en aliajn socialismajn landojn sub la signo de „preslibereco". La „preslibereco" fariĝis aktuala temo en la okcidenteŭropoa gazetaro.

W. J. Lenin en sia letero al Mjasnikov eksplikis la principan starpunkton de la komunistoj kaj la progresemaj homoj pri preslibereco. Lenin diras: „Ĉiuj laboristoj demandos pri la speco de la preslibereco, por kio ĝi servu kaj por kiu klaso".

Eksplikinte la sloganon de la preslibereco laŭ la klasa starpunkto li skribas: „Ni klare vidas la fakton: „preslibereco" reale signifus, ke la internacia burĝaro tuj aĉetus centojn kaj milojn da ĵurnalistoj el rondoj de kadetoj, socialrevolucioloj kaj menŝevistoj kaj organizus sian propagandon, sian batalon kontraŭ ni.
Tio estas fakto. „Ili" estas pli riĉaj ol ni kaj „ili" aĉetos dekoble pli grandan „forton" kontraŭ tiu forto, pri kiu ni disponas. Ne, tion ni ne faras, ni ne helpos al la mondburĝaro."

Kaj nun li diras al Mjasnikov:
„Kiel vi povis degliti de la ĝenerala aprezo de la klasoj, t. e. de la starpunkto de la aprezo de la korelativecoj de ĉiuj klasoj, al sentimentale filistra aprezo? Tio por mi estas enigmo".
Lenin daŭrigas:

„Preslibereco stabiligus la forton de la mondburĝaro. Tio estas fakto. Ne la purigadon de la Komunista Partio en Rusio de ĉeno de ĝiaj mankoj, eraroj, malbonajoj, malsanoj (sendube ekzistas amaso da malsanoj) la „preslibereco" servos, ĉar tion la mondburĝaro ne volas. La preslibereco pli fariĝos glavo en la manoj de tiu ĉi mondburĝaro. Ĝi ne mortis, ĝi vivas. Ĝi staras apud ni kaj insidas. Ĝi jam dungis Miljukov-on, al kiu servas Tŝernov kaj Martov (parte pro malsaĝo, parte pro frakcia animamariĝo kontraŭ ni, sed ĉefe sekve de la objektiva logiko de siaj etburĝe–demokrataj pozicioj) „fidele kaj bonkrede".

Ili intencis, kuraci la Komunistan Partion kaj komencis ekpreni medikamenton, kiu alportas la certan morton – kompreneble ne por ili, sed por la mondburĝaro (plus Miljukov, plus Tŝernov, plus Martov).
Ili forgesis malgravaĵon, tre etan malgravaĵon, nome: la mondburĝaron kaj ĝian „liberecon", aĉeti gazetarojn, aĉeti la centrojn de la politika organizo.
Ne., ĉi tiun vojon ni ne iros. El mil klaskonsciaj laboristoj naŭcent ĉi tiun vojon ne iros." (Lenin-Verkaro, Volumo 32, paĝo 529, 530, 531).
La laborista klaso, la terkulturistoj, la intelektularo kaj ĉiuj aliaj laborantaj tavoloj ne batalis dum 23 jaroj por la forigo de la ekspluatado de la homo fare de homo kaj kontraŭ la imperialista militpolitiko, por fine permesi al la imperialistaj rabistoj, lasi propagandi en sia lando la amerikan vivmanieron kaj la imperialistan ekspansipolitikon de la Okcidentgermana Federacia Respubliko en iu formo.
Nia popolo volas konduki la socialismon al venko en paco kaj demokratio laŭ la leĝo de sia socialista konstitucio. En tiu ĉi senco ni ĉion faras, por pli firmigi la amikecon kun la Sovetunio, por evoluigi sur la bazo de la marksismo-leninismo la amikecajn rilatojn kun la socialismaj landoj, por flegi bonajn rilatojn kun la liberiĝintaj nacioj kaj por estigi normalajn rilatojn kun ĉiuj aliaj ŝtatoj.

Tradukis H. Rothe – CR –

Ky: Fanfaronulo, Etcezaro

La demokrata senatano Stephen Young deklaris, la 19-an de Decembro, ke se „la marioneta vicprezidanto de Sud-Vjetnamio povus daŭre malfruigi la progresadon de l'porpacaj intertraktoj en Parizo, tio estus nepardonebla." Ky estas „ambomenulo, fanfaronulo kaj et-Cezaro", deklaris la senatano. „Dum tiu eta tirano amuziĝas en la Parizaj distrejoj kaj diskutas pri la formo de la tablo, ĉe kiu li devas trakti, pli ol mil Usonanoj estas mortigitaj aŭ vunditaj ĉiusemajne.
Ni, Usonanoj, devas atingi akordon kun Hanojo kaj la reprezentantoj de F.N.L., kun aŭ sen Ky."
Senatano Young apelaciis la Usonan registaron retiri almenaŭ 200 000 G.I. el Sud-Vjetnamio dum la ses unuaj monatoj de 1969.

Laŭ l'Humanité (Francio), 21/12/68 – CR –

Lernolibroj plenaj de veneno

En Konstanz ĉe Boden-lago renkontiĝis komisiono de UNESKO kaj okupis sin pri lerno- kaj infanlibroj de okcidenta Germanio. La ĝis nun nur iome publicita rezulto el tiu interkonsilado kulminas per la konstatoj de la direktoro de la Internacia Instituto por Infan-, Junular- kaj Popolliteraturo en Vieno, profesoro Richard BAMBERGER, ke la okcidentgermana lernolibro estas ‚tute subevoluinta' kaj ke oni devas deklari la nunan staton ‚katastrofa'.

Distordo kiel metodo

La studkonsilantino Gertud BIENKO de Koblenz antaŭ nelonge analizis en ampleksa verko, la plej gravajn kaj en alta kvanto eldonitajn lernolibrojn por historio – precipe tiujn de KLETT kaj DIESTERWEG. El tio rezultiĝas, ke konstatoj kiel „tute subevoluinta" ankoraŭ tute ne ĝuste taksas la staton.
La konata konsilantino konstatas: „La ĉefa rimedo, la nepermeseblaj identigoj kaj distordoj de nocioj kondukas al la konataj distordoj en nia politika nuntempo: En Vjetnamio ne estas milito, do tiu, kiu demonstras por la paco, ĝenas la pacon, do lernolibroj plenaj de veneno tiu, kiu akuzas la Kontrakton de Munkeno, deklaras la militon de Hitler perdita, kiu diras, ke GDR estas ŝtato, kaj la atombombo estas danĝera, estas ‚dubinda', ‚sensaĝa', ‚demoraliza' aŭ ‚idealisma, utila idioto de Lenin' aŭ de Ulbricht. En la libroj faktoj estas al- kaj retroŝovitaj, ĝis ili staras surkape, transkapiĝas, kaj oni ne plu scias, kie estas ‚dekstre' aŭ ‚maldekstre'. Ludoviko XIV fariĝas socialdemokrato kaj Hitler klerigisto, tiel, kiel la hodiaŭ protestantaj studentoj fariĝas ‚maldekstraj faŝistoj'. Oni ankaŭ ne forgesu, ke tiu ĉi spirito jam ekzistas en la unuaj legolibroj por la ses-jaraĝaj geknaboj, kiel tie oni jam propagandas la bunkron kontraŭ atakoj el la aero kaj la eksterordinarajn leĝojn de kriza stato!"

Konscia eduko al revenĝismo

La bazo por la koncepto pri historio, kiu estas instruenda en okcidenta Germanio estas dekreto de la kulturministro el la jaro 1962. Laŭ ĝi la socialismo ne nur estas klarigenda kiel malĝusta, detrua, diabla malordo kaj frukto de radikalismo, sed la gelernantoj ankaŭ estus incitataj al politikaj etikaj decidoj kontraŭ ĝi. Tiel do ankaŭ estas verkitaj la lernolibroj por historio. Gertrud BIENKO diras pri tio: „Ĉiuj libroj klopodas montri la situacion en oriento kvazaŭ infero."
Sovetunio en la okcidentgermanaj lernolibroj estas insultata kiel „konstanta centro de malkvieto", „danĝero por la mondo", „decida dinaco al la homaro" kaj kiel „daŭrigo de la cara despotismo" kaj el tio sekvas la konkludo: „Senstreĉigo" kun tia ŝtato nur povas esti „babilado".
Kaj tiel daŭras per ĉiu defendo de l'imperiismo kaj de ĝiaj militoj kaj ĉiu blasfemo de l'socialismo ĝis la nekaŝita revenĝo. Pri tio skribas la studkonsilantino BIENKO: „En la volumo pri la mezepoko de KLETT por la mezaj klasoj fine de la ĉapitro pri la koloniigo de l'oriento oni povas legi, ke tiuj orientuloj plenaj de envio kaj sendankemo fine ‚en niaj tagoj' forpelis siajn bonfarintojn sen ke la Hitler-milito ankaŭ nur estus menciita."
Kiu do funde analizas la lernolibrojn de Okcidenta Germanio, tiu ne nur vidas la katastrofon sole en tio, ke ili estas „tute subevoluintaj", sed antaŭ ĉio en la danĝera intenco, prepari novan generacion por nova imperiisma agreso.

Günter BÖHME („Neues Deutschland")

Trad.: L. Schödl

El la okcidentgermana revuo „Stern": Mia plej bela feria travivaĵo . . . Maldekstre: Tiu knabo pasigis siajn feriojn ĉe la okcidentgermanaj ŝtatlimaj trupoj. Dekstre: 16-jara knabo de la hitlera „popolŝturmo". La bildoj similas . . .
Foto: Zentralbild



La nova kriminala kodo de GDR

La 1-an de julio 1968 ekvalidis en GDR nova kriminala kodo. Antaŭis larĝa tutpopola diskutado de la leĝoprojekto, el kiu rezultis miloj da proponoj por plibonigo kaj pliperfektigo de la leĝo, kiuj estis zorge ekzamenitaj kaj konsideritaj flanke de la kompetentaj instancoj de GDR. Tiamaniere estis garantiate, ke la nova kriminala kodo plene konformas al la konceptoj, bezonoj kaj interesoj de la civitanoj de GDR kaj akcelas la pluan evoluon de nia socia kaj persona vivo en socialismo.

La nova kriminala kodo anstataŭis leĝon el la jaro 1871. Malgraŭ progresemaj interpretado kaj aplikado kaj malgraŭ kelkaj plibonigoj en certaj detaloj la mankoj de tiu ĉi entute malnoviĝinta kodo des pli sentebliĝis, ju pli la socio evoluis en socialisman direkton. Do la ellaborado kaj ekvalidigo de nova, socialisma leĝo fariĝis nepre solvenda tasko.

La nova kriminala kodo de GDR servas la celon protekti GDR-n, la socialismajn atingaĵojn de la laboranta popolo kaj la pacan, sekuran kaj ordigitan vivon de ĉiu civitano kontraŭ ĉiuj imperiismaj atakoj kaj aliaj perturboj. Ĝi ŝirmas la dignon kaj liberecon de la homoj surbaze de la egaleco de ĉiuj antaŭ la leĝo kaj per tio respondas ankaŭ al la principoj de la internacia juro, speciale ankaŭ al la deklaracio pri homaj rajtoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

La nova kriminala kodo realigas la tezon, kiun iam starigis Karl Marx: „La saĝa leĝodonanto malebligos la krimon por ne esti devigata puni ĝin". Pro tio la tuta nova kriminalsistemo celas al tio, malebligi punindaĵojn. Ĝi povas starigi al si tian celon, ĉar GDR kreis la kondiĉojn materiajn, ideologiajn kaj moralajn por tio, ke al la krimo estis forprenata la grundo kaj la krimulo fariĝis esceptulo en la socio.

Do, la nova kodo ne estas kreita por punado. Sed tio antaŭkondiĉas, ke la bazo de tiu ĉi humanisma kriminala juro, la socialisma ŝtat- kaj sociordo, la paco kaj la vivo de la civitanoj estas fidinde ŝirmataj ankaŭ per efikaj disponoj de la kriminaljura respondeco.

La rajto de la civitanoj partopreni la kriminaljuran praktikadon, estas antaŭ ĉio realigata per la laboro de la civitanoj kiel elektitaj popolaj juĝistoj samrajtaj al la profesiaj juĝistoj kaj kiel komisiitoj de kolektivoj kaj organizaĵoj (sociaj defendantoj kaj sociaj akuzantoj). Plia efika formo por la partopreno de la civitanoj en la juĝofarado estas la agado de la sociaj tribunaloj (konfliktkomisionoj en la entreprenoj kaj arbitraciaj komisionoj en la loĝejkvartaloj). Pri tiuj ĉi tribunaloj traktas speciala leĝo.

Post tiu ĉi priskribo de la fundamentaj principoj de la nova kriminala kodo nun estu donataj kelkaj rimarkoj pri la kriminaljura respondeco. Ĝi estiĝas, se okazis faro, kiun la leĝo rigardas kiel punindaĵon. La punindaĵoj pritraktataj en la kriminala kodo estas aŭ krimoj aŭ deliktoj.

Krimoj estas socie danĝeraj atakoj kontraŭ la suvereneco de GDR, kontraŭ paco, humaneco aŭ homaj rajtoj, plue militkrimoj, punindaĵoj kontraŭ GDR kaj intence faritaj punindaĵoj kontraŭ la vivo. Krimoj estas ankaŭ la intenca farado de socie danĝeraj agoj kontraŭ la rajtoj kaj interesoj de la civitanoj, kontraŭ la socialisma proprieto aŭ aliaj rajtoj kaj interesoj de la socio, se tiuj faroj precentas gravan malestimon al la socialisma laŭleĝeco.

Deliktoj estas intence aŭ malzorge faritaj kontraŭsociaj punindaĵoj, kiuj alportas malutilon al la rajtoj kaj interesoj de la civitanoj, al la socialisma proprieto, al la socia aŭ ŝtata ordo aŭ al aliaj rajtoj kaj interesoj de la socio.

Kriminaljura respondeco povas ekesti nur, se la faro estis farita kulpe. Ne estas puno sen kulpo. Punindaĵoj estas rigardataj kiel kulpe faritaj, se la farinto realigis la leĝan faktaron de punindaĵoj per sinrespondeca agado, kvankam li havis la eblecojn konduti laŭ la sociaj normoj. Oni diferencigas du formojn de kulpo: la intencon kaj la malzorgon. Intence agas, kiu konscie decidas sin por la faro. Malzorge agas, kiu antaŭvidas la punindajn sekvojn, sed fidas je tio, ke ili ne ekestos, aŭ kiu ne antaŭvidas tiujn sekvojn, kvankam li estus povinta antaŭvidi ilin ĉe respondeckonscia ekzameno de la cirkonstancoj.

Se la antaŭkondiĉoj de la kriminaljura respondeco (kulpa realigo de faro karakterizata en la leĝo kiel punindaĵo) estas plenumitaj, la kriminala kodo preskribas la aplikon de certaj disponoj. La plej esencaj el tiuj disponoj de la kriminaljura respondeco estas: Pridiskutado kaj decido flanke de socia tribunalo, punoj sen forpreno de libereco kaj punoj kun forpreno de libereco.

La pridiskutado kaj decido pri punindaĵoj flanke de socia tribunalo okazas, se rilate la ekestintajn sekvojn kaj la kulpon de la farinto la faro ne estas konsiderinde kontraŭsocia kaj oni povas atendi efikan edukan efekton per la agado de la socia tribunalo. Tiu povas fiksi nur disponojn de eduko.

Punoj sen forpreno de libereco estas aplikataj, se la delikto estis farita pro nedisciplineco, pro forgeso de devoj, pro nefirma respdondeckonscio aŭ pro specialaj personaj malfacilaĵoj. Ili kontribuas al tio, disvolvi la edukan forton de la socialismaj kolektivoj kaj sociaj organizaĵoj. Ĉefa formo de tia puno estas la kondamno por sinpruvado. Ĉe tio la tribunalo fiksas pruvtempon de unu ĝis tri jaroj, surmetante al la kondamnito difinitajn devojn plenumendajn dum tiu tempo. Samtempe la tribunalo antaŭminacas malliberigan punon por la okazo, ke la kondamnito kulpe ne plenumos tiujn devojn. Plia puno sen forpreno de libereco estas la monpuno, kiu povas esti fiksata de 50,– ĝis 1000,– markoj aŭ eĉ ĝis 100 000,– markoj, se la punindaĵo baziĝis sur granda profitemo. Menciinda estas ankaŭ la ebleco eldiri publikan riproĉon.

Punoj kun forpreno de libereco estas la malliberiga puno, la arestpuno kaj la laboredukado. La malliberiga puno estas aplikata kontraŭ personoj, kiuj faris krimojn aŭ gravajn deliktojn. Ĝi estas fiksata por certa tempo, nome minimume ses monatoj kaj maksimume dek kvin jaroj, aŭ dumviva. La arestpuno estas antaŭvidita por kazoj, en kiuj tuja kaj profunde efikanta disciplinigo de la farinto estas necesa. Ĝi daŭras de unu ĝis ses semajnoj. La laboredukado estas fiksata, se laborkapabla farinto pro sia ĝisnuna kontraŭsocia konduto devas esti edukata al laboro. Ĝi daŭras minimume unu jaron kaj povas esti daŭrigata tiom da tempo, ĝis la edukado sukcesis, sed ne pli longe ol estus la malliberiga puno antaŭminacata maksimume por la respektiva delikto aŭ krimo.

La superrigardon super la ĝeneralaj dispozicioj de la kriminala kodo oni ne povas fini, ne menciinte ke la kodo enhavas ankaŭ specialajn normojn pri la kriminaljura respondeco de junuloj, t. e. de personoj, kiuj estas pli aĝaj ol dek kvar, sed ankoraŭ ne pli aĝaj ol dek ok jaroj. Estas fiksite, ke la kulpokapableco de la gejunuloj depende de ilia evolustato estu zorge ekzamenata. Kiel specialajn punojn por gejunuloj oni trovas la surmeton de specialaj devoj fare de la tribunalo (ekz. la devo komenci metiinstruadon), la porjunulan areston kaj la sendadon en porjunulan labordomon, kie specialigitaj edukistoj zorgas pri la junaj deliktintoj kun la celo kapabligi ilin al respondeca konduto en la estonta socia kaj persona vivo.

Verkis: D-ro Karl Schulze, Berlin

Kion lernas la infanoj en la lernejoj de GDR

Kiu – kiam – kie – kiel – kial?

„Kion lernas la infanoj?" – tio estas unu el la famekonataj ki-demandoj, pri kiuj la kriminalistoj asertas, ke nur la respondoj al ĉiu el ili entute donas ĝustan bildon.

Kiu lernas? En la ĝenerale klerigaj dekklasaj politeknikaj superaj lernejoj, t. e. la devigaj lernejoj en la Germana Demokratia Respubliko, lernas ĉirkaŭ 2,4 milionoj da geknaboj.

Ni menciu, ke kompreneble ankaŭ multaj plenkreskuloj lernas. La statistikoj montras, ke proksimume ĉiu kvara laborulo laŭsisteme kvalifikas sin. La eblecoj estas plej diversaj: uzinaj akademioj, kiuj ĉefe aranĝas kursojn por la faka kvalifikado kaj edukas faklaboristojn kaj majstrojn. Paralele al tiuj uzinaj akademioj ekzistas konformaj klerigaj institucioj en la kamparo. Ĉe la popolaj altlernejoj la laboruloj havas la eblecon, ne nur viziti multajn aliajn kursojn, sed ankaŭ postfari la finekzamenon de la 10-a klaso aŭ la abiturientan ekzamenon. Ĉe la fak- kaj altlernejoj oni povas enskribigi sin ne nur por la normala studado, sed ankaŭ por vespera studado aŭ foresta studado.

Kiam? La geknaboj ekvizitas lernejon en sia sepa jaro. La instruado komenciĝas por ĉiuj en la sama tago: la 1-an de septembro. En GDR lernas la infanoj dum ĉiuj ses labortagoj. Kutime la instruado okazas antaŭtagmeze.

Oni devas aldoni, ke ĉe niaj lernejoj ekzistas kompreneble ankaŭ ferioj. La plej longaj estas la someraj ferioj, kiuj daŭras ok semajnojn. Kontraŭ la entuta sumo de maksimume 215 lernotagoj staras 93 tagoj da ferioj kaj krome la dimanĉoj kaj sep laŭleĝaj festotagoj.

Kie? Ĉis nun ankoraŭ ne estas eble instrui ĉiujn infanojn en modernaj, novkonstruitaj lernejoj. Rilate al la lernejoj la damaĝoj el la milito estas tro longe senteblaj. (Ekzemple el 105 lernejoj en Leipzig restis post la disbatigo de la hitlera faŝismo nur 20 nedetruitaj konstruaĵoj). Krom tio la nombro de la infanoj, kiujn ni hodiaŭ instruas, esence plialtiĝis pro la enkonduko de la dekjara supera lernejo (la iama popola lernejo estis nur okjara).

Malgraŭ tio ni povas post la ĉirkaŭ 21-jara evoluo de la publika instruado ĉe ni prezenti tre bonan bilancon: Dum en 1946 ekzistis ankoraŭ pli ol 4000 lernejoj, en kiuj oni instruis komune infanojn de ĉiuj ok lernojaroj en unu klaso (unuklasaj lernejoj), hodiaŭ ekzistas jam ne plu unu lernejo de tiu ĉi tipo. En la kamparaj regionoj de nia respubliko oni establis reton de centraj lernejoj, kiu prezentas al vilaĝaj infanoj la samajn klerigajn eblecojn kiel al la infanoj en la urboj.

Preskaŭ en ĉiuj lernejoj de nia respubliko ekzistas ejoj por fakinstruado kaj fakkabinetoj, ĉefe por la eksperimenta naturscienca instruado. Krom tio oni konstruas ĉiujare multajn novajn lernejojn."

Kiel kaj *kial?* Ambaŭ estas en koheraj rilatoj. Se la infanoj ĝustatempe komprenas, kial ili lernas, tiam la „kiel" estas jam parte decidita. Ni deziras, ke ĉiuj geknaboj en nia socialisma lernejo lernu bone kaj ke oni instruu al ili tion, kion ili bezonas por siaj estontaj profesio kaj vivo.

En la jaro 1965 oni akceptis en nia respubliko la leĝon pri la unueca socialisma kleriga sistemo. La celo de nia socio – en antaŭvidebla tempo finkonstrui la socialismon – necesigas altan klerecon por ĉiuj infanoj. En niaj lernejoj oni tial enkondukas en la unuopaj jarpartoj novajn instruplanojn. Plenumi ilin ĉiuflanke, signifas por la instruistaro antaŭ ĉio, plej efike peri sciojn, kapablojn, talentojn kaj lertecojn en ĉiuj fakoj, kapabligi la gelernantojn al memstara spirita laboro, al koncentrado je la esenca kaj al kompreno de la interrilatoj. Samtempe agas la instruistaro senĉese kiel edukanto de junaj socialistaj personecoj. La plejmulto el la gepatroj, la pionirorganizaĵo ‚Ernst Thälmann' kaj multaj aliaj sociaj fortoj subtenas ĝin en tiu laboro.

Kaj nun al la demando *kion.*

Komence nii volas mencii, ke la gelernantoj en nia respubliko lernas laŭ moderne formitaj lernolibroj, de kiuj la eldonejo Volk und Wissen aperigas ĉiujare ĉirkaŭ 22 milionoj.



Tiuj lernejanoj ricevas specialan kvalivikon por profesio en la elektronika industrio.
Foto: Zentralbild

Oni devas scii, ke la enhavo de la instruado en GDR estas fiksita per la ŝtataj instruplanoj. Ĉar temas ĉi tie pri dokumentaro de kelkaj cent paĝoj, ni preparis sinoptikan tabelon (rigardu la apudan paĝon).

Jam per la transformigo de la iama elementa lernejo en dekklasan ĝenerale klerigan politeknikan superan lernejon ŝanĝiĝis esence la enhavo de la instruendaj scioj. En nia lernejo ĉiu infano lernas devige unu fremdlingvon, nome la rusan lingvon. Ekde la 7-a klaso ekzistas la ebleco laŭvole lerni duan fremdlingvon.

Celo de la tuta instruado estas la perado de moderna socialisma ĝenerala klereco, kiu ampleksas speciale la klerigadon kaj edukadon en la sfero de matematiko, natursciencoj, politekniko, ŝtatcivitanaj scioj, sociscienoj, moralo, gepatra lingvo, fremdlingvoj, estetiko kaj sporto.

Ni volas montri en kelkaj fakoj de la naturscienca instruado la laŭkvalitan kaj laŭkvantan diferencojn inter la instruplanoj, enkondukitaj en 1959, kaj tiuj de la iama elementa lernejo. Dum oni donis en la elementa lernejo de la 6-a ĝis la 8-a klaso entute nur ĉirkaŭ 200 instruhorojn en fiziko – tiel grava fako por la naturscienca klerigado – oni disponas nun en la dekklasa lernejo pri la 2,5obla da instruhoroj por tiu ĉi fako. Oni povis esence plivastigi la amplekson de la instrumaterialo kaj la laŭkvalitajn postulojn. En la instruplanojn oni enkondukis specialajn ĉapitrojn, kiujn oni antaŭe ankoraŭ neniam instruis en lernejo, vizitata de la plejmulto el la infanoj. En la fako ĥemio tio estas ekzemple ‚Perioda sistemo de la elementoj kaj atomstrukturo', ‚Organika ĥemio', en la fako fiziko ‚Bazaj leĝoj de la mekaniko', ‚Rotacio kaj gravito', ‚Atomfiziko' ‚Mezur-, stir- kaj regultekniko'. La eksperimenta laboro en la fakoj fiziko, ĥemio kaj biologio – kiel demonstrado kaj ankaŭ kiel praktika eksperimento de lernanto – havas firman lokon en ĉiuj klasoj de nia lernejo.

Je la fino ni volas ankoraŭ rimarkigi pri tio, ke en ĉiuj lernejoj oni instruas la fakon astronomio kaj ke la instruplano por la fako priarta edukado, ĉefe en la superaj klasoj, starigas ampleksajn bazojn por ĉiuflanka estetika klerigado.

(El „DDR-Revue" 3/68)
Trad.: Renate kaj Dieter Berndt

LA CELON VI KLARE JA VIDAS

La celon vi klare ja vidas,
por ke (do) ne eraru vi plu,
por ke vian taskon vi havu nun,
ĉar pli hele por ni suno nun brilu!
La mondo bezonas vin, kiel ĝin vi,
ne sen vi volas resti la mond',
la vivo estas belega melodi',
kamarad', kantu kun ni pri l' estont'!
Refr.: Por la homar'
la mondo, la suno,
gajaj la koroj,
brilas l'okul',
Prenas la manoj
ŝpatojn, martelojn,
forĝas la feliĉon
helpu karul'!

Kaj se vi jam kun ni ekiris,
vi rajtas returni ne plu,
ni ĉiuj kunstaru por paco kaj
amikeco, por bela evolu'.
Ĉar bezonas ni vin, same kiel vi nin,
vi, la fonto, el ĝi ĉerpas forton ni,
do, nur antaŭen, freŝigu nin,
kamarad', nun la vojon montru vi!
Refr.

Trad.: Ludwig Schödl

Familia Buĝeto

Familio kun multaj infanoj devas pli ol aliaj plani kaj disponi. La familia buĝeto de la familio *Pulwer* permesas enrigardi la en- kaj elspezojn.

Neta salajro de la patro	530 m.
Neta salajro de la patrino	428 m.
aldone meza vendiĝpartopreno	70 m.
Ŝtata infanmono	240 m.
Pago de la filo Uwe al la komuna mastrumomono	80 m.
	1 348 m.

Krome la familio povas disponi en la jaro meze pri 1 000 m. el kvaronjaraj kaj jarfinaj premioj. La premioj estas pagataj de la uzinoj pro bonaj laboratingaĵoj.

Monataj konstantaj elspezoj

Lupago por loĝejo	67,70 m.
Elektro kaj gaso	18,00 m.
Karbo	8,00 m.
Gazetoj/Revuoj	14,00 m.
Asekuro	12,00 m.
Terpomoj	8,00 m.
Manĝado de tri infanoj en lernejo	34,50 m.
Manĝado de la patro en uzino kaj de Detlef kaj Uwe	38,25 m.
Manĝado de la patrino en uzino	10,40 m.
Infanĝardena kotizo (tagmanĝo kaj lakto) por Peter	12,00 m.
Mastrumelspezo	480,00 m.
aldone dimanĉe	120,00 m.
Sapo, dentpasto, kosmetikaĵoj	25,00 m.
Partopago por kredito	50,00 m.
	897,85 m.

La restantaj proksimume 450 markoj elspeziĝas jene:
Sparaĵo por aĉetaĵoj kaj ferioj, poŝmono por la gepatroj, elspezoj por teatro, amuzaĵoj k.c.

Ĉiutage ordinare surtabliĝas:

Matenmanĝo por 8 personoj	
20 bulkoj, 1 glaso da marmelado, 2 litroj da lakto	= 3,36 m.
Vespermanĝo por 8 personoj	
4 funtoj da pano – unua kvalito	1,04 m.
250 g da butero	2,50 m.
250 g da margarino – unua kvalito	1,20 m.
400 g da kolbaso	4,00 m.
Fromaĝo	1,60 m.

(aŭ anstataŭ kolbaso – fiŝaĵo por 2,60 m.; anstataŭ fromaĝo – 8 ovoj por 2,40 m.; aŭ salaton kun pano, butero kaj margarino por 3,00 m.). Aldoniĝas pomonate elspezoj por faruno, sukero, salo oleo, fruktoj je 60,00 m. kaj dimanĉe 30,00 m. por viando. Meza elspezo por nutraĵoj potage 14,00 m.

Aĉetaĵoj de la familio Pulwer dum la pasintaj du jaroj

Vestaĵoj kaj ŝuoj proksimume 680 m., aŭtomata lavmaŝino 865 m., nova televidila bildvalvo 300 m., renovigo de la loĝejo 70 m., kurtenoj 56 m., biciklo por Kerstin 200 m., unua partopago por kredito 300 m.
Tri familianoj pasigis en 1967 du semajnan libertempon en feriejo de la Libera Germana Sindikata Ligo ĉe la Balta Maro. Ili pagis kune inkluzive la favorigitan veturkoston nur 200 m. Kvar infanoj restadis 17 tagojn en infantendaro feria, kie estis pagendaj entute nur 34 markoj.

(El „DDR-Revue" 3/68) Trad.: H. Eichhorn

Instrufakoj en la klasoj 1 ĝis 10 de la ĝenerale kleriga politeknika supera lernejo. Stato: lernjaro 1967/68

	Fakoj	Klasoj 1.	2.	3.	4.	5.	6.	7.	8.	9.	10.
Socisciencoj kaj lingvoj	Germana lingvo[1])	×	×	×	×	×	×	×	×	×	×
	Historio					×	×	×	×	×	×
	Rusa lingvo									×	×
	Civitanaj scioj					×	×	×	×	×	×
	Angla lingvo / Franca lingvo } laŭvole							×	×	×	×
Matematiko Natursciencoj	Matematiko	×	×	×	×	×	×	×	×	×	×
	Geografio					×	×	×	×	×	×
	Fiziko						×	×	×	×	×
	Biologio					×	×	×	×	×	×
	Ĥemio										
	Astronomio										×
Politeknika instruado	Metia laboro	×	×	×	×	×	×				
	Laboro en la lerneja ĝardeno	×	×	×	×	×	×				
	Kudrado			×	×						
	Enkonduko en la socialisman produktadon							×	×	×	×
	Poduktada laboro							×	×	×	×
	Teknika desegnado							×	×	×	×
	Sporto	×	×	×	×	×	×	×	×	×	×
	Muziko	×	×	×	×	×	×	×	×	×	×
	Desegnado	×	×	×	×	×	×	×	×	×	

Klasoj 1 ĝis 4 Instruado de germana lingvo konekse kun konatigo de la hejmregiono. Ĝi havas jenajn disciplinojn:
Hejmregionaj scioj
Legado
Ortografio
Skribado
Klasoj 2 ĝis 4 plus parola kaj skriba esprimo
Klasoj 3 kaj 4 plus gramatiko
Klasoj 5 ĝis 10 Literaturo
Parola kaj skriba esprimo
Ortografio kaj gramatiko

Lernojaro 1966/67

Nombro da gelernantoj	2 464 000
Nombro da geinstruistoj	131 750
Nombro da klasoj	92 233
Klasa frekventeco	26,7

(en la ĝenerale klerigaj dekklasaj politeknikaj superaj lernejoj, plivastigitaj superaj lernejoj, specialaj lernejoj kaj helplernejoj entute)

LA EVOLUO DE LA POPOLA EKONOMIO EN GDR EN LA JARO 1968 (Resumo)

La jaro 1968 estis jaro de gravaj decidoj kaj sukcesoj ĉe la formado de la evoluiĝinta socia sistemo de la socialismo en GDR. La laŭplana, kontinua politiko por plua ĉiuflanka plifortigo politika, ekonomia, kultura kaj defenda de nia respubliko estas cele daŭrigita en firma interligo kun Sovetunio kaj aliaj socialismaj fratlandoj.

Tio montriĝis en konstanta kresko de la nacia enspezo rilate al la antaŭa jaro je 5,3 procentoj aŭ 5 miliardoj da markoj. Ĉi tiu kresko sole rezultiĝas el la altiĝo de la laborproduktiveco. Al la altigo de la produktita nacia enspezo grave kontribuis la industrio per 70 procentoj kaj la konstruado per 13 procentoj. La planita kresko en la popolekonomia plano en ambaŭ sferoj estas superplenumitaj.

La investoj altiĝis je pli ol 10 procentoj.

En la industrio altiĝis la produktaĵoj je 6,1 procentoj.

La eksporto kreskis je 9 procentoj.

La produktiveco en la konstruado kaj konstrumuntado altiĝis je 8 procentoj.

La ŝtata produktado en produktaĵoj de bestoj altiĝis je 4,9 procentoj.

La vendokvanto de individua komerco kreskis je 4,7 procentoj.

La atingitaj sukcesoj en la socialista konkuro por la 20-a datreveno de la fondiĝo de la respubliko estas esprimoj de la prosperiga kaj diligenta laboro de ĉiuj laboristoj.

I Industrio

La industria produktado kreskis en la jaro 1968 je 6,1 procentoj rilate al la antaŭa jaro. La labora produktiveco de la laboristoj, teknikistoj kaj sciencistoj de la ŝtata industrio altiĝis je 6 procentoj, po laborhoro eĉ je 8 procentoj. Malaltiĝis, ekzemple: ĉe ligno je 8,6 procentoj kaj en la metalindustrio ĉe ŝtalo je 5,6 procentoj kaj ĉe ferofandaĵo je 14,9 procentoj.

II Scienco, tekniko kaj klerigo

Estas efike enkondukitaj multnombro de novaj produktoj, produktmetodoj kaj teknologioj kun alta ekonomia utilo.

En intereso de garantiigo por la scienca evoluo estas pli fortigita la celdestinita esplorado. Tio havas valoron por la fiksigo de longtempaj taskoj por ekfunkciigo de ĉefkomisiitaj uzinoj al kooperado de la esplorgrupoj, la kontraktan garantiigon de la laboragoj kaj reciprokaj devigoj kaj al pli raciiga formado de la kooperaciaj interrilatoj inter esplorado kaj industrio.

La efektivigo de la unueca socialista kleriga sistemo estas atingitaj pluaj progresoj je la evoluo al ĉiuflanke klerigitaj socialistaj homoj. En la jaro 1968 faris 182 400 gejunuloj lernkontrakton. Per tio eklernis kun premisoj por profesia lernado, 97,8 procentoj el ĉiuj gelernantoj absolvintoj de la ĝeneralklerigaj politeknikaj altlernejoj. 79 procentoj el ĉiuj gelernantoj absolvintaj la 8-an klason transiris en la naŭan klason de la 10-klasa altlernejo aŭ en la preparklason por la vizito de la gimnazio. 240 260 personoj sukcesis en profesiaj ekzamenoj, inter ĉi tiuj 80 200 en kvalifikaj kursoj por plenkreskuloj. Per tio laboras en la popola ekonomio 51 200 pli da faklaboristoj ol en la antaŭa jaro.

III Investoj

En la jaro 1968 estas investitaj 26,5 miliardoj da markoj, tio proksimume valoras la tutannacian enspezon de GDR en 1950. La kvanto de investoj altiĝis je pli ol 10 procentoj.

Ĉefcele estas investita por la scienca – teknika evoluo gravaj ekonomiaj branĉoj laŭ la prognoste fundamendita struktura politiko. Tio koncernas antaŭ ĉio por jenaj industribranĉoj: La elektronika, komputil- kaj oficejmaŝina industrio, la industrio de mezura-, direktila kaj reguliga tekniko, por kemiaj fibroj kaj plastindustrio kaj ankaŭ por maŝinoj prilaborantaj plastaĵojn kaj elastaĵojn, maŝinoj por konstruado, konstrumaterialo kaj maŝinoj por ceramikaĵoj kaj maŝinoj por terkulturado.

IV Konstruado

Plue altiĝis la laborkapableco kaj efektiveco en la konstruado. La produktado en konstruado kaj muntado kreskis je 8 procentoj, rilate al la antaŭa jaro, la produktiveco de laboro altiĝis je 5,2 procentoj.

La nova arkitektura reliefo de la urbcentroj pli kaj pli montras sin per la konstruo de altdomoj. Pluan mallongigon de la konstrutempo ebligas la enkonduko de la 77- taga teknologio, ĉe la konstruado de 10 etaĝaj loĝdomoj en Berlin.

Estis transdonitaj 76 200 novkonstruitaj loĝejoj. En la ĉefurbo Berlin kaj en la distriktoj Schwerin kaj Erfurt estas pli da loĝejoj finkonstruitaj ol planitaj.

V Terkulturado kaj ekonomio de nutraĵoj

Elstarajn sukcesojn atingis la laboristoj en la socialista konkuro por plialtigo de la produktado en la terkulturado kaj ekonomio de nutraĵoj. Antaŭ ĉio ili atingis tion per intensivigo de la terkultura produktado, per la transiro al industrieca organizado kaj estrado kaj per la evoluo de multflankaj kooperativaj interrilatoj. La loĝantaro povis esti prizorgata pli regule kaj amplekse per altkvalitaj nutraĵoj el la propra produktado.

En vasta movado por kvalifikado la laboristoj akiras la necesajn sciojn por la organizado de plej perfekta industrieca terkulturado kaj ekonomio de nutraĵoj. 40 procentoj el ĉiuj laboristoj en la socialista terkulturado havas ekzamenan ateston en iu ajn profesio.
Plue estas kompletigita la materia-teknika bazo de la terkulturado. Por ankoraŭ plue raciigi kaj faciligi la laboron, la industrio kreis la premisojn por tio, per la liverado de 11 030 da traktoroj, de ĝi 4 825 de la tipo ZT 300, 739 da falĉdraŝmaŝinoj, 863 da terpomrikoltiloj, 306 da maŝinoj por selektado de terpomoj kaj aliaj.
La ŝtata produktado en bestproduktaĵoj altiĝis je 4,9 procentoj. La plano estas sukcese plenumita en ĉiuj sortimentoj.

VI Transporto

En la pasinta jaro atingis la kvanto de transportitaĵoj 672 milionojn da tunoj kaj altiĝis per tio rilate al la jaro 1967 je 3,9 procentoj. Ekfunkciiĝis la Container – trafiko per la kreo de centroj en Berlin, Dresden, Rostock, Leipzig kaj Karl-Marx-Stadt. La transportsistemo iĝis per tio pli efika kaj kontribuis por la mekanikigo de la transporto kaj transŝarĝo en la tuta trafiko kaj en ĉiuj ceteraj branĉoj de la popola ekonomio. Laŭplane evoluiĝis la labordivido inter surrela trafiko kaj surstrata trafiko.


VII Ekstera ekonomio

Pli intense estas utiligataj la avantaĝoj de la socialista internacia labordivido en kadro de la ekonomia asocio inter la membrolandoj de la organizo por Reciproka Ekonomia Helpo. La vendado sur internacia merkato altiĝis. La eksporto kreskis je 9 procentoj. Al pli rapida evoluo de interŝanĝo de komercaĵoj kun USSR kontribuis la plua interplektiĝo kun la potenco de la soveta industrio kaj scienco.
Altiĝis la eksporto kaj importo. La importo ebligis la efektivigon de grandaj projektoj por raciigo kaj aŭtomatigo en GDR. La eksporto en la aliajn membrolandojn de la organizo por Reciproka Ekonomia Helpo kreskis je 11 procentoj.
Per plua altiĝo de la liveroj en la Demokratan Respublikon Vietnamio, GDR helpis al la heroe batalanta popolo de Vietnamio en sia batalo kontraŭ la atako de Usono. Intensiviĝis la komercaj interrilatoj kaj scienca – teknika kunlaboro kun vico da evoluiĝantaj landoj, ekz. Surio, Unuiĝinta Araba Respubliko, Irako, Alĝerio kaj Birmo. En la komerco kun la kapitalistaj industrilandoj antaŭ ĉio altiĝis la interŝanĝo de komercaĵoj kun Svedio, Norvegio kaj Japanio.

VIII Evoluo de la vivnivelo

Plene realiĝis en la jaro 1968 decidoj por plua plibonigo de la labor- kaj vivkondiĉoj, ekz.: La kvin-taga laborsemajno, la altigo de minimumaj salajroj kaj de minimuma forpermeso, la plibonigo de la sociaj cirkonstancoj de familioj kun multaj infanoj kaj por la pensiuloj.
Rilate al la antaŭa jaro altiĝis la enspezoj de la logantaro je 3,9 miliardoj da markoj respektive 4,9 procentoj. Altan kreskon atingis je tio la pagoj de premioj por laboristoj kaj oficistoj per 33,1 procentoj kaj la pago de rentoj per 8,0 procentoj.
La spezo de la privata komerco estis entute 57,9 miliardoj da markoj. Ĉe nutraĵoj kaj frandaĵoj kreskis la spezo je 4,6 procentoj kaj ĉe industriaj produktoj je 4,9 procentoj.
Klare respegulas la kontinuan evoluon de la enspezoj kaj de la spezo de individua komerco la stabileco de valuto kaj socia sekureco en nia socialisma ŝtato. Tio montriĝas en la altiĝintaj ŝparsumoj. Po persone estas meznombre ŝparitaj 273 da markoj kaj sekve 21 da markoj pli multe ol en la jaro 1967.
La plimulto de libertempo pro la kvintaga laborsemajno estas uzita de la loĝantaro por pli ofta partopreno al kulturaj aranĝoj. La vizitoj de teatroj kaj koncertoj altiĝis je 229 000 al 14,5 milionoj da personoj, la vizitoj de filmteatroj je 4 milionoj al pli ol 103 milionoj, tio estas altiĝo de 4 procentoj.
La ministra konsilantaro alvokas ĉiujn laboristojn plenumi novajn elstarajn agojn en la socialisma konkuro je honoro por la 20-a datreveno de fondiĝo de GDR. Tio servas al plua fortigo de GDR kaj al la socialisma landaro, per tio ĝi estas grava kontribuo por la garantiigo de paco.
(Resumo el la komunikaĵo de la ŝtata centra ofico por Statistiko.)

Trad.: Kolektivo de esperantistoj en Dresden



Preventi estas pli bone ol sanigi



La urseto helpas la medicinan esploron.
Foto: Zentralbild

Kiom kostas al la laboristo la socia sekureco? Ne ekzistas asekuritoj en dua aŭ tria klaso, ne asekuro por preferatoj aŭ malriĉuloj. Ankaŭ ne estas medikamentoj, kiujn kuracisto ne rajtas preskribi aŭ nur en limigita kvanto, ĉar ili estas „tro multekostaj" por la asekuro. En GDR kun ĝia unueca sistemo de sociasekuro estas neeble, ke kuracisto diferencas inter siaj pacientoj. La rezulto: La malsanoj maloftiĝas.

- En 1950 ankoraŭ malsaniĝis inter 10 000 ŝtatanoj de GDR 50 je tuberkulozo, 1966 nur estis 8. En okcidenta Germanio en 1965 kontraŭe malsaniĝis 43 inter 10 000 je tbk.
- La poliomjelito estas tutforigita el GDR de post 1963. De post 1962 neniu akuŝintino mortas je puerpera febro.

Senkosta kuracista helpo, tio estas memkomprenebla, same la principo radikanta en artikolo 35 de la konstitucio: „Ĉiu ŝtatano de la Germana Demokratia Respubliko havas la rajton je protekto de sia sano kaj sia laborforto." Realigi tiun ĉi rajton kostas mono, multe da mono. Kaj tial ĉirkaŭ kvarono de la ŝtatelspezoj servas por sanecaj kaj sociaj celoj. La ŝtataj krompagoj por la sociasekuro havis la rezulton, ke hodiaŭ

- ekzistas 757 malsanulejoj kun pli ol 206 000 litoj. Tio signifas, ke por 10 000 loĝantoj estas disponeblaj 121 hospitallitoj. En okcidenta Germanio kontraŭe estas nur 106;
- po 740 homoj en GDR estas unu kuracisto. En la Germanio de 1939 estis unu kuracisto nur po 1553 personoj.

La ŝtataj alpagoj krome kondukas al la realigo de la principo „preventi estas pli bone ol sanigi".


Tiel ĉiu ŝtatano partoprenas unufoje pojare en rentgenkontrolesploro de la torako, kiu ebligas fruan ekkonon de tuberkulozo kaj bronka karcinomo. Ĉiu virino rajtas partopreni la regulan serian esploron por la fruekkono de la uterkarcinomo kaj aliaj neoplasmoj.

Inter la devigaj inokuloj por preventi infektajn malsanojn estas vakcinadoj kontraŭ variolo tuberkulozo, poliomjelito, tetano, difterio kaj kokluŝo ĉe etinfanoj. Kaj kiom pagas la unuopaj ŝtatanoj por tio?

La leĝa asekurdevo validas por ĉiuj laborantoj de GDR. Por malsan-kaj rentasekuro ili pagas 10 % de la plensalajro. Kromajn 10 % devas pagi la salajranto. Sed kotizdeva nur estas salajrosumo ĝis 600,– markoj. La plej alta monata kotizo do estas – neŝanĝite post 1945 – 60,– markoj. Faklaboristo ekzemple, kiu akiras 900,– markojn, pagas en GDR 60,– markojn da asekura kotizo. Per tio ankaŭ liaj nelaborantaj samfamilianoj estas asekuritaj. Kuracista helpo, medikamentoj, sanatoriado kaj la cititaj seriaj esploroj kaj inokuladoj estas senkostaj ankaŭ por ili. Se la asekurito mem malsaniĝas, li ricevas dum 6 semajnoj pojare malsanulmonon kaj la salajrodiferencon sumiĝantajn al 90 % de la neta laborakiro. Al laborantoj kun du aŭ pli da infanoj oni eĉ pagas ĝis la 13a semajno 65 ĝis 90 % de la neta salajro. „Ĉiu ŝtatano de la Germana Demokratia Respubliko havas la rajton je protekto de sia sano kaj laborforto."

Tiu ĉi konstitucia principe speguliĝas ankaŭ en la perspektivplano ĝis 1970 de GDR. Laŭ tio la entreprenoj havas la devon „utiligi la materiajn eblecojn por evoluigi produktadon kaj teknikon tiamaniere, ke la akirita progreso sur tiuj terenoj enhavas la garantion de senakcidentaj kaj laborhigiene korektaj laborkondiĉoj". Tiu leĝo ordonas al la lokaj ŝtatoficoj, . . . „zorgi, ke la entreprenoj realigu la aranĝojn leĝe fiksitajn resp. necesajn por plue malpliigi kaj forigi malpurigadon de aero kaj akvo".

(El „Visite" 12/68) Trad.: Dr. Peter Ruff



Artefarita reno el GDR. GDR estas en Europo la dua ŝtato kun reto da terapeŭtikaj centroj havantaj artefaritajn renojn.
Foto: Zentralbild

D-ro Helmut Pielasch

La prizorgo de la blinduloj en GDR

Nia blindulaferaro havas pli ol 150-jaran tradicion; jam en 1806-a j. estis fondata la unua germana blindulejo en Berlin, post kiu jam en 1809-a j. sekvis la ejo en Dresden.

En 1957-a j. estis fondata la Ĝenerala Germana Blindulligo, demokratia organizaĵo, kiu en siaj vicoj unuigas viddifektulojn sen diferenco de la politika kaj religia opinioj.

En la Germana Demokratia Respubliko vivis en 1965-a j. 28 350 blinduloj. Ĉiu blindulo ricevas post finiĝo de la 16-a vivjaro kaj sendepende de sia akirita salajro aŭ aliaj enspezoj blindulmonon. Krom tio ĉiu blindulo ricevas sian invalidan renton, tiel ke sia vivteno estas sekurigita. La rento estas donata sendepende de la fakto, ĉu la blindulo ricevas enspezojn el laboro aŭ aliaj fontoj. La ŝtataj kaj sociaj institucioj klopodas peri al ĉiu laborserĉanta blindulo laboron, kaj la 12 blindulkooperativoj kapablas provizi ĉiun blindan virinon kaj ĉiun blindan viron per laboro en laborejoj aŭ hejme .Ekde 1960-a j. blindaj absolvintoj de altlernejoj aŭ blinduloj en estrantaj pozicioj en administro aŭ ekonomio ricevas vidantajn subtenulojn, kies salajrojn devas pagi la entreprenoj aŭ respektivaj institucioj. Ankaŭ ne restu malmenciite, ke la blinduloj kaj iliaj akompanantoj estas ekspedataj senpage per ĉiuj proksimdistancaj transportiloj inkluzive de aŭtobusoj. Per ĉi ĉiuj socialaj disponoj nia respubliko okupas unu el la antaŭaj lokoj rilate al la zorgado por la blindaj ŝtatanoj.

En la Germana Demokratia Respubliko ekzistas du blindullernejoj, kiuj akompanas ilin de la suĉinfanejoj ĝis la abiturienta ekzameno. En tri rehabilitadcentroj junuloj kaj malfrueblindiĝintoj estas instruataj en la klasikaj blindulprofesioj kaj ankaŭ kiel remburistoj, industrilaboristoj, artmetiistoj, stenotipistoj, telefonistoj kaj masaĝistoj.

Dum la somero de 1968-a j. la unua kurso por blindaj programistoj estas finita sukcesplene, kaj pluaj sekvos. La Germana Centra Librejo por Blinduloj en Leipzig estas kompetenta por la kultura prizorgado de la blinduloj. Ĉi tie estas transpresataj brajlen kaj surbendigataj pojare 100 000 paĝoj de normala preso (nigrapunkta skribo). La sonbenda librejo disponas pri 2 300 verkoj kaj dissendas senpage kvar sonbendajn revuojn al ĉiuj interesuloj. La brajlskriba pruntlibrejo posedas 4 400 verkojn de la beletristika kaj scienca literaturoj kaj 6 300 muzikaĵojn. La editeja fako ofertas 1 200 verkojn por la aĉeto, inter kiuj estas grandaj vortaroj, sciencaj verkoj el diversaj branĉoj, operaj tekstoj, reliefoj kaj tabularoj. Ĉiuj verkoj en aĉeto kostas ne pli ol la normala prezo de la normalpresita eldono en la librovendejoj. 14 gazetoj trovas siajn legantojn inter la lernantoj, virinoj, literaturamikoj, masaĝistoj, telefonistoj kaj stenotipistoj, muzikistoj, ŝakamatoroj kaj surdblinduloj. La gazeto de la esperantistoj estas nia plej juna publikaĵo. La germanlingvaj gazetoj estas presitaj en la germana mallongiga skribo. La plenskribo nur estas uzata por vortaroj kaj malmultaj verkoj de la beletristiko. La plej grandan nombron de legantoj havas la organo de nia blindulligo „Die Gegenwart“ (La Estanteco), kiu aperas monate normalpresita, brajla kaj sur sonbendo.

La multaj laboroj por la blinduloj kaj malfortevidantoj estas gvidataj kaj koordinataj de la Ĝenerala Germana Blindulligo. La ĜGB estas la mandatita parolanto de ĉiuj viddifektuloj en GDR kaj la partnero de la ŝtataj institucioj. Ĝi vivtenas en kunlaboro kun la sociala asekuro 5 blindulripozejojn, en kiuj pojare 4 500 blinduloj kun iliaj akompanantoj trovas senpagan ripozon. Plue, ĝi disdonas subvenciojn por aĉeto de radio- kaj sonbendaparatoj, de specialaj blindulhelpiloj kiel skribmaŝinoj kaj laborhelpiloj por metiistoj.

La Ĝenerala Germana Blindulligo havas vendejon por blindulhelpiloj en Dresden, mekanikan laborejon por blindulhelpiloj en Leipzig kaj du dresejojn por blindulgvidhundoj.

La laboro de ĜGB estas laŭdata kaj nacie kaj internacie. Ĝi estas membro de la mondkonsilantaro por la bono de la blinduloj (WCWB).

Dum la 11 jaroj de sia estado ĜGB akiris rimarkindajn sukcesojn, tamen multe restas por fari. Aktuale ni serĉas vojojn, por plibonigi prizorgadon de malfortevidantoj kaj por envicigi ilin en la ligon. Ni ankaŭ serĉas novajn formojn de la kultura laboro. Ni orientigas niajn kooperativojn je la kunlaborado kun industrio kiel kooperaciuloj kaj finproduktantoj, por venki malvastecon de la klasikaj blindulprofesioj de bros- kaj korbfaristoj. Ni studas nuntempe la internaciajn spertojn sur la kampo de rehabilitado, por pli efektive prepari la novblindiĝintojn je la vivo en la socio.

Fine estas nia strebado, pli profunde ol ĝis nun utiligi la internaciajn spertojn sur la kampo de la malfortevidanta kaj blindula aferaro. Por akceli tion, ni vivigis informejon, kiu posedas jam 3 000 historiajn kaj modernajn verkojn pri la blindulaferaro kaj abonas 100 ĵurnalojn.

En nia Esperanta Revue ni raportos daŭre pri niaj sukcesoj kaj problemoj. Pri tio ni ne prisilentu, ke ni devas solvi grandajn problemojn, ĉar de jaro al jaro nia vivo ŝanĝiĝas per la sciencteknika revolucio, kiu ankaŭ koncernas la blindulojn. Sed ni aliras ĉiujn demandojn optimisme kaj estas konvinkitaj, ke ni solvos ilin en bona kunlaboro inter la Ĝenerala Germana Blindulligo kaj ĉiuj ŝtataj institucioj kaj sociaj fortoj.


Trad.: Günter Heil (blindulo studento)



La blinda skulptisto Dario Malkowski
Foto: Zentralbild

Blindula gazeto el GDR en Esperanto!

Eldoniĝis la unua numero de nova blindula gazeto „L'Amikeco“, kiu regule aperos en GDR. Ĝi enhavas interesajn artikolojn pri la vivo de la blinduloj en GDR kaj aliaj landoj. Interesuloj petu la provekzempleron de: Deutsche Zentral-Bücherei für Blinde, DDR–701–Leipzig, Gustav-Adolf-Straße 7



OLIMPIKA ORO EL MEKSIKIO

Vizaĝoj, ridantaj kaj ĝojbrilaj, elegantaj vestoj kaj kostumoj, gaje mansvingante – tiel la partoprenintoj del la Olimpiado el Germana Demokratia Respubliko enmarŝis en la Estadio Olimico de Mexico-City. Ili feliĉis, ĉar la unuan fojon ili reprezentiĝis samrajtaj kaj memstaraj kun propra olimpiada teamo kiel ĉiuj aliaj nacioj. Ili fieris, ĉar ili jam estis ricevintaj la unuan oron medalon, unu tagon antaŭ la inaŭguro de la XIX-oj Someraj Olimpikaj ludoj, antaŭ ol estas ekkrakinta la unua startpafo . . .

Unu tagon antaŭ la inaŭguro, tio estis la 12-a de oktobro 1968, la Kongreso de la Internacia Olimpika Komitato decidis kun 44 kontraŭ 4 voĉoj, ke la sportuloj de Germana Demokratia Respubliko povos estonte reprezentiĝi senobstakle kaj kun ĉiuj suverenoj rajtoj. Tio signifas kun propraj ŝtatflago, nacia himno kaj emblemo, kiel ankaŭ kun la korekta titolo ŝtata „Germana Demokratia Respubliko".

Tiu realisma kaj prudenta decido elvokis fortajn protestojn de okcidenta Germanio.

La ministro por internaciaj aferoj de Bonn, Benda, titolis la decidon „tre malafabla ago". La registaro en Bonn rifuzis doni la kutimajn skribajn garantiojn por la okazigo de la XX-aj Olimpikaj Ludoj 1972 en Munkeno. Ĉeffunkciuloj de politiko kaj sporto akceptis la decidon de IOC per torento da kalumnioj. La parolanto de la registaro, Diehls, deklaris: „Ne estas neglektende, ke la realigo de la IOC-decido sur la tereno de Federacia Germana Respubliko aktualigas serion da por ni gravaj politikaj kaj eble ankaŭ juristaj problemoj. Tielrilate la decido de la federacia registaro pri tiu problemo ankaŭ havos signifon por IOC".

La Hamburga „Welt" (Mondo) formulas ankoraŭ pli klare kaj agresive: „Se jam mankas politika kompreno al IOC, eble imponos al ĝi la kompakta minaco, ke ĝi devas serĉi 4 jarojn antaŭ la okazdato novan organizanton de la Ludoj 1972."

Sed tiu kalumnia kampanjo ne povis damaĝi la reputacion de la Germana Demokratia Respubliko en la internacia sportmondo. Male. *Jesse Owens* (USA), la kvarfoja olimpika ĉampiono de 1936 en Berlin deklaris: „Mian gratulon! Sendube tio estas sukceso por la olimpika ideo, kiu garantias al ĉiu la saman rajton sen diferenco je rasoj, relegioj kaj politiko".

Kaj instigitaj de tiu morala ormedalo la olimpiadaj gepartoprenantoj de GDR konkurbatalis tiel bone kiel neniam ajn antaŭe. Elstara olimpika ĉampiono estis la 17 jara *Roland Matthes*. Li venkis en la dorsnaĝado je 100 m kaj 200 m, ambaŭ distancojn en olimpika rekordo de 58,7 sek. respektive 2:08,6 min. Kiel startulo de la 4 × 100 m – pozicio-grupo li eĉ starigis novan mondrekordon per 58,0 sek. kaj venkakiris aldone arĝentan medalon kune kun liaj grupkamaradoj el GDR.

En la malpeza atletiko la nova mondrekordo en la pelado de kugloj far virinoj (19,61 m) estis unu el la sensacioj dum la Ludoj. *Margitta Gummel* (GDR) akiris la ormedalon, kvankam nur post forta batalo kun *Marita Lange* (GDR), kiu eĉ superis per 18,78 m la ĝis tiam ankoraŭ validan malnovan mondrekordon (18,67 m) de la soveta eŭropa ĉampionino *Madeshda Tschishowa*.

La GDR-teamo olimpika revenis hejmen kun 9 ormedaloj kaj estis kore akceptita de la loĝantaro. En Dresden oni spaliris kiam hejmenvenis la ora „kvaropulo" *Frank Forberger, Dieter Grahn, Frank Rühle* kaj *Dieter Schobert*. Ili jam de post kelkaj jaroj ĉefpozicias kun la „kvaropulo sen direktilisto" kaj aldonis al ilia titolo de monda ĉampiono ankaŭ olimpikan venkon.

Surprizo estis la dua ormedalo por remado, kiun akiris *Jörg Lucke* kaj *Heinz-Jürgen Bothke* el Berlin en dupersona boato sen direktilisto. En neoficiala gradlisto laŭ landoj la sportuloj de GDR akiris 238 pointojn. Post USONO kaj Sovetunio ili pozicias kiel tria, kio donis al la 17 miliona popolo la reputacion de „Sportlando".

Ne senbaza estas tiu honora titolo. Tagon antaŭ la ekveturo de la GDR-teamo olimpika al Meksikio la ŝtatkonsilantaro de GDR kaj la popola parlamento faris decidon pri la perspektivoj de la fizika kulturo kaj sporto ĝis 1980.

„La sporta sinokupo de milionoj da civitanoj estas viva esprimo de la humanisma kulturpolitiko de nia socialisma ŝtato", deklaris Walter Ulbricht. Meksikio 1968 estis la internacia kvalitsigno por la sporto en GDR.

Wolfgang Gitter
Trad.: D. Blanke

Gabriele Seyfert iĝis mondĉampionino en glitartkurado 1969 en Colorado-Springs (USONO). (Bildo supre)
Foto: Zentralbild

Margita Gummel akiris oran medalon por GDR (maldekstre) kaj Marita Lange arĝentan en pelado de kugloj.
Foto: Zentralbild





Apelacio el Helsinki

La sekureco de Eŭropo postulas tujan agnoskon de GDR

La konferenco pri la signifo de agnosko de GDR por la Eŭropa sekureco, okazinta en Helsinki, kiun partoprenis deputitoj, sindikatistoj, juristoj, verkistoj kaj instruistoj el 15 Eŭropaj landoj,
– konscias pri la danĝero por la sekureco en la mondo, kiu rezultas el neagnosko de la status quo en Eŭropo,
– opinias, ke la konstanta rifuzo de kelkaj Eŭropaj registaroj normaligi la rilatojn kun ambaŭ germanaj ŝtatoj sur egalrajta bazo kaj la arogo de unu el tiuj ŝtatoj je sola reprezentado de la germana popolo estas serioza malhelpo por malstreciĝo,
– alvokas ĉiujn ŝtatojn, agnoski la netuŝeblecon de la limoj de ambaŭ germanaj ŝtatoj,
– postulas, ke ambaŭ germanaj ŝtatoj aliĝas la kontrakton pri maldisvastiĝo de nukleaj armiloj,
– postulas la akcepton de ambaŭ germanaj ŝtatoj en la Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizaĵoj,
– apelacias krome al la parlamentoj, registaroj, politikaj partioj kaj aliaj sociaj organizaĵoj plenforte subteni ĉiujn agadojn, kiuj celas estigi normalajn rilatojn kun ambaŭ germanaj ŝtatoj surbaze de samrajteco kaj reciproka agnosko, por sekurigi daŭran pacan ordon en Eŭropo.
Ĝi turnas sin al ĉiuj opiniformigaj iloj intense prosperigi la celojn de tiu ĉi konferenco.

(El „DDR-Revue" 8/68) Trad.: H. Eichhorn

„Kion vi scias pri Germana Demokratia Respubliko kaj ties pacpolitiko?"

La esperantistoj de GDR alvokas la esperantistojn de la tuta mondo sendi iliajn opiniojn al Centra Laborrondo Esperanto de GDR, DDR–108 Berlin, Charlottenstr. 60.
Ĉiu sendinto ricevos 250 paĝan esperantlingvan, riĉe ilustritan libron kun la titolo „Germana Demokratia Respubliko, faktoj kaj bildoj".

Komerca konsilisto Rudi Graetz

IMPRESOJ EN ARABAJ LANDOJ

KIEL GVIDANTO DE DELEGACIOJ AL FOIROJ KAJ ESPERANTISTO

De la 20a de oktobro ĝis la 20a de novembro 1968 okazis en Kairo unuafoje Internacia Industrifoiro. Ĝi ne nur fariĝis granda sukceso por la Unuigita Araba Respubliko, sed ankaŭ por la partoprenintaj 22 aliaj landoj.
Trairinte la Centran Pavilonon kaj la aliajn, kie ekspozis la industrio de UAR, mi miris pri la multaj kaj bonkvalitaj ekspozajoj de tiu ĉi lando kaj pri la grandioza dekoracio. Tiu ĉi ekspozicio montris, ke la industrio en la UAR dum la lastaj jaroj rapide kreskis kaj ke la homoj tie estas tre lertaj en siaj fakoj, kiel arkitektoj, metiistoj ktp. (Mi persone spertis la saman lertecon ankaŭ ĉe araba dentkuracisto, kiu faris sian laboron bonege). Mia konvinko estas, ke per tiaj inteligentaj arabaj homoj la lando kun siaj 33 milionoj enloĝantoj ankaŭ estonte en ĉiu rilato rapide progresos kaj evoluos, kvankam Israelo konstante minacas per nova agreso.
Kiel aliaj landoj ankaŭ GDR partoprenis kiel ekspozanto en Kairo. GDR partoprenas en Internaciaj Foiroj por montri kiel unu el la unuaj dek industrinacioj de la mondo siajn modernajn maŝinojn, aliajn fabrikaĵojn kaj produktojn. Samtempe la foiroj servas por pli profundigi la jam ekzistantajn amikajn rilatojn kun UAR kaj aliaj landoj kaj por gajni novajn komercajn rilatojn.
Ankaŭ en Kairo GDR montris, kiajn specialaĵojn oni produktas en nia respubliko. Kaj nia partopreno fariĝis en ĉiu rilato sukceso por GDR.
Kiel solviĝas la lingva problemo dum foiroj? Por intertraktadi kun arabaj personecoj necesas ofte arabaj tradukistoj, kiuj scipovas la germanan lingvon. En UAR ankaŭ inter komercistoj eblas uzi la anglan lingvon por interkompreniĝi.
Ĉiu, kiu parolas Esperanton, scias ke per ĝi eblas senpera kompreniĝo. Memkompreneble estas, ke GDR-esperantisto dum vizitoj en eksterlando utiligas la eblecon diskonigi al tieaj esperantistoj la evoluon kaj la sukcesojn de GDR dum la pasintaj dudek jaroj. La esperantistoj en UAR estas, same kiel en aliaj arabaj landoj, gastamaj kaj amikemaj. Ili parolas bonan esperanton kaj pro tio eblas ankaŭ interŝanĝi siajn pensojn tre profunde. Esperantistoj tial pli bone ekscias pri la sentado de la koncernaj popoloj ol homoj, kiuj bezonas tradukiston aŭ utiligas fremdan nacian lingvon kiel ekzemple la anglan aŭ francan. Mi mem ofte tion spertis.
En la centro de la urbo mi ankaŭ trovis librejon, kie mi povis aĉeti la esperanto-araban vortaron de d-ro Nassif Isaac. Mi eniris la vendejon kaj demandis pro esperanto-lernolibro. Ĝentila respondo, ke tia ne estas havebla, sed mi povus havi esperanto-araban vortaron.
La evoluo de la ekonomia kaj kultura vivo en arabaj landoj dum la lastaj jaroj faris grandajn videblajn progresojn. Per tio ankaŭ por la disvastigo de la uzado de esperanto en tiu ĉi landoj nun ekzistas bonaj kondiĉoj. Tial la eldono de la esperanto-araba vortaro estis tre grava. Espereble la eldonado de lernolibro baldaŭ sekvos.
Por esperanto-parolanto eblas pli profunde konatiĝi kun la kulturo kaj la moroj de aliaj popoloj. Tiamaniere mi havis la eblecon konatiĝi kun la alta kulturo de la arabaj landoj, kiel ekzemple kun la riĉa kultura kaj libra trezoroj de la pasintaj jarcentoj en Irako aŭ kun la moderna popolarto kaj folkloro en Kairo. Ĉu estis en Libio, Libano aŭ alia araba lando, ĉiam denove mi miris pri la lerteco de la metiistoj, kiuj produktas verajn artaĵojn.
Neforgesebla estas por miaj gekolegoj kaj mi vespero en la „Opero" en Kairo, al kiu invitis nin tieaj esperantistoj. Unuaranga prezentado de arabaj dancoj kaj kantoj, facile kompreneblaj ankaŭ por eŭropanoj. Por tiu ĉi alta araba kulturo ni eksentis plenan simpation.
Similajn kulturajn travivaĵojn mi havis dum la lastaj jaroj en Libio kaj Suria Araba Respubliko. Gekolegoj de mi ankaŭ tre laŭdas tiajn okazaĵojn en

GDR ekspozis en la foiro de Kairo. Artefarita reno estis multe rigardata de fakuloj. Komerca konsilisto R. Graetz (mezo, duo vico) donas informojn.
Foto: Zentralbild

Israelaj agresoroj surprizatakis la flughavenon de Beirut (Libanon) detruante 13 civilajn aviadilojn. Damaĝo: 100 milionoj da libanezaj funtoj. (Bildo dekstra flanko)
Foto: Zentralbild





Libano, kie mi ankoraŭ ne havis la eblecon partopreni tiajn aranĝojn. Vizitendaj estas en ĉiuj arabaj landoj la muzeoj. La unuan araban, kiun mi vizitis 1965, estis la Nacia Muzeo en Damasko. Surprizis min la amplekso de la antikvaj objektoj kaj la zorgema flegado, plene kompareblaj kun niaj muzeoj. La saman bildon mi pli poste ankaŭ trovis en aliaj muzeoj de arabaj landoj. Grava ankaŭ estas la vizito de elfositaj malnovaj urboj kiel ekzemple Babilono, Palmiro kaj aliaj.

La vivo en la arabaj landoj ankoraŭ estas pena. Ankoraŭ ekzistas la sekvoj de la kolonia tempo, ekzemple malriĉeco kaj analfabeteco. Tamen per la klopodoj de la registaroj tio malaperas pli kaj pli.

Feliĉe ne ekzistas signoj de ia rasismo. Diverskoloraj ĉarmaj infanoj komune vizitas la malnovajn kaj novajn lernejojn, portante komunajn lernejvestaĵojn. Ili ludas kune en publikaj ludejoj kun balanciloj, stangoj, grimpejoj ktpl., same kiel niaj infanoj. Ankaŭ la plenkreskuloj komune babilas, agas kaj laboras. Mi ankaŭ ne trovis malamon kontraŭ judoj. Do mankas ia rasismo.

Ne ŝatata estas la sinteno de la imperiismo nek la israela, nek la usona nek la okcidentgermana. Ĝenerale mi trovis la deziron de politika solvo de la sekvoj de la israela agresado, kiel je la 22a de novembro 1967 decidis la Konsilantaro por Sekureco de UNO, inter alie, ke la israela armeo retiriĝu de la arabaj teritorioj, okupitaj dum la agreso 1967. Tamen la senĉesa agresado flanke de Israelo devigas la Arabajn Popolojn organizi siajn fortojn por esti defendpretaj kontraŭ pluaj atakoj de la israelaj agresemuloj. Eĉ Libano amare devis sperti tian neceson, kiam Israelo fino de la jaro 1968 subite surprize atakis la flughavenon de Beirut kaj detruis tie 13 civilajn flugmaŝinojn. Tiu bruta agreso eĉ malfermis la okulojn de honestaj homoj en okcidentaj landoj, kiuj ĝis tiam pli aŭ malpli kredis la misinformadon per israelaj, okcidentgermanaj kaj similaj alilandaj amasmedioj.

Sed Israelo ankaŭ rekte devis sperti la sekvojn de la fiatako kontraŭ Libano per la decido de Francio, ne plu liveri armilojn al Israelo. Francio aktive subtenas la rezolucion de la Konsilantaro por Sekureco de la 22a de novembro 1967 pri la retiriĝo de la israelaj okupantoj el la okupitaj arabaj teritorioj. „Neplenumo de tiu ĉi rezolucio nur povus pli akrigi la konflikton."

Pro la konstanta agresado de Israelo kreskas la rezistado de la Araboj. La kunlaboro inter la Arabaj Landoj plifortiĝas. Kiel konate, la simpatio de GDR estas sur la flanko de la Arabaj Landoj. Ni subtenas ilian batalon por ilia sendependeco. Konstante evoluiĝas la ekonomiaj rilatoj. GDR helpas al la industria evoluo de la Arabaj Landoj kaj al la ekonomia fortiĝo.

Intertempe forpasis du jaroj depost la 5a de junio 1967, la tagon, kiam la israela agreso komencis kontraŭ la arabaj popoloj. Depost tiu ĉi tempo Tel Aviv kontraŭstaregas la UNO-rezoluciojn por paca regulado de la konflikto. La imperiismaj rondoj de Israelo ne estas interesataj en paca solvo, tion montras la perfortaj atakoj, kiuj daŭris ĝis nun. Tion ankaŭ montras la koncepto de la konkerinto nenion redoni el la rabaĵo. Tion publike elparolis la israela militministro Dayan en januaro 1969 per televida intervjuo en Usono: „Ni ne revenos al la limoj de junio 1967, eĉ ne, se tio kondukus al la paco." Tio estas ludado per fajro, se ĝi iutage denove ekbruliĝus, ĝi povus havi eksplodajn sekvojn kaj povus danĝerigi ne nur la pacon en Proksima Oriento.

Pro tio ĉiam denove Sovetunio postulis reprenon de la trupoj de la agresanto kaj forigi la sekvojn de la agreso. Tio signifas realigi la rezolucion de la Konsilantaro por Sekureco de UNO.

Jam en la unua minuto de la atako GDR staris solidare ĉe la la flanko de la arabaj popoloj. La Ministra Konsilantaro de GDR tuj post komenco de la agreso deklaris, ke la Registaro de GDR akre kondamnas la israelan agreson. Emfaze ĝi postulis tujan finigon de la agresa agado kaj retiriĝon de la israelaj trupoj al iliaj eliraj pozicioj.

La Registaro de GDR esprimis sian plenan solidarecon al UAR, SAR, Irako, Alĝerio kaj la aliaj arabaj ŝtatoj, en la defendo de iliaj nacia libereco, suvereneco kaj digno. Ĝi faros ĉion, kio eblos por la finigo de la agreso kaj por la restarigo de la paco.

Tuj post la komenco de la fiatako, la 7an de junio 1967 la Libera Germana Sindikata Ligo (FDGB) solidare donis unu milionon markojn al UAR. Post la unua GDR-aviadilo kun solidaraĵoj en valoro de tri milionoj markoj al la Suria Araba Respubliko rapide sekvis aviadiloj al Kairo, Damasko, Bagdad kaj Amman. Samtempe en GDR evoluis grandega protestondo kontraŭ la israela agreso.

Por forigi la endanĝerigon de la paco flanke de Israelo kontretaj paŝoj necesos.

Ĉiam GDR postulis energie la forigon de la sekvoj de la agreso kaj subtenas komune kun Sovetunio kaj aliaj Socialismaj Landoj ankaŭ nun la decidon de la UNO-Konsilantaro por Sekureco de la 22a de novembro 1967 por la solvo de la krizo en Proksima Oriento.

La tutaĵo de la konflikto devas trovi sian politikan solvon. – Laŭ la rezolucio – al tio ankaŭ apartenas inter alie la fiksado pri sekuritaj kaj rekonitaj limoj, justa regulado de la problemo de la rifuĝintoj, la sekurigo de la teritoria sendependeco de ĉiu ŝtato en sia teritorio kaj la garantio por la libereco de la ŝipveturado trans la internaciaj akvaj vojoj.

Tamen la sendube komplikaj demandoj.

Daŭrigo paĝo 32

Daŭrigo de paĝo 31
ĉiuj nur estas solveblaj, se la milita situacio en tiu ĉi teritorio finiĝos kaj komencos la retiriĝo de la israelaj armeoj el la okupitaj arabaj teritorioj. Ankaŭ UAR alstrebas pacan solvon. Tion ĉi substrekis Prezidanto Gamal Abdel Nasser dum sia parolado antaŭ la Nacia Kongreso de sia lando: „Malgraŭ siaj mankoj ni akceptis la rezolucion de la UNO-Konsilantaro por Sekureco de 1967 en la konvinko, ke – ekzistas politikaj rimedoj por la forigo de la agreso – tiu ĉi rimedoj plene efiku. Mi ripetas ankoraŭfoje, ke ni ne estas militintrigantoj, sed ni volas la pacon."
La vojo de la politika solvo plene akordas kun la ideoj kaj celoj de la registaro kaj la loĝantaro de GDR. Per ĉiuj por ĝi disponeblaj rimedoj ĝi tial batalas kontraŭ la agresa politiko de la „finitaj faktoj" per kiuj Israelo volas eternigi sian landrabadon.
Neniam povos esti konsentata al „rabpaco" al kiu la israelaj ekspansiistoj kaj iliaj imperiismaj kunhelpantoj volas devigi la arabajn popolojn.

Agnosko de GDR aktualas

La okcidentberlina „Telegraf" en sia eldono de la 3a de februaro 1963 skribis: „Ekonomio en la Zone* stiras en kaoson." 17an de marto 1967 la gazeto „Rheinischer Merkur" konstatas: La memkonscio de la mezgermanaj inĝenieroj kaj planistoj konsiderinde kreskis. Ili rajtas senhonte prezenti siajn produktojn kaj sur kelkaj sektoroj atingas fakte internacian nivelon – kion oni je ĉiu ajn ebleco fiere substrekas."
Samrange, kiel ĉiam pli grandaj rondoj en Okcidenta Germanio devas rekoni la realaĵojn de GDR, staras sur la tagordo la problemoj pri la agnosko de GDR kaj la ekzistantaj limoj en Eŭropo.

Diskutado pri GDR-agnosko en Svislando

Ampleksa diskutado pri la agnosko de GDR okazis dum la lastaj monatoj en la gazetaro de Svislando. La en Zürich aperanta „Volkswacht" publikigis la tekston de artikolo, verkitan de la Ŝtatkonsilantara Prezidanto de GDR Walter Ulbricht, „Neniu suverena ŝtato rajtas cedi antaŭ la ĉantaĝistoj en Bonn".
La „Appenzeller Volkszeitung" notis, ke „oni ne rajtas fermi la okulojn antaŭ tiu fakto, ke la agnosko de ‚DDR' prezentas svisan malkonsekvencecon, ĉar Svislando ja havas la principon, agnoski tiujn registarojn, kiuj fakte praktikas en lando la registaran potencon".
La „Sozialdemokratische Bundeshaus-korrespondenz" skribis: „La neagnosko de Orienta Germanio estas derivebla nek el nia reĝimo de libera demokratia ŝtato nek el nia pozicio de eksterpolitika neŭtraleco."

Dana Folketing interkonsiliĝis pri agnosko

Je propono de la Socialista Popolpartio diskutis la dana Folketing pri la ekligo de konsulaj kontaktoj kaj la faron de ŝtataj komercaj kontraktoj kiel unuaj paŝoj al agnosko de GDR kaj pri la agnosko de la Odro-Niso-Limo flanke de Danlando. Kun la konsento de ĉiuj partioj fondiĝis komisiono, kies tasko estas pritrakti la problemojn koncerne la agnoskon de GDR kaj de la Odro-Niso-Limo.

Svedoj postulas veron pri GDR

La estrarano de la sveda konstrulaborista sindikato, Ernst Bergström, diris al korespondisto de la GDR-gazeto „Neues Deutschland": „La arogo pri ekskluziva reprezentado flanke de Okcidenta Germanio prezentas danĝeron por tuta Eŭropo. Tial mi opinias ĝusta kaj necesa, ke GDR en sia projekto de nova konstitucio notas, ke ĝia strebado al kunlaborado kun Okcidenta Germanio povus okazi nur sur la bazo de egalrajteco." Bergström certigis, ke la plej multaj el la 5 000 sindikataj grupoj en Svedio subtenas la normaligon de la rilatoj al GDR. Tial estus necese, disvastigi la veron pri GDR. „Antaŭ ĉio la burĝa gazetaro diras multajn malverojn pri GDR, malgraŭ tio ĉe niaj homoj kreskas la ekkono, ke estas nenatura, ne havi normalajn ŝtatajn kontaktojn al tiu ŝtato."

SP de Finnlando:
agnoski du germanajn ŝtatojn

„En la Socialdemokratia Partio de Finnlando oni rigardas la ekziston de du germanaj ŝtatoj kiel politikan realaĵon en Eŭropo, kaj la sekureco ne povas esti akcelata, se ĝi ne baziĝas sur la agnosko de la faktoj." Tion diris la ĝenerala sekretario de la Socialdemokratia Partio de Finnlando, Erkki Raatikainen, dum kunveno de la partia konsilantaro. Estus necese, „agnoski la ekzistantajn limojn. Krom tio oni devas atenti tiujn danĝerojn, kiujn kreas la ultradekstruloj kaj la neonaziisma movado en la okcidentgermana Federacia Respubliko."
Sveda advokato pri la konstitucio de GDR
„Estas la nepra pacvolo de ŝtato, kiu manifestiĝas en pluraj artikoloj, kio min kiel eksterlandano plej forte impresas pri la projekto de la GDR-konstitucio," diris la stokholma advokato Gunnar Molin, membro en la sveda Centerpartio, pri la nova, socialista konstitucio de GDR.

(El „DDR-Revue" 5/68) Trad.: Burmeister

* En Okcidentgermanio uzita esprimo diskrimina por Germana Demokratia Respubliko



Johannes R. Becher, skulpturo de Fritz Cremer en Bad Saarow.

Johannes R. Becher:

LA GRANDA PLANO

(Himno je la komenco de nova historio de l' homaro)

Neelteneblan
Ni suferis.
Trafoliumu du jarmilojn
Kaj provu
Postrakonti:
Vi al fino ne venos.
Komencu en 1914:
Ankaŭ ĉi tie
Vi eliron ne trovos.
Potencaj ni estis
Praktikante detruadon.

La emajlo foriĝis
Sen citi nomojn.
De sur la malnovajoj,
Kaj ili perdis
Sian brilon.
Per lingvo konciza
Ni pri faroj raportas,
Sen eltrovi heroojn,
Sen citi nomojn

Ni sklavecon
Nian venkis
Ni ĉesigis nian
Toleradon kaj suferadon.
Venkis ni
Neprogresemecon nian.

Ni venkis
La militon.
Ni venkis
La malsaton.
Ni venkis
La mizeron.

Hieraŭ vi ankoraŭ mokis
Hodiaŭ vi jam opinias ebla ĝin,
Morgaŭ ĝi por vi estos realaĵo.
La granda plano
Estos plenumata
Kiu liberigos vin.

Estas vane,
Profetadi:
Tamen la homo
Estos malkovrata,
Kaj la homon ni
Kreos
Laŭ figuro,
Pli potenca ol ĉiuj
Revoj kaj profetaĵoj
Kaj en tia rapideco,
Kia lasas treege malantaŭ si
Ĉiujn rapidojn atingitajn –

Sed ni hodiaŭ
Nur scietas,
Sen havi imagon
Kaj senvorte;
La limon de l'tempo
Ni transiris
Kaj ekmarŝis
En la eraon
De l'
Komunismo.

Trad.: H. Rothe, Karl-Marx-Stadt

Proleta Esperanto-Korespondado (PEK)

K-do W. G. Keable el London kompletigis nian skizon pri la historio de la internacia laborista esperanto-movado per tre valora kontribuo. Jen eltiraĵo el lia letero:

„... la IPEanoj komprenis, ke en kruele klasbatala socio la proletesperantistoj, kiuj ne povis esti laŭnombre pli ol tre malgranda parto de la internacia proletaro, povis pravigi sian dediĉon de tempo, forto kaj mono al Esperanto nur per la valoro de siaj apartaj specialaj servoj al la proletaro. Tion ni faris per nia organizita PEK-laboro, *kiu estis deviga al ĉiu IPE-sekcio.* PEK signifis „Proleta Esperanto-Korespondado", kaj ĝi havis du branĉojn:

1. Pres-servoj al la proleta gazetaro, konsistantaj el unikaj informoj senditaj de eksterlandaj PEK-grupoj, tradukitaj en la lingvon de la koncerna gazeto. Kiel tiu servado estis estimata, atestas artikolo en 1932 en *„Rote Fahne"*, organo de la Germana Komunista Partio, sub titolo „Bravo Esperantistoj", alvokanta subtenon al la proleta Esperanto-movado pro la valoraj servoj de la Berlina PEK-grupo.

2. Kolektiva Korespondado. Grupo de laboristoj en, ekz. soveta fabriko, verkis en sia patrolingvo leteron pri laborkondiĉoj, kun subskriboj personaj; la loka esperantista grupo tradukis ĝin esperanten kaj poŝtis la originalan leteron kun la traduko al, ekz. brita PEK-grupo, kiu siavice tradukis anglingven kaj transdonis la tri dokumentojn al fabriko en la sama laborfako. Tiel ofte stariĝis ligo eduka kaj solidariga por ambaŭ – kaj la proletesperantistoj estis respektataj kiel valora fako de la proletaro, foriga al ĉiu opinio, ke nia lingvo estas utopiaĵo.

La PER-Esperanta laboro estas ĉiam la plej efika POR-Esperanta laboro."

ALVOKO

Centra Laborrondo Esperanto de GDR ŝatus ricevi pluajn materialojn pri Proleta Esperanto-Movado. Bv. sendi viajn materialojn, informojn kaj sugestojn al Centra Laborrondo Esperanto de GDR en la Germana Kulturligo, 108 Berlin, Charlottenstr. 60.

Pri la historio de la internacia laborista esperanto-movado

1. La proletaro kaj internacia lingva komprenigo

Multnombraj kaj malnovaj jam estas la klopodoj krei internacian skribon (pazigrafion) aŭ lingvon por plifaciligi la internacian lingvan komprenigon. Ili ĉiuj evoluis el objektiva bezono al plifaciligo de la lingva komunikado inter diversnacianoj. Sed nur la pli kaj pli evoluinta kapitalisma sociordo kreis internaciajn kontaktojn en kreskante granda nombro. La samtempe evoluinta proleta klaso, en sia batalo gvidita de Marx kaj Engels, jam frue komencis organizi sin internacie. Sed la kono de fremdaj lingvoj estis precipe privilegio de la burĝa klaso. Tial la proletaro jam frue spertis speciale akre la lingvajn barojn kaj sentis bezonon al facila internacia komprenilo. *Maxim Gorki* substrekis la valoron de internacia lingvo por la proletaro skribinte: „Estas nekontesteble, ke la laboranta homaro pli rapide komprenus la komunecon de siaj interesoj, se ĝi parolus unu solan lingvon".[1])

2. Gvidantoj de la laborista movado pri universala lingvo

Kvankam la internacia lingvoproblemo pasintjarcente ne sentiĝis tiel akre kiel hodiaŭ, kelkaj teoriuloj de la laborista movado atentis ĝin. La germana utopia komunisto *Wilhelm Weitling* (1808–1871) okupiĝis en sia ĉefverko „Garantioj de la harmonio kaj libereco" pri langue universelle (universala lingvo). Al Engels estis konataj tiuj ideoj de Weitling. *Engels* skribas al *Marx*, raportante pri siaj sukcesoj en la studado de la persa lingvo „. . . Estas domaĝe por Weitling, ke li ne konas la persan lingvon, li trovus en ĝi sian langue universelle toute trouvee (tute preta-D. B.), ĉar ĝi laŭ mia scio estas la sola lingvo, sen kverelo inter „mi" kaj „al mi", ĉar la dativo kaj la akuzativo ĉiam samas."[2])

Kaj *Marx* kritikas la diletantajn provojn de la franca anarkisto kaj etburĝo Proudhon pri universala lingvo. En letero al J. B. Schweitzer li skribas: „Pri la unuaj provkontribuoj de Proudhon mi ne plu memoras. Sed lia laika laboro pri la „langue universelle" montras, kiel facilanime li kuraĝas okupiĝi pri problemoj, por kies solvo al li mankas la plej elementaj antaŭscioj".[3]) Do ankaŭ *Marx* tute serioze notas rimarkon pri problemo de universala lingvo postulante nur pli profundan scion por ties solvo.

3. Rezolucioj de I-a Internacio

Ke la problemo de universala lingvo estis sentata inter la plej progresivaj proletoj, tion ankaŭ pruvas du rezolucioj, akceptitaj dum du kongresoj de la *I-a Internacio.*

1866 dum kongreso en Genf oni akceptis jenan rezolucion:

„. . . La Kongreso esprimas sian kontenton al tiuj, kiuj klopodis krei universalan lingvon por plifortigi la rilatojn inter la homoj diversnaciaj kaj por fekundigi ilin por la feliĉo de la homaro."[4]) Dum la dua kongreso, okazinta 1967 en Laŭsanne, oni akceptis jenan rezolucion: „La Kongreso opinias, ke internacia lingvo kaj la reformo de la ortografio estus ĝenerale utila kaj povus kontribui baldaŭ al la interfratiĝo de la nacioj."[5])

Tamen ni ne supertaksu tiujn rezoluciojn, ĉar la problemo de universala aŭ internacia lingvo tiamtempe ne estis iu ĉefa.

4. Unuaj internaciaj laboristaj-esperanto-organizaĵoj

La unuaj Esperanto-kluboj havis pacifisman bazon, do burĝan. La adeptoj, kiel ja ankaŭ Zamenhof mem, esperis, ke internacia lingvo povus forigi la kaŭzojn de la militoj. Ili grave eraris, kiel la historio multfoje jam pruvis. Ankaŭ laboristoj partoprenis tiujn klubojn. Sed kiam la imperiisma militdanĝero minacis pli kaj pli evidente la homaron, la pacifismaj kluboj ne plu sufiĉis al la klaskonsciaj laboristoj. Sentiĝis la bezono al propraj organizformoj, kiuj laŭ enhavo kaj strukturo devis pli adaptiĝi al iliaj klasbatalaj celoj.

La unuaj laboristaj esperanto-grupoj fondiĝis 1905–1908 en Den Haag, Hamburg, München, Paris, Stockholm kaj en aliaj lokoj.[6]) Kiel unuan nacian laboristan-esperanto-organizaĵon ni povas noti por 1907 la fondon de „Brita Ligo de Esperantistoj-Socialistoj". Pluaj naciaj organizaĵoj sekvis 1911 en Ĉeĥoslovakio, Germanio kaj Nederlando.[7]) Ankaŭ jam aperis laboristaj Esperanto-gazetoj. Tiel 1911 en Hamburg „Antaŭen", en Nederlando „Arbeider-Esperantist", en Ĉeĥoslovakio „Kulturo" kaj en Francio „Le Travailleur Esperantiste".[8]) Baldaŭ ankaŭ internacie aperis unuaj laboristaj organizaĵoj, kiuj uzis Esperanton klascele. Dum la dua Universala Kongreso 1906 en Grenf estis organizita la unua internacia kunveno de „ruĝaj esperantistoj". Samjare fondiĝis en Paris la „Internacia Asocio Paco-Libereco", poste alinomita „Liberiga Stelo". Ties membroj troviĝis precipe en Francio kaj en kelkaj aliaj eŭropaj landoj. Kiel ĉefcelon la asocio deklaris la batalon kontraŭ militarismo kaj kapitalismo. Oni eldonis kelkajn broŝurojn kun kontraŭmilita,

kontraŭnaciisma kaj ateisma enhavo. 1907 „Liberiga Stelo" eldonis la monatan „Internacian Socian Revuon", kiu publicis 1912–1914 tutan serion de artikoloj de teoriuloj laboristaj kaj humanistoj kiel i. a. V. Hugo, J. London kaj Karl Liebknecht.[9] Tamen, vere stabila kaj internacie laborefika asocio nur aperis post la unua mondmilito kiel SAT.

5. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

La franco *E. Lanti* kolektis post la unua mondmilito la restojn de „Liberiga Stelo" kaj iniciatis 1921 dum la 12-a Universala Kongreso en Prag la fondon de „Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)". SAT malligis sin de la burĝa „neŭtralismo" kaj deklaris en la broŝuro „For la neŭtralismon!" (Lanti 1922) i. a. jenajn ĉeftaskojn:

1. Esperanto servu al la klasinteresoj de la laboristoj
2. Per Esperanto evoluiĝu inter la membraro de SAT forta sento de solidareco
3. SAT eduku siajn membrojn al kapablaj, sendogmaj kaj perfektaj interniaciistoj.[10]

SAT estis dum la unuaj jaroj vere efika klasbatala esperantoasocio de la laboristoj. 1929 membris al SAT 7000 anoj.[11]
De oktobro 1929 ĝis januaro 1932 aperis ĉiusemajne la gazeto „Sennaciulo", kies enhavo servis al la internacia proletaro, publicinte ankaŭ multon pri la juna Sovetunio. SAT organizis regule proprajn kongresojn, kiujn honorprezidis kelkfoje intelektuloj progresivaj kiel *H. Barbusse* (1921, Prag), *R. Rolland* (1922, Frankfurt/M.), *A. Einstein* (1923, Kassel), *E. Toller* (1924, Brüssel). *Lunatscharski* (1926, Leningrad)[12]
La ekzisto de klasbatala neneŭtrala Esperanto-organizaĵo sufiĉe forta apud la burĝa montras, ke Esperanto evoluis al vivanta lingvo, forte radikiĝinta jam en la socio. Jam ne plu eblis izoli tiun lingvon de la sociaj evoluprocesoj.

6. Oportunismaj kaj reviziismaj tendencoj en SAT

Post 1924/25 burĝaj teoriuloj en Eŭropo parolis pri „stabiliĝo de la kapitalismo". La restaŭriĝo de la per la milito kaj la revolucio malfortigita kapitalismo estis senduba. La influo de oportunismaj kaj reviziismaj tendencoj inter la laboristaro kreskis. Tiel ankaŭ en SAT. La SAT-direkcio ĉiam pli kaj pli evidente provis eviti revoluciajn temojn en siaj eldonaĵoj. Artikoloj kaj broŝuroj kun pure revizisma enhavo multiĝis. Sendube la direkcio de SAT kaj aliaj gvidantaj membroj estis infektitaj per la trompa reviziismo. Tamen, ankaŭ kelkaj aliaj kaŭzoj estu menciitaj. SAT estis malpermesita en kelkaj eŭropaj landoj (Hungario, Italio kaj sur Balkana Duoninsulo). Tio signifis por SAT fortan ekonomian baton. Oni certe timis, ke SAT povus esti malpermesota ankaŭ en aliaj landoj pro sia politika profilo. Plue, Lanti venis el anarkismaj rondoj, membriĝis al la Komunista Partio de Francio, sed forlasis ĝin jam denove 1928 pro „kaŭzoj de neŭtraleco".[13] La influo de Lanti je SAT estis tre forta, ĉar li estis oraniza, retorika kaj verkista talento. La revolucia kerno de SAT estis preskaŭ kovrita en 1928 per tavolo de oportunismaj kaj anarkismaj programaldonoj. SAT nun deklaris (aŭ pli ĝuste Lanti kaj ties disĉiploj), ke la konstruo de socialismo nur eblos per unusola universala lingvo kaj ties apliko tutmonde, nome Esperanto. Tamen, granda parto de la membroj ne samopiniis. SAT plue deklaris, ke ĝi devas esti politike neŭtrala, sendogma kaj nur edukanta la laboristojn asocio. En broŝuroj „Naciismo", „Internaciismo" kaj „Sennaciismo" Lanti propagandis nebulan kosmopolitismon, pretervidante la verajn evolufortojn de la socio. Kontraŭsovetia pozicio estis la natura sekvo.

7. La skismo de la internacio laborista esperanto-movado

La pliakriĝo de la klasbatalo, speciale dum la monda ekonomia krizo, ankaŭ kondukis al plia akriĝo de la kontraŭdiroj en SAT. La klaskonsciaj SAT-anoj, precipe en Sovetunio, kontraŭis la reviziisman evoludirekton. Progresivaj SAT-anoj tial jam 1930 fondis opozician kontraŭ la SAT-direkcio gazeton „Internaciisto" (redakciita ĝis 1933 en Berlin). Ĝia enhavo estis tute marksisma kaj baldaŭ la abonantaro estis pli multnombra ol tiu de „Sennaciulo". Plua paŝo al la konduko de SAT sur la ĝustan socialisman vojon estis la fondo de la eldonejo EKRELO.
EKRELO (1930–33 en Leipzig) eldonis dum nur 3 jaroj pli ol 60 broŝurojn kaj librojn kun aktuale politika enhavo pri la konstruo en SU marksisma teorio, interlingvistiko kaj esperantologio laŭ materialisma vidpunkto (speciale de Drezen). Oni eĉ planis eldoni elektitan verkaron de Lenin en 16 volumoj, sed ne povis realigi tiun planon pro la venko de l'faŝismo en Germanio kaj aliaj landoj.
Dum la 10-a kongreso de SAT en Amsterdam 1931 la opozicio forlasis la kunvenojn kaj preparis Internacion de Proleta Esperantistaro (IPE), kiu oficiale fondiĝis 1932 en Berlin. La estraro de IPE estis komunista, „Internaciisto" iĝis la oficiala organo de IPE, kaj EKRELO ĝia oficiala eldonejo. Laŭ la gvidrezolucio, akceptita dum la fondkongreso, IPE estis ideologie firme bazita sur la marksisma mondkoncepto kaj uzis Esperanton por la internacia revolucia batalo kontraŭ la imperiismo kaj por la socialismo.[14] Post la potencakiro de Hitler en Germanio kaj la plifortiĝo de la faŝismo en preskaŭ tuta Eŭropo IPE baldaŭ estis sufokita kaj fakte neniam povis plene eklabori. Plua malpli grava kaj malpli konata skismo en SAT okazis 1932 dum la SAT-Kongreso en Stuttgart. Tie la Aŭstria Laborista Ligo Esperantista proponis kelkajn ŝanĝojn de la organizformo de SAT, kiuj estis malakceptitaj. 1933 tiu Ligo tial iniciatis starigon de Internacio de Socialistaj Esperantistoj (ISE)[15].
La influo de tiu Ligo estis limigita je Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario. La skismo en la internacia laborista movado esperantista pluafoje tre klare montris, ke socia movado uzanta planlingvon ne povis resti izolita de la ĝeneralaj sociaj leĝoj. Plenumante la bezonojn de tiu ŝanĝoriĉa movado Esperanto funkciis tutplene kiel vivanta lingvo.

8. La laborista movado esperantista hodiaŭ

Ni skizis la historiajn trajtojn en la evoluo de la internacia laborista movado. Hodiaŭ tia movado en la prezentita formo ne plu ekzistas. Certe, la klasbatalo plue akriĝis, sed ekzistas forta socialisma landaro kaj la metodoj kaj formoj de la klasbatalo pluevoluis. Jes, SAT ankoraŭ ekzistas, sed nur vegete kun maksimume 3000 membroj. La direkcio de SAT nenion lernis el la historio kaj ne multe ŝanĝis sian gvideologion, kiu konsistas el miksaĵo de anarkismo, kontraŭsocialismo, propagando de trotskisma klasbatalo kaj utopia socialismo. Tamen, tio ne signifas, ke en la vicoj de SAT ne ekzistas multaj klaskonsciaj laboristoj, kiuj vidas en SAT, kvankam erare, ĝis hodiaŭ bazon por efika agado. Multaj laboristoj hodiaŭ aktivas en MEM.

1) Bulletin d'information, Nr. 24, Moskau, Juni 1928, cit. ĉe Petro Stojan: Bibliografio de la Internacia Lingvo, Geneve 1929, pĝ. 150
2) Marx/Engels: Briefwechsel, Bd. I, Dietz-Verlag Berlin 1949, S. 581–582 (Brief Nr. 259 Engels an Marx, 1853)
3) Marx/Engels: Das Elend der Philosophie, Bücherei d. Marxismus-Leninismus, Bd. 2 Dietz Verlag Berlin 1952, S. 39
4) Oscar Testud „Le I-e Internationale", Paris 1871 III, pĝ. 131–132
5) vidu 4)
6) Enciklopedio de Esperanto II (K–Z), Budapest, Literatura Mondo, 1933 bis 1934, pĝ. 310–311
7)–8) vidu 6)
9) vidu 6) pĝ. 311
10) vidu 6) pĝ. 312
11) Drezen, Ernest: Analiza Historio de Esperanto-Movado, Leipzig EKRELO-eld. 1931, pĝ. 82
12) vidu 6) pĝ. 315
13) vidu 11) komp. pĝ. 82–84
14) Statuto de la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE) en „Internaciisto" Nr. 46, Septembro B, Berlin 1932, pĝ. 90
15) vidu 6) pĝ. 317

D. Blanke

RECENZOJ

Teruraĵoj, kiujn ni kredus eksterteraj.

VIKTIMOJ DE LA ATOMBOMBO ... Tia estas la titolo de bele prezentita nova libro, kiun proponas la eldonejo ASAKE-SYOBOO, Tokio, dank' al la klopodoj kaj malavaremo de japanaj pacamikoj-esperantistoj (kaj ankaŭ neesperantistoj). Ci tiuj monsubtenis la entreprenon memore al la tradukinto, JUI ĈUNOŜIN, kiu bruligis sin la 11an de novembro 1967, por protesti kontraŭ la vojaĝo Usonon de la japapa ĉefministro Satô, cele al pli intensa kunlaboro de Japanujo kun imperiismaj militemaj fortoj. Kvankam la sinofero okazis antaŭ la oficiala domo de sinjoro Satô, tamen ĉi-tiu forveturis naŭ minutojn post la morto de nia samideanc ...

La libro havas 136 paĝojn; ĝi certe estas la plej ampleksa verkita en esperanto pri tiu tragika, sed ĉiam aktuala tempo. La ĉefa parto, tre taŭge ilustrita per fotoj el la eldonejo ASAHI ŜIMBUN, konsistas el raportoj verkitaj de viktimoj de la atombombo eksplodigita super Hiroŝima, la 6an de aŭgusto 1945. „En tiu tago la vetero estis ekstreme serena kaj varmega ..." skribis unu el la viktimoj. Tio memorigas min pri la periodo majo–junio 1940, kiam la hordoj de Hitler sovaĝe invadis Francujon. Ankaŭ tiam la suno bele radiis, kaj pereis multaj senkulpuloj ...

La kortuŝaj atestoj estas verkitaj de viroj kaj virinoj apartenantaj al ĉiuj klasoj de la japana socio. Nenie vidiĝas ŝovinismo, nek malamo, sed precipe sopiro al tuja fino de la milito.

La dua parto venas de la amikoj de la tradukinto, kaj rakontas pri lia vivo plene dediĉita al la batalo por la paco, al la familio, kaj al Esperanto. Ĝi detale rakontas lian sinoferon, kiu ne sukcesis tuŝi la koron de la ĉefministro Satô. Japana ĵurnalo diris: En tiu vespero, la ĉefministro Satô bedaŭris, ke Sinjoro Jui „tro facilanime agis pri la morto. Sed estas kredeble sinjoro Jui, kiu vere sciis la valoron de sia vivo."

Hipokrita bedaŭro, tipa rezonmaniero de kapitalismaj ŝtatgvidantoj ...

De tiam la atoma danĝero daŭre ŝvebas super ni. Nun, kiam ĉiuflanke aŭdiĝas militminacoj, tintoj de sabroj, bruoj de pafilkulasoj, kirasĉaroj, aviadiloj, tiaj verkoj plej oportune memorigas nin pri la timinda danĝero de mondkatastrofo. Ĝi sonu averte al la tuta homaro: Pacamikoj legu kaj disvastigu la kontraŭmilitan literaturon!

En recenzartikolo aperinta en „Sennaciulo" – novembro 1953 pri ĵusa libro „NI NE POVAS SILENTI" eldonejo esperanto Kenkju-SÂ, Norbert Bartelmes skribis:

„La japanaj esperantistoj superŝutas la mondon per broŝuroj pri la atombombo. ... Ĉu vere tiaj verketoj starigitaj sub la agitvortoj pacistaj atingas sian pretenditan celon, kontribui al la mondpaco? ... Ni preferus al tiuj broŝuroj kiuj havas ielan nacian kolorstampon, tiajn kompilojn, kiuj montras ne nur la terurojn de unu sola armilo, sed de ĉiuj militinventoj kaj militagoj faritaj kaj farataj ĉe ĉiuj popoloj de la tero, inkluzive de la japanoj ..."

La recenzinto travivis la duan mondmiliton, kiel deviga soldato en la germana armeo, li do scias kaj spertis tion, pri kio li parolas.

Sed mi tute ne samopinias.

Estas absolute necese, superŝuti la mondon per tiaj verkoj, eĉ se ofte ripetitaj la samaj temoj.

Nacia kolorstampo ne nepre signifas ŝovinismaĵon. Ni instinkte vidas la aĵojn laŭ la eduko, kiun ni ricevis. Kaj Bartelemes tute prave timas ŝovinismon.

Japana pacamiko rigardas tra prismo samtempe japana kaj paca. Ekzistas usonaj, japanaj, francaj, pacamikoj, kvankam ili apartenas al la kapitalisme regata mondo.

Ekzistas rusaj, kungaraj kaj aliaj ŝovinistoj, kvankam ili apartenas al la komunisme regata mondo.

La danĝero de milito kuŝas ne nur en la atombombo, sed en la ĉiuspecaj ŝovinistoj, en ĉiu mondparto, en ĉiu terzono.

Konklude, mi citos frazan presitan ĉe foto de nia libro montranta la plej teruran vundon fare de la atombombo: „La tuta korpo estis bruligita. Tamen li daŭrigis malfortegan spiradon dum 48 horoj kaj fine mortis en dolorego."

Roger Milon – CR –

Noto de la Centra Redaktoro

Nia amiko Milon prave rimarkigas, ke „nacia kolorstampo ne nepre signifas ŝovinismaĵon", sed estas unu el la trajtoj de iuj SAT-gvidantoj, ke ili sisteme kreas konfuzon kaj sisteme restas sur sia izolita, sektema pozicio de ŝafblekanta pacifismo. Kiam unu paŝo estas farita sur la vojo kondukanta al malpermeso kaj detruo de atomarmiloj, kiu mortigas danĝeron por la tuta planedo, ili ne aprobas pretekste ke ili estas kontraŭ ĉiuj armiloj (kvazaŭ ni ne estus kontraŭ ili!). Kiam Vjetnamio defendas sian suverenecon kontraŭ la Usona agreso, ili silentas pretekste ke tio estas formo de ŝovinismo. Kaj eĉ kiam Japanoj avertas la Mondon pri la terura efiko de la atombomboj, ili riproĉas la „nacian kolorstampon" de ilia averto, kvazaŭ Hiroŝima apartenus al iu sennacia loko!

Sed Milon devus scii, mia opinie – kaj li pardonu mian fratan intervenon – ke en la kapitalista mondo la reganta klaso provas strangoli aŭ almenaŭ ignori la pacmovadon, dum en la „komunisme regata mondo" ĝenerale, ŝovinismo estas kondamnita kaj la pacmovado helpata. Li devus scii, ke estas abismo inter la „rezonmaniero" de la ŝtatgvidantoj de kapitalismo kaj de socialismo. Ĉiu persono, kiu serioze studas nian nuntempan historion, venas al la konkludo, ke la socialistaj ŝtatoj faris kaj faras ĉion eblan por atingi interkonsentojn, kiuj pace solvus la konfliktojn kaj kreus la kondiĉojn de paca kunvivado kaj de malarmado. Sed ili ne estas solaj, kaj ili trovas kontraŭ si la senĉesajn intrigojn de la tutmonda imperiismo, de Vjetnamio ĝis Israelo kaj Ĉeĥoslovakio.

Nia movado ne rajtas batali kontraŭ ventmueliloj kaj dissemi konfuzon. Imperiismo estas la malamiko No I de la homaro, en nia epoko, tiom por la subevoluintaj landoj kiom por la socialistaj landoj kaj la progresistaj fortoj ĝenerale. Socialismo defendas sin: tio estas absolute normala. Ni ne rajtas postuli, ke ĝi mortigu sin pretekste de pseŭdopacifismo. Tio estus nova Munkeno, kaj ni scias kien ĝi kondukus. Kontraŭ la imperiismo estas la momento unuigi ĉiujn pacfortojn. Alie, ni baldaŭ spertus aventuron milfoje pli teruran ol tiun de Hiroŝima kaj Nagazaki!

W. G. – CR –

Helena Honesta: Kiu kion scias?

3-a eldono de Paco-Esperanto-Rondo, Eszperanto-str. 5, Szeged, Hungario.

La pluraj eldonoj pruvas, ke tiu ĉi 15-paĝa kajero bone plenumas sian celon: doni okazon al bonhumora, multfoja kaj interesa lernado kaj instruado. 145 diversaj demandoj, inter ili multaj el la movado, el la gramatiko kaj el la kultura vivo de la homaro donas okazon, ke en kursoj, grupkunvenoj aŭ hejme oni provu sian scion kaj tion kompletigu legante la koncernajn solvojn. Oni

povas ĝin uzi ankaŭ en konkuroj pri ekzameno de la inteligenteco, en grupludoj kaj uzante ĉiam Esperanton, ekzercante la lingvon.

– CR –

Katalogo de la Hungarlanda Esperanto Biblioteko, Szeged, 1967

Eldono de la Somogyi-Biblioteko en Szeged. Redaktis László Péter, kompilis György Gyuris kun tri kunlaborantoj. 288 paĝoj ofsetpresite – Szeged pf 441, Hungario –

La Hungarlanda Esperanto-Muzeo en Szeged en kadro de la nomita biblioteko, kiel ties oficiala parto, havas jam valoran bibliotekon pri Esperanto kaj ĝenerale pri interlingvistiko. La nuna libro estas valora pruvo de la diligenta laboro de la iniciantoj kaj kunlaborantoj, ĉefe de Prof. Ernesto Farkas, kiu komencis kaj direktis la nefacilan laboron. La libro montras la interesan havaĵon de tiu landa biblioteko en 150 fakgrupoj pri plej diversaj branĉoj de la internacia lingvo, en diversaj lingvoj aperintaj, inter ili ankaŭ pri la pacmovadoj kaj pacproblemoj. Bedaŭrinde pri la lastaj estas ĝis la eldondato nur 20 eroj kaj estas dezirinde, ke kiuj eldonis ian ajn presaĵon aŭ havas pri tiu grava temo, sendu ekzempleron donace al la biblioteko, ankaŭ koncernan literaturaĵon, el kiuj enestas nur la fama romano de B. Suttner: For la batalilojn! Ekzemple ankaŭ pri la vjetnamaj demandoj kaj bataloj multaj kajeroj kaj literaturaĵoj mankas. Aparta parto estas pri la laboristaj movadoj. Ni deziras pluan kompletigon kaj seriozan uzon.

– CR –

Ekzamena disertacio pri LEA

La instruisto Diethelm Becker prezentis al la historia instituto de la Universitato Rostock ĝis nun en sia speco unikan ŝtatekzamenan disertacion sub la titolo „La Laborista Esperanto-Asocio sur la vojo al revolucia organizo de de la germana proletaro". Per tradukoj kaj multaj konsiloj la distrikta laborrondo grave subtenis la laboron. La kun la predikato „bona" taksita verko prezentas sur 50 paĝoj, ilustritaj per fotokopioj, bone elektitan kaj funde dokumentitan materialon pri la evoluo de LEA de poresperanta al peresperanta batalasocio. La verkinto de tiu valora studo prezentas per ĝi lerte ordigitan materialon pri ĝis nun preskaŭ neniel esplorita ĉapitro el la historio de la germana proletaro. La intereso flanke de la historia instituto pri tiu temo, grave helpas la esplorplanojn de CLR. Estus tre dezirinde, se ankaŭ aliaj institutoj disdonus esplortemojn pri la menciita temaro. CLR, la distriktaj kaj subdistriktaj laborrondoj certe donus valoran subtenon al la realigo de similaj laboroj.

Pri la vivo en fiŝista vilaĝo

En la jaro 1968 en Moskvo estis eldonita en Esperanto la novelo „Ŝippereo" de la estona verkisto Juhan Smuul, Lenin – premiito. La poeto majstre kapablas prezenti la enloĝantojn de fiŝista vilaĝo, kiuj sukcesas savi el la danĝero de certa morto dek el la 17 ŝiparanoj de la soveta ŝipo „Pühadekari", kiu alstrandiĝis sur Promontoro „Akcipitra". Tio nur eblas per ripetata risko de la propraj vivoj en la lukto kontraŭ la furiozaj naturfortegoj.
Post tiu novelo sekvas ankoraŭ sep poemoj, same dediĉitaj al la vivo de la fiŝistoj, kaj modele esperantigitaj de Hilda Drezen.
La novelo „Ŝippereo" kiel ankaŭ la poemoj estas verkitaj de Juhan Smuul tiel alloge, ke la legado vekas la deziron koniĝi la tutan prozon kaj ĉiujn poemojn de tiu estona Lenin – premiito. En „Ŝippereo" Smuul ne nur pritraktas la vivon en estona fiŝista vilaĝo sed ankaŭ priskribas la fiŝistojn kaj maristojn en periodo, en kiu ili devis rezisti ne nur la lukton kontraŭ la maro kaj la naturpotencojn.
Mallonga biografio finas tiun sukcesan volumon.
„Ŝippereo" estas nepre rekomendinda por niaj literaturcirkloj sed same valoras trastudado en kursoj por progresintoj. Specialan signifon akiras ĝia marista fakterminologio.
Apartan dankon meritas la Komisio por Internaciaj Rilatoj de la Sovetaj Esperantistoj en Moskvo K-9, Kalinina 14, SOD, kiu per eldono de tiu-ĉi novelo ebligas al la eksterlandaj esperantistoj koniĝi elstaran tradukon de la eminenta estona poeto Juhan Smuul. Por la plua eldoniga agado ni deziras al la komisio bonajn sukcesojn.

Rudi Graetz

Anh Duk: Hon Dat

Fremdlingva Eldonejo Hanojo, 1968, 446 paĝoj

Trad.: Nguhen Minh Kinh kaj aliaj

„HON DAT" estas traduko de sudvjetnama romano, eldonita en Hanojo. La aŭtoro Anh Duk akiris per ĝi la „Sudvjetnaman Literaturan kaj Artan Premion Ngujen Dinh Chieu 1960–1965". En antaŭparolo la prezidanto de la konsilantaro de verkistoj kaj artistoj de Sudvjetnamio taksas, ke en la romano vidiĝas ankoraŭ mankoj, sed tamen la verkisto meritas plene la dankon por esti prezentinta al la legantaro fidelan raporton pri la lukto de la popolo kontraŭ la usona imperiismo kaj ties lakeoj.

Hon Dat, malgranda pacema sudvjetnama vilaĝo, preparas sin toleri kaj kontraŭstari la restadon de pli ol mil malamikoj soldatoj: registaraĉaj trupoj, specialaj atak-grupoj („komando-unuoj") kaj usonaj oficiroj. Zorge oni avertas kaj kaŝas la funkciulojn de la popolarmeo, al kiuj minacas certa mortigo. Estraranoj ellaboras planojn por ruze kaj perforte defendi la vilaĝon. Tri virinoj du knaboj kaj 14 viroj grupiĝas en tre defend-taŭga kaverno, kiu rezistas ĉiujn atakojn. La unuiĝintaj fortoj de la vilaĝo sukcesa forpeli la trupojn.

La romano respegulas la kontribuon de ĉiuj tavoloj en la vjetnama lukto: la doloron de la edzino, kies edzo batalas en Nordvjetnamio kaj povas nek skribi nek subteni la familion, la sindonan laboron de avinoj, la malpaciencon de la infanoj kunhelpi la lukton, la kuraĝan kaj lertan agon de la soldatoj de la popolarmeo, la perfidon de kelkaj nedecidemaj etburĝoj, la honton de patrino, kies filo fariĝis gvidanto de fia atakgrupo kaj ŝian rekompencon al la popolo kaj la neimageblan sadismon de la malamikoj trupoj.

La romano estas tre kruela, sed estis la vivo kaj ne la verkisto, kiu faris ĝin kruela. La leganto vivas kun la herooj de Hon Dat, esperas kun ili kaj scias kiel ili, ke la malamiko neniam venkos, ĉar ĉiu falinta kamarado vivigas novajn batalantojn, duobligas la malamon kaj la popolforton.

La traduko estas ŝajne iomete „vjetnama" kaj oni bezonas tempon por alkutimiĝi la stilon. Tamen la dramatiko de la okazintaĵoj baldaŭ vekas la atenton kaj kaptas ĝin ĝis finlego.

L. Heinze

Proleta Esperanto Servo (PES) kaj EKRELO

Atingis nin tre interesa letero de soveta esperantisto pri gravaj faktoj el la historio de la internacia laborista esperanto-movado. Ni ĝin represas iom mallongigita:

„. . . Mi aprecas vian gravan iniciaton pri kolekto de materialoj kaj faktoj pri la historio de laborista esperanto-movado. La presita artikolo („der esperantist" nro 25) pri tiu temo estas interesa kaj indas aprobon de ĉiu laborist-esperantisto.

Min aparte ekinteresiĝis via propono esplori la ligojn inter la germanaj kaj sovetaj laboristo-esperantistoj.

Mi volas rememorigi pri la grava rolo, kiun ludis la ekzistinta en Berlino Proleta Esperanto Servo (PES). Ĝi disvolvis gravan fruktan agadon por propagando de proleta internacia solidareco, disvastigo de informoj pri la klasbatalo en tuta mondo kaj organizis nian kolektivon de proletaj korespondantoj. Mi loĝis en jaro 1928 en Pollando, kie regis faŝisma reĝimo. Mi regule sendis artikolojn kaj informojn pri la politika situo de tiama Pollando, okcidenta Ukrainio, pri la klasbatalo de pola laborista klaso, rezisto de subpremitaj popoloj k. s. Tiuj artikoloj pere de PES aperis en multaj laboristaj gazetoj de diversaj landoj, plejparte en Sovetunio. Poste mi establis pere de PES regulan kontakton kun la redaktoro de oficiala organo de Unuiĝo de Militantaj Senduiloj (Ateistoj) en Moskvo „безбожник" (sendiulo) kie mi aperigis kelkajn artikolojn pri la maĥinacioj de pollanda klerikalismo kaj pola faŝismo. Pro konspiraj celoj kaj singardo mi ĉiujn materialojn sendis ne rekte al PES sed al la adreso de *k-do Otto Alice en Berlin,* kaj tiu transdonis la materialojn al *k-do Nikolaj Incertov en Moskvo,* aktiva soveta esperantisto, kiu tradukis miajn artikolojn ruslingven kaj aperigi ilin en soveta revuo. Ĉiujn miajn artikolojn por PES „Sennaciulo" kaj „Sendiulo" mi subskribis per la esperantodevena pseŭdonimo „Mondulewski".

Mia kunlaboro al PES daŭris ĝis 1931, ĝis mia aresto kaj posta kondamno al malliberejo „pro soveta komunisma agado".

Poste sekvis la potencakiro de Hitler. Miaj ligoj kun PES kaj Sovetunio interrompiĝis . . .

Oni devas ankaŭ substreki la ege gravan eldonlaboron de EKRELO kaj la signifon de ties eldonaĵoj por la landoj, kie regis la politika reakcio kaj kie estis sufokita per la cenzuro ĉiu libera revolucia vorto. La ricevitaj verkoj, eldonitaj de EKRELO, kiujn mi ricevis el Germanio, estis por mi kaj aliaj laboristaj esperantistoj ofte la ununura fonto de scio pri la konstruo de socialismo en Sovetunio, pri la stato de revolucia movado en aliaj landoj, pri la arta literaturo kaj simile. Mi memoras faktojn kaj mem tion spertis, ke el eldonaĵoj de EKRELO, *„Internaciisto", Proleta Esperanto Servo* mi ĉerpis materialojn por referaĵoj kaj variiĝoj de programoj de laboristaj kulturaj aranĝoj, vesperoj k. t. p.

Kiel mi memoras en mia propaganda laboro mi utiligis *„La programon de Komunista Internacio", „133 tagoj de Soveta Hungarujo", „Ŝtato kaj Revolucio" de Lenin* en modela traduko de *Demidjuk,* verkojn de *Bredel, Lavjentjev, Reisner* kaj aliaj, kiuj eldoniĝis de EKRELO.

Tion ni ne devas forgesi. Esperanto en tiu periodo enportis sian gravan deponon en la batalo kaj progreso de la internacia laborista movado.

Mark Tretrik, Benderi, Sovetunio

Noto de la GDR-redakcio:

Similaj rememoroj kiel la supre presita ege subtenas niajn esplorojn. Kiu scias pliajn detalojn pri PES?



Bulgario

Komencantoj deziras korespondi tutmonde kaj interŝanĝi bildkartojn, Skribu al Nedjakov, Spiro, *Pernik,* str. Minor 36.

Pli ol 200 gelernantoj atendas viajn leterojn! Skribu al Enjo Daskalov, *Vraca,* Tekstila Teknikumo.

Por scienca laboro mi serĉas librojn en diversaj lingvoj pri maŝindesegnaĵoj, same poŝtkartojn, esperanto-librojn, monerojn, poŝtmarkojn, gramofondiskojn kaj sonbendojn por ekspozaj celoj kaj nia klublaboro. Rekompenco per bulgaraj esperanto-libroj, suveniroj aŭ laŭ volo. Skribu al Enjo Daskalov, *Vraca,* Tekstila Teknikumo.

Fraŭlino, 23jara serĉas korespondantojn. Ivanka Georgieva *Jevski,* str. M. Gorki No 20.

Studentino, 24jara, de elektrotekniko dez. koresp. pri literaturo, muziko, tekniko, historio, geografio. Ivanka Bansko, *Sofia* C, str. Alabin 42.

Fraŭlino, 22jara, dez. korespondi, Jardanka Petrova, *Medan,* Moskva-bulv. 13/2.

GDR

Studento, 22jara, serĉas korespondon kun svedaj aŭ finnaj gejunuloj en Esperanto aŭ germana lingvo.

Roland Stodolski, *DDR-69-Jena,* Str. d. 7. Okt. 43a.

Por letervespero (1. 9 1969) okaze de la 20-jara estado de nia respubliko bv. sendi salutkartojn al Deutscher Kulturbund. Kreisleitung, Esperanto-Grupo, *DDR-84-Riesa,* Pawitzerstraße 11.

Korespondon tutmondan serĉas Gerhard Hegewald, 40jara, interŝ. pm, bk, alumetetikedojn, Adreso: *GDR-9303-Bärenstein,* Haldenstraße 9.

Korespondon pri muziko, arto, sporto, insignoj, literaturo, bk, pm, kpt. serĉas Walter Arnold, *DDR-821 Freital II,* Bergstraße 32

Honore al 20-a datreveno de GDR, Stanislaw Rynduch, DDR-97-Auerbach, Lamnitzerstraße 4, intencas ekspozicii Esperanto-temon, petas alsendon kompletigi la materialon. Rekompenco laŭ interde malnovaj stampoj kaj aliaj esperantaĵoj por konsento.

Hungario

Lernantino, 15-jara, dez. koresp. pri ĉiuj temoj, Adrien Zsoldos, *Dunaujvaros,* Baratsag ut. 5 fszt. 1.

Lernantino, 15-jara, dez interŝ. bk., aktoro-bildojn, pm, Maria Nemeth, *Dunaujvaros,* Majus 1. u. 3. 1. 4.

Lernantino, 15-jara, dez. koresp. kaj intereŝ. pm, bk, aktoro-bildojn, Erika Nagy, *Dunaujvaros,* Baratsag ut. 54.

Lernanto, 17-jara, dez. koresp., Zoltan Ivanyi, Dunaujvaros, Epitöipari Tanulootthon Dozsa Gy. u. 35. II. 205.

Dez. koresp. pri ĉiuj temoj, Jozsef Fodor, *Dunaujvaros,* Epitöipari Tanuloothon Doszsa György u. 35. II.

Hungaraj fakuloj serĉas korespondon pri turismo, entomologio kaj akvarismo. Skribu al Esperanto-Fo-Ki-Ma, Budapest, P. O. 119, poŝtfako 16

Irako

S-ro Husen Al-Amili, Bagdad, Defterdar, Irak, serĉas la ŝatokupan kunlaboron de lerta germana samideano por eldono de germanlingva bulteno. Temas pri reciproke interesaj aferoj de politiko kaj literaturo.

Aŭtenta propono estas atendata kun antaŭdanko.

Pollando

Oficisto, 21jara, interesiĝas pri literaturo, historio, geografio, junularaj problemoj, turismo, fremdaj lingvoj, vivo en aliaj landoj ktp., kol. pm, bk pri mâlnova arkitekturo. Skribu al Janusz Henryk Ohlaszeny, *Namyslow* Rynek 4 m 3.

Oficisto, 35-jara, teknikisto, interesiĝas pri muziko, literaturo, filmo-arto, foto-arto, geografio, fremdaj lingvoj ktp, kol. pm, bk, diskojn, Emil Majewski, Jaworzno 2, ul. Kosciuszki 7, woj. Krakow

Instruisto, 35-jara, dez. koresp. pri junularaj temoj, foto-arto, filmarto, turismo, kol. pm, bk, diskojn. Mgr. Czeslaw Baranowski, Koszalin, ul. Chopina 21a/4

Instruisto, 25-jara, dez. koresp. pri turismo, kol. pm, bk, revuojn, blazonojn, Jenusz Motykiewicz, B abimost, Szk. Podst woj. Teil. Gora.

Lernantino, 19-jara, dez. koresp. pri muziko, filmarto, foto-arto, fremdaj lingvoj, junul. problemoj, sporto, turismo, kol. bk, fotoalbumojn, diskojn. Regina Rasmus, *Wielki Komorsk,* pow. Swiecie n/W, woj. Bydgoszcz.

Teknikisto-ekonomiisto, 20-jara, dez. koresp. pri muziko, filmarto, fotoarto, fremdaj lingvoj, medicino, sporto kaj turismo. Adamiec Wieslawa, *Skierniewice,* ul. A. Mickiewicza, 22, woj. Lodzkie.

Lernantino en ekonomia teknikumo, 18-jara, dez. koresp. pri muziko, sporto, fremdaj lingvoj, kol. pm, bk kaj diskojn Gabriela Wozniak, *Chorzow II,* ul. P. Findera 40.

Geesperantistoj-muzikemuloj profesiaj aŭ amatoroj aliĝu al muziksekcio „La Verda Liro", Mieĉislav Zgorzewski, *Wroclaw* 2, skrytka pocztowa 22.

Lernanto, 16-jara, dez. korespondi. Zboratski Bogdan, Babimost, ul. Wolntynska 2/1

Lernanto, 18-jara, dez. koresp. pri modelkonstruado, pm. alumetetikedoj, diskoj. Wyka Zbigniew, *Babimost* ul. Karagouska 15/4, Pow. Solehuw.

Sovetunio

Juna laboristo dez. koresp. ĉefe kun esperantistoj el GDR. Michail Podzolkov, *Harkov 10*, Elizavetinskaja 19 kv. 1

Dez. koresp. Logvinenko Junij, *Doneck-62*, poŝtrestante,

Dez. korespondi kun filatelistoj, kol. neuzitajn pm pri arto, faŭno, flauro, bk, G.I. Ŝevĉenko, *Dnepropetrovsk*, K. Libknehta 15, kv. 32

Studentoj de agrikultura instituto deziras korespondi tutmonde. Skribu al Klubo de Internacia Amikeco/Esperanto-Sekcio, *Poltava-Ukrainio*, Skovoroda str. 1/3

Rumanio

Constantin Paliciue, Str. M. Eminecu 10, *Nasaud-Jud*, Bistrita Nasaud, dez. korespondi tutmonde.

Alvoko!

Okaze de la 20-a datreveno de la fondiĝo de nia respubliko je la 7-a de oktobro 1969, ni esperantistoj, organizitaj en la kadro de la Germana Kulturligo aranĝas enketon pri „Kiel oni pensas en via lando pri nia ŝtato kaj ties pacpolitiko?" Per tio ni alvokas la tutmondan esperantistaron subteni kaj partopreni nian enketon, kiu helpu al ni konvinki la redaktorojn de nia tag-gazeto rilate al la taŭgeco de Esperanto kiel rimedo por firmigi la interpopolan amikecon.

La ricevotaj korespondaĵojni utiligos en efikaj letervespero kaj ekspozicio!

Tre dankante jam anticipe, ni certe rekompencos ĉiujn sendantojn! Limtago: Fino de Septembro 1969!

Bonvolu sendi ĉion al: Alfred Müller, 90 Karl-Marx-Stadt, Karl-Liebknecht-Str. 47, Germana Demokratia Respubliko (DDR).

-CR-

REĜUSTIGOJ . . .

– La No de PACO aperinta en Germana Demokratia Respubliko lastjara estas erare datita je „Junio-Julio". Oni devas legi: „Majo-Junio (No 174/175)"

– La No de PACO aperinta en Vjetnama Demokratia Respubliko lastjara estas erare presentita kiel „eksterserio". Ĝi fakte estas la No de Julio (No 176).

– En la No 177 de Paco (japana eldono) troviĝas iuj preseraroj, kiuj igas la tekstojn nekomprenebla. Kun niaj eksuzoj, ni prezentas al vi kelkajn reĝustigojn:

- *Sur paĝo 12* (Pri la krizo en Mezoriento):
  Dekstra kolumno, linio 5: anstataŭ „generacio" oni legu „genocido"
- *Sur paĝo 13*
  Maldekstra kolumno, linio 1: anst. „malmore" oni legu „malmorale".
  subtitolo: anst. „Jacqes Coulando" oni legu „Jacques Couland",
  linio 18 k.c.: anst. „. . . kontestata de la psikologiajn espektiojn de la konflikto . . ." oni legu: „. . . kontestata de la Araboj kaj Israelanoj. De tie, forta estas la tentiĝo nur konservi la psikologiajn aspektojn de la konflikto . . . ,"
  linio 20 k.c.: anst. „La kontraŭstaro de „arabismo" kaj „cionismo", oni legu: „La konflikto tiam fariĝas „judaraba" konflikto aŭ kontraŭstaro de „arabismo" kaj „cionismo".
  linio 31: anst. „devenas" legu: „divenas".
  Dekstra komuno, *linio 11:* anst. „formoj" legu: „farmoj".
  linio 16: anst. „garantiago": „garantiaĵo"
- Sur paĝo 15
  Maldekstra kolumno (Memkritiko)
  linio 17 k.c.: anst. „penetrinte tra la pezo de la formo kernan penson" legu: penetrinte tra la komplika lingvovesto, oni ĉiam trovas adekvatan al la pezo de la formo kernan penson".
  linio 23: anst. „la" legu „lia"
  linio 37: anst. „Elogio": „Elegio"
  Dekstra kolumno, *linio 20:* anst. „ŝok-" legu: „ŝokos"
- *Sur paĝo 19* (Ŝtato kaj Revolucio)
  Maldekstra kolumno, *linio 13:* post „esencajn" mankas la vorto „trajtojn".

-CR-

Libroservo

Se vi volas helpi nian movadon . . .
rezervu viajn libromendojn al libroservo de „Féderation esperantiste du Travail". Adreso: Mme G. ROUXm 47-MONFLNQUIN (Francio) Grava stoko de libroj el Vjetnamio, Sovetunio, Germana Demokrata Respubliko, k.t.p . . . Malaltaj prezoj.

-CR-

KIE ABONI AL „PACO"

	Jarabono
Aŭstralio: S-rino Grace Kirkwood, P.O. Box 78, COFFS HARBOUR JETTY N.S.W, 245k	10 ŝ.
Aŭstrio: Franz Wagner, Reimundstr. 37, Post 10 LINZ	40 ŝ.
Belgio: Jean Coen, 9, rue Arthur Roland, BRUXELLES-3	70 f.
Britio: C. Fielding, 1, Church road, Horfield BRISTOL-7	6 ŝ.
Bulgario: Bulgara MEM-komitato, Bulvardo Ĥristo Botev No 97, Sofia	3 l.
Ĉeĥoslovakio: Tomáŝ Balda, Revnice 416/23, PRAHA-ZAPAD	20 k.
Danlando: Egon Starup, Lavendelsvej 8, Udlerje-Pr. ÖLSTYKKE	10 k.
Finnlando: Erkki Järvinen, Ukankivenpolku 2, C 19 HELSINKI 44	5 m.
Francio: Fédération espérantiste du Travail, 4, rue du G-al Malleterre, 75-PARIS-16 (p.Ĉ.k. Paris No 902-52)	10 f.
Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto de GDR en la Germana Kulturligo. Charlottenstr. 60, 108 Berlin	5 m.
Germana Federacia Respubliko: Reinhard Haupenthal, 6603 SULZBACH-SAAR, 152-93 aŭ Kreissparkasse Sulzbach: Saar, konto No 203,393.03)	8 dm.
Hungario: Hungara MEM-komitato, Kenyérmezö utca 6, BUDAPEST-VIII	26 f.
Islando: Oskar Ingimarsson, Langholtsveg. 3 REYKJAVIK	50 k.
Italio: Dante Cattaneo, Via Val di Pedro 23, MILANO	850 l.
Japanio: Nanba Syozi, Kodan 21-201, Huruiti-Kita 3, OSAKA-ZYOTO	1000 l.
Kubo: Raul Juarez-Sedeño, Apartado 570, CAMAGÜEY	–
Nederlando: Cor de Waart, Plancinsstr. 71 AMSTERDAM – C	4,5 g.
Nepalo: Keshab Ran Joshi, Esperanto Societo, 10/319 Bhosiko Tole, KATHMANDU	–
Norvegio: Nenning Nielson, TÖRVIKBYGD	10 k.
Nov-Zelando: La peranto de Aŭstraio	
Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna 6, WARSZAWA	35 z.
Popola Respubliko de Korea: Korea Esperanto-Asocio (S-ro Sin Gosong) Poŝtkesto 16, PJENGJAN	–
Rumanio: Simon Arpad, str. Matei Voevod 12, BUCURESTI – 31	–
Sovetunio: Unuiĝo de sovetaj societoj de amikeco kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj (s-ro A Makovskij), Kalinin 14 MOSKVA	2 r.
Svedio: K. Kvist, Rimansgatan 13, S.660.92 DEJE (pĉk. 442478)	10 k.
Venezuelo: Ildefonso Nunez, Apartado de Correos 250, BARQUISIMOTO	–
Vjetnama Demokrata Respubliko: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 68, Ly Thúong Kiêt, HANOJO	–
Aliaj landoj: A. Balague, Traiseng 26, A. 3100 – ST. PÖLTEN	10 i.r.k.

Pro motivo nekonata de la C.R., la listo aperinta en la lasta vjetnama No estis parte falsa. Ni petas pardonon de niaj legantoj.

-CR-

M.E.M.-Sekretariaro

Prezidanto: Nikola Aleksiev (Bulgario)
Vicprezidantoj: Karl Kvist (Svedio), Tinka Lakova (Bulgario)
Ĝenerala Sekretario: Gösta Holmkvist (Svedio)
Sekretarioj: Tomáŝ Balda (Ĉekoslovakio), Ito Saburo (Japanio)
Centra Administranto: Anton Balague (Aŭstrio)
Centra Redaktoro de „Paco": William Gilbert (Francio)

Adresoj:
Por ĝeneralaj aferoj: G. Holmvist, Rönneholmsvägen 55 tr. 2 S-217.41 MALMÖ – V. (Svedio)
Por administraj aferoj: A. Balague, Traiseng 26, 3100-St. Pölten (Aŭstrio)
Por redakciaj aferoj: W. Gilbert, 30, Rue Croix-Mont-oire, 37-TOURS-02 (Francio)

Eldoninto de tiu ĉi numero:
Germana Kulturligo / asocia sekretarieio (Centra Laborrondo de Esperanto de GDR). Redakcio: 108 Berlin, Charlottenstrato 60, Telefono: 22 59 91. Respondeca redaktoro: Eugen Menger, Redakcia komisiono: Otto Bässler, Detlev Blanke, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Rainer Knapp, Erwin Schleusener, Willi Vildebrand, Redakcia fino: 20a Februaro 1968. Aperas ĝenerale 12 foje dum jaro, ĉiu foje kiel eldono de alia MEM-landa sekcio. Presejo: III/9/1 Grafischer Grossbetrieb Völkerfreundschaft Dresden, Betriebsteil Meissen.
8557 - 36

GERHARD
BONDZIN
El la ciklo
„Vjetnamio"

